



Biografiaj fragmentoj

Életrajzi részletek

Eŭgeno Macko
Matykó Jenő

Budapest 2020

Eŭgeno Macko:

Biografiaj fragmentoj, kiuj kondukis per la transpaso de
la klasiko al Esperanto

Életrajzi részletek, amelyek a klasszika átlépésével az
eszperantóhoz vezettek

Figyelmeztető életrázíróknak:

*Ha nem tudsz mást, mint eldalolni
Saját fájdalmad s örömed:
Nincs rád szüksége a világnak,
s azért a szent fát félretedd!*

Petőfi Sándor

Averto al verkantoj de biografioj:

*Se vi kapablas sole kanti
Pri l' propraj ĝojo kaj dolor'
Ja vin la mondo ne bezonas,
La sanktan lignon metu for!*

trad. Kolomano Kalocsay

Eŭgeno Macko

**Biografiaj fragmentoj, kiuj kondukis per la
transpaso de la klasiko al Esperanto**

**Életrajzi részletek, amelyek a klasszika átlépésével
az eszperantóhoz vezettek**

Budapest 2020

Kompilis: Eŭgeno Macko
Összeállította: Matykó Jenő

Tradukis kaj redaktis: Jozefo Horvath
Fordította és szerkesztette: Horváth József

Eldonis: Eŭgeno Macko
Kiadta: Matykó Jenő

Titolpaĝo: Jozefo Horvath
Címlapterv: Horváth József

ISBN 978-615-81479-4-1

@Matykó Jenő, 2020
@Horváth József, 2020

Készült: a Milaprint Kft. nyomdájában
9024 Győr, Dembinszky utca 8.

Enhavtrarigardo

Biografiaj fragmentoj, kiuj kondukis per la transpaso de la klasiko al Esperanto.....	8
---	---

Tartalomáttekintés

Életrajzi részletek, melyek a klasszika átlépésével az eszperantóhoz vezettek	147
---	-----

Enhavtabelo

Biografiaj fragmentoj, kiuj kondukis per la transpaso de la klasiko al Esperanto.....	8
1. Infanaĝo kaj adoleskaj jaroj.....	8
2. Mi eliris en la mondon, laboris kiel inĝeniero, poste studis filozofion	12
3. Ni estis studenta geedza paro, mi studis filozofion, mia edzino psikologion.....	14
4. Por kelka tempo mi paŝis en la burĝe normalan fazon de la vivo.....	16
5. Mi renkontis mondanojn laŭ mia inklino	17
6. Mi komencis okupiĝi pri Esperanto, kio konsciigis mian ekzistadon	18
7. La okupiĝo pri filozofio fariĝas grava por mi	20
8. Miaj studoj en la Universitato Ludoviko Maksimiliano de Munkeno	21
9. Mia aktiva politika agado en FDP	27
10. Per jago mi malfermis min el la fermiteco de la klasika mondo	29
11. Spertoj pri la diverseco de la meditado kaj pensado	32
12. Joga farmo en Veszprémvarsány, poste loĝlokoj en Győr, Budapeŝto kaj Alsóörs	35
13. Esperanto influis min en la konsciigo de eventoj	36
14. En AIS de San-Marino mi trovis profesorojn, komprenantajn la dialogikon.....	39

15. Mi tradukis mian doktoran disertacion el la germana en Esperanton	41
16. AIS transpasis la limojn de la klasikaj universitatoj	44
17. Montriĝis la neceso de la libereco de l' nova pensado.....	46
18. Gorbačov la plej potenca aplikanto de la nova pensado en la plej nova historio.....	47
19. Post la transpaso de la klasiko turno al la dialogika pensado	49
20. Naskiĝis la ideo fondi esperantan politikan partion.....	51
21. En 2004 ni komencis nian kunlaboron kun EDE.....	53
22. La politika organizo EDE-GE partoprenis en junio de 2009 la EU-parlamentajn elektojn.....	55
23. Al la pluevoluo de EDE kontribuis la renkontiĝoj en Alsóörs	57
24. Kreo de la hungara EDE (EDE-HU).....	58
25. La EDE-federacio funkcias en kvar eŭropaj landoj kiel laŭleĝe registrita politika movado por la lingva demokratio.....	63
26. Mi prelegis en diversaj landoj de Eŭropo por diskonigi EDE kaj Esperanto.....	65
27. En Alsóörs ni festis la 10an datrevenon de la internaciaj diskutkunvenoj pri la politika signifo de Esperanto	69
28. Mi ricevis la distingon Pola Kavalira Ordeno por mia agado por la popularigo de Esperanto.....	73
29. La lukto en la politika movado de EDE por la lingva demokratio estis la ĉefaj spaco kaj tasko de mia okupiĝo	75
30. Rezultoj de EDE en la EU-parlamentaj elektoj kaj la postaj opinioj kaj kritikoj	78
31. Mi prezentos sube la tekstojn de kelkaj debatoj, kiuj antaŭis ankoraŭ en 2010 ĉi tiun bedaŭrindan diseriĝon	79
32. Elstarigitaj ekzemploj el interretaj raportoj, kiuj donos mallongan trarigardon pri la problemoj de la EDE-kunlaboro	82
33. EDE kaj Esperanto kiel politikaj movadoj. Sed kio estas la diferenco inter ili?	84
34. Kion necesus ŝanĝi ĉe EDE?	87
35. Ĉu EDE povus, se jes, kiel ĝi povus kunlabori kun UM?	92
36. Proksimiĝas la EU-parlamentaj elektoj de 2014.....	94
37. Miaj diskutoj kun hungaraj esperantistoj pri ortografio, vortigo, politiko	96
38. Pri la difinoj de mia maldekstremo	102

39. La idealismo estas “mizero” ne nur de la esperantistoj.....	105
40. Miaj respondoj al enketdemandoj pri Esperanto.....	106
41. EDE kaj Esperanto inspiras komponistojn	111
42. Ĉu ekzistas Esperanto-filozofio ?	116
43. Respondo al kritikanto de la peticio, prezentita al la Unuiĝintaj Nacioj por Esperanto	121
44. Klasika aŭ nova, realeca Esperanto-movado?	126
45. Kiu estas kvalifikita diri opinion pri Esperanto?	129
46. Interfaka nova pensado.....	131
47. Dialogika transpaso de la klasiko per Esperanto	139

La numeroj antaŭ la titoloj indikas la samajn ĉapitrojn en la hungara versio.

Biografiaj fragmentoj, kiuj kondukis per la transpaso de la klasiko al Esperanto

Trarigardo de mia vivofluo en mia 75a vivojaro

Nu, en kiu lingvo mi nun skribu? Por mia sesdek-jara datreveno mi kompilis resumon Esperante kaj germane. Nun pliparte mi restadas en Hungario, do eble mi povas skribi kaj hungare kaj Esperante.

Per kelkaj vortoj jam nun mi volas rimarkigi la diferencon, kiun mi ekkonis nur en mia nuna aĝo. Por kio samtempe mi diras dankon al la Ĉiopova, ke Li permesis al mi ĝisvivi ĉi tiujn spertojn. En aĝo de ĉirkaŭ kvardek jaroj oni atingas la kulminon de sia plenumkapablo, kiel oni kutimas diri. Ankaŭ mi opiniis, ke mi fariĝis tre ŝaĝa post tiel multa lernado kaj spertado, kaj ke mi jam scias ĉion gravan. Nur nun mi vidas, kiel malmulte mi sciis tiutempe, kaj kiel multe mi devis allerni, kaj ke eĉ nun kiel malmulte mi scias, daŭre plu preskaŭ nenion. (Sokrato restas ĉiam aktuala.)

1. Infanaĝo kaj adoleskaj jaroj

Mi naskiĝis en Szabadka (nun Subotica, Serbio). Tiutempe ĝi estis por mallonga tempo reaneksita al Hungario. Sed kaŭze de la homa naturo mi ne plu memoras tiujn tempojn. Iom nebule ankoraŭ aperas en la memoro la infanĝardenaj jaroj, kaj poste la unuaklasa tempo de la lernejo, kiam en la lernolibroj oni vivue gloris Stalinon. Sed en la dua klaso frapis la okulojn, ankaŭ al ni infanoj, ke ne plu li estas glorata sed la heroaĵoj de la jugoslava partizano Tito.

Komence, mi memoras, mi vivis kune kun miaj patrino kaj avino. Hejme mi aŭdadis, ke ni ne konsentas pri tio, kion la tiam suprenstrebantaj komunistoj faras. Ĉar mian patron, lertan negociston, ĝuste tiuj malhelpis en la antaŭeniĝo. Li ne plu restadis kun ni, senspure malaperis, kiam la rusoj kaj la partizanoj enmarŝis.

Mia patrino rakontis, ke kiam oni serĉis mian patron, ankaŭ ni trafis

en vivdanĝeron, ĉar ŝi ne scipovis diri, kie li restadas. Ni vere ne sciis, kiel li malaperis, tiel mi vivis en mia etinfana aĝo en la konscio, ke mia patro estas perdita, kio tiutempe okazis ja al multaj aliaj. Ĝis kelkajn jarojn poste li aperis, revenis.

La eventoj, okazintaj poste, havis gravan influon al mia infana vivo. Pli malfrue mi sciigis pri la kaŭzoj, laŭ kiuj mia patro, estiel bonhava komercisto-negocisto, ŝatis amuziĝi (laŭ kutimoj konserviĝintaj ĝis tiam). Ekzemple okazis, ke oni telefonis al mia patrino el Budapeŝto, ke mia patro festenas en societo de leĝeraj virinoj, regalante tutajn amuzkompaniojn.

Malgraŭ sia kristana kredo mia patrino verŝajne ne povis pardoni lin, eĉ ŝi tenis min distance de li, “por ke mi ne fariĝu tia kiel li”. Post longa tempo li revenis kaj iun fojon vizitis nin. Mi aparte memoras tiun okazon, ĉar mi timis lin. Li prenis mian brakon kaj diris: “Ne timu!” Longe poste mi klopodis kompreni liajn vortojn.

Al kiuj mi inklinas atribui pli profundan sencon, se mi kunmetas la informerojn, kiujn mi eksciis de tiuj personoj, kiuj konis lin. Laŭ tiuj (kion ankaŭ mia patrino ne neis) li estis lerta, riskopreta negocisto kun plaĉaj aspekto kaj sinteno. Li aktive okupiĝis pri politiko, vizitadis diversajn urbojn por agiti. Probable li estis tipo ne timema, kio poste eble okazigis lian tragedion.

Mia patrino opiniis pri tio, ke se “li bridus sian langon”, ĉio povus okazi alimaniere. Sed tiel la politiko detruis lian spiritan sanon. Neni-am ni eksciis, kio okazis al li dum tiuj jaroj, kiam li restadis for. Verŝajne li estis ie terure torturita. Mi povis sperti nur, ke li revenis kun simptomoj de psika malsano, kaj tiel li vagadis dise tra la urbo, pro kio mi hontis konfesi, ke li estas mia patro.

Nur longe poste konsciiĝis en mi, kiom malmulte mi scias pri li, sed tiam estis jam tro malfrue, por pli multe ekscii pri li de tiuj, kiuj pli bone konis lin. Per mozaikeroj, restintaj en mia memoro, kaj helpe de miaj ĝisnunaj spertoj pri la vivo, mi provas krei spiritan bildon de li, karakterizantan lin plej adekvate.

Pri la patrinaj parencoj de mia patro mi eksciis tiom, kiom oni parolis pri li en la etburĝa parenkaro de mia patrino. Mia patra avino ne estis

diligenta, ŝi nur legi ŝatis, neglektante la dommastrumadon. Ŝi ne sciopovis bone kuiri, kaj laŭ tio ŝi ne sufiĉe zorgis ankaŭ pri mia patro. Ŝian edzon, t.e. mian patran avon, lertan negociston, oni nomis “la judo” malgraŭ tio, ke li ne estis tio, ĉar nur de la patra flanko estis en li iom da juda sango. Mi konis neniun el ili, ĉar pli frue ili mortis.

Nur pli malfrue klariĝis al mi tiuj sociaj cirkonstancoj, kiuj pleje manifestiĝis ĉe miaj familiaj antaŭuloj. Unuflanke la ambicia spirito de la etburĝa diligento, aliflanke la dekadenco de la ruiniĝinta nobelaro. Ambaŭflanke tio okazis kun granda simileco, ankaŭ en la virina flanko, t.e. ĉe miaj avinoj. Kun la diferenco tamen, ke patrinflanke mia avino tute asimiliĝis en la etburĝa medio al mia avo, kiu estis en Szabadka bonfama konstruista mastro, kaj partoprenis ankaŭ en la konstruado de la fama secesia urbodomo. Senpere plej verŝajne tio influis min en tio, ke mi studis unue kiel konstruĝeniero, kvankam de mia infanaĝo mi plie inklinis al spiritaj sciencoj.

Pri la pasinteco de la prauloj de ĉi mia avino mi informiĝis legendece. Ŝi rakontis, ke ilia bieno estis tiel granda, ke la trajnoj de la tiama unua fervojo haltis tie, t.e. ĝi havis fervojan stacion. Nu, kaj ke ŝian avinon oni ankoraŭ veturigis en kaleŝo al la lernejo. Kromas kaj kronas, ke “ni estis en parenca rilato” kun la belga reĝa familio. Ĉar dum iu ĉasado iu belga princo enamiĝis al iu tre bela praulino nia kaj edzinigis ŝin. Kaj kiam la princino mortis, ŝian havaĵon ŝi postlasis al siaj hungariaj parencoj. Mi bone memoras el mia infanaĝo pri tiu granda ekscitiĝo, kiam eble duona Szabadka volis pruvi, ke ili parenkas kun la nomita belga princino.

Pro tio, ke nun jam proksimume tri jardekojn ankaŭ mi aktive okupiĝas pri politiko, aparte interesus min la tiama politika orientiĝo de mia patro. Tiom mi certe scias, ke kiam la rusoj kaj la partizanoj enmarŝis al Szabadka, kaj li malaperis, tio havis politikan kialon. Iusence estas logika ankaŭ la konkludo, ke tiuj, kiuj forfuĝis aŭ estis deportitaj, devis esti hungaraj dekstruloj, eble ankaŭ nazioj. Al mi longe tio ŝajnis nebule verŝajna, aparte pro tio, ke en niaj familiaj kaj konatulaĵrilatoj oni ne parolis pri io tia. Kvazaŭ oni volis sekreti ion, kio tiutempe okazis ofte ankaŭ ĉe aliaj.

Kaj mia patrino ne nur tion prisilentis al mi, sed ankaŭ aliajn intimajn

familiajn informojn, kiujn tamen estus pli bone sciigi al mi malgraŭ tio, ke ŝi havis malboniĝintan rilaton al mia patro. Ŝi opiniis, ke estus pli bone por li, teni sin for de la politiko, simile al multaj aliaj “saĝuloj”.

En mia memoro restis nur, kion pluraj ankaŭ diris, ke li “iradis agiti” (tiutempe mi ne sciis eĉ, kion la vorto signifas) al aliaj urboj. Nun interesus min, kion li tiam diris, do en kiu politika direkto li agitis. Bedaŭrinde tiuj, kiuj scipovus doni ian respondon prie, jam ne troviĝas inter la vivantoj.

Tial restis al mi nenia alia eblo, ol uzante ĉiujn miajn historiajn, psikologiajn, sociopsikologiajn kaj politikajn konojn, utiligante la restintajn informojn pri liaj unuopaj karaktertraĵoj, konkludi pri tio, kio estas verŝajna kaj kio logike ekskludeblas.

Al lia karaktero apartenis, ke li estis grandanima, riskema, ne retenige-ema, nek timida. Oni diris ankaŭ, ke li estis viro de plaĉa aspekto. El ĉi tiuj ecoj mi konkludas, ke al li ne konvenus malvasta etburĝa naciismo. Lia malŝpare libera, liberala vivmaniero, eĉ se ne laŭdinda, supozigas prefere dekadencan de ruiniĝinta nobelo ol naciismon.

Ankaŭ alia epiteto evitigas supozi naciismon. Ja tie, kie oni psike ruinigis lin, oni ne vidis en li tamen grandan malamikon, alie oni likvidus lin. Mi supozas prefere liberalan orientiĝon, kiu, kompreneble, ne akordas kun la komunisma ideologio, sed tiutempe ĝi tamen ne signifis mortan malamikon.

Surbaze de ĉi restintaj informoj, antaŭ la fono de tiu historia tempo, en kiu li vivis, supozeblas, kompreneble, tia personeco, kiu devis elteni ne nur la sekvojn de perdita milito, sed ankaŭ tian socian reĝimŝanĝon, kiu ruinigis la ekzistadon de lerta kaj sukcesa negocisto.

Probable ĉi tiuj efikoj estis tiuj, kiuj kaŭzis lian psikan malsanon, kaj poste malhelpis lian pli malfruan resaniĝon. En tiu postmilita tempo oni povis trafi ofte, aparte en la stratoj de urboj, personojn de simila sorto, kiuj kondutis psikologie okulfrape, ne laŭ la kutimaj sociaj normoj. Mia patro estis unu el tiuj, kiun sub la influo de mia patrino mi volis distancigi de mi.

Mia patrino konsideris ĉiam grava mian lernejan kleriĝon. Jam ekde

mia etinfana aĝo ŝi certigis, ke mi povu trankvile lerni. En la elementa lernejo mi estis unu el la plej bonaj lernantoj kun nuraj plej bonaj notoj. Tamen, kiel restis en mia memoro, neniam mi ricevis premian libron, ĉar mi ne estis infano de laboristo. Mi ne tute komprenis, kial, sed de tiam ankaŭ mi volis esti infano, apartenanta al la laborista klaso.

De la kvina klaso de la elementa lernejo mi ne plu povis esti la plej bona lernanto de la klaso, ĉar el alia lernejo venis al ni multe pli talenta. Baldaŭ li fariĝis la plej bona lernanto, kaj ni du la plej bonaj amikoj. Ni kune lernis, ludis, sportis. Li estis en ĉio nesupereble pli bona ol ni ĉiuj, eble mi povas diri, ke Joĉjo Gubicsák estis geniuleto.

Dum ok jaroj ni kune pasigis la pliparton de la tempo, ni lernis, trejnis nin en tabloteniso, filozofiumis, admirante la senfinecon de la stelplena ĉielvolbo. Kune ni komencis ankaŭ gitarludi, kion mi baldaŭ ĉesigis, sed li pluludis en muzikbando. Post la mezlernejo mi veturis al Beogrado, por studi en la universitato, sed liaj gepatroj ne povis pagi la restadon en alia urbo, tiel ni disrestis. Al mi kaŭzis grandan traŭmaton, kiam baldaŭ, en sia aĝo de dudek unu jaroj li por eterne forlasis nin.

2. Mi eliris en la mondon, laboris kiel inĝeniero, poste studis filozofion

Post kvar jaroj, tuj post la fino de miaj studoj en la konstruteknika fakultato de la Beograda Universitato mi elveturis kiel diplomita inĝeniero al Wiesbaden en Germanio. Unue mi celis nur kelkajn monatojn da eksterlanda praktikado, da kiuj nun jam fariĝis pli ol kvindek jaroj. La germanan lingvon mi komencis lerni ankoraŭ kiel infano en privataj lecionoj, poste dum ok jaroj en la lernejo ni havis tri lingvajn studobjektojn, la serban, hungaran kaj germanan.

Do iom mi jam konis la lingvon, sed, kompreneble, sen ĉia ĉiutaga praktiko, mi ankoraŭ bezonis multe allerni fake kaj ankaŭ lingve. Tial mi povis labori en Wiesbaden portempe nur kiel teĥnika desegnisto. Mi rapide trovis mian lokon, kaj ne volonte oni lasis min maldungigi. Oni volis plialtigi mian salajron, kiam mi malkaŝis, ke mi estas ne desegnisto sed inĝeniero.

Sed la kialo, pro kiu mi forlasis ĉi tiun laboron, estis tute alia. Post unu jaro da teknika spirita praktikado reaperis mia malnova deziro okupiĝi pri filozofio. Sed dum la tiama socialisma reĝimo en Jugoslavio mi estus havinta malmulte da ebloj kiel “naciminoritato” sur la kampo de spiritaj sciencoj.

Tial mi devis elekti seriozan teknikan, stabilan burĝan profesion. Ĉar mia patrinflanka avo havis konstruistan entreprenon, ne distis de la familia tradicio studi konstruteknikan inĝenieradon. Per racia pensmaniero oni povas ion tian ellerni, eĉ ĝi kontribuas al la pluevoluigo de la rezonkapablo, kiu bezonatas ankaŭ en la filozofio, kiun poste mi efektive povis utiligi.

Mi do decidis plustudi, konkrete filozofion, por plenumi mian malnovan deziron. La dialektiko de Hegel multe impresis min – ankoraŭ el la marksisma ideologio; en Beogrado mi nome kelkfoje vizitis lekciojn en la filozofia fakultato.

Mi do skribis leteron el Wiesbaden al la universitatoj de Frankfurto kaj Munkeno, petante informon pri ebloj enskribiĝi en la universitaton. De ambaŭ lokoj mi ricevis respondon. Mi decidis por Munkeno. Interalie pro tio, ke kun la rekomendo de iu mia amiko el Subotica mi povis turni min por helpo al János Géher, direktoro de la Hungara Instituto en Munkeno, kun kiu baldaŭ kreĝis amika interrilato.

Alveninte en Munkeno, mi, kompreneble, bezonis plenumi plurajn kondiĉojn, por povi ekstudi en la universitato. Unue mi bezonis certigi mian vivopanon. Tiu malgranda sumo, kiun mi ŝparis en Wiesbaden, daŭris ne longe. Mia amiko János tamen baldaŭ venis helpi min, li konfidis al mi la reordigon de la biblioteko de la Hungara Instituto, por kiu mi ricevis iom da mono.

Dume mi serĉis al mi dungon ankaŭ en mia profesio. Bonŝance Munkeno ĝuste preparis sin por la Olimpiko, tial grandskale oni konstruadis. Baldaŭ mi ricevis laboron ĉe la konstruinĝeniera entrepreno Kunz & Co. Mi estis simpatia kiel hungara junulo al maljuna gvidanta inĝeniero bavara, kiu baldaŭ donis al mi ne nur konstruciajn sed ankaŭ statikajn laborojn. Baldaŭ mi memstare faris statikajn kalkulojn de pli malgrandaj pontoj.

Ĉirkaŭ unu kaj duonan jarojn mi laboris en ĉi tiu entrepreno, kiam blinde pafe, pli ol trafe, mi anoncis min laŭ ĵurnala anonceto ĉe la firmao Dyckerhof & Widmann. Grandan parton de la munkena metroo (*U-Bahn*) ili konstruis, kaj urĝe serĉis novajn inĝenierojn. Aŭdinte, kiom da salajro ili proponas, mi preskaŭ kaptuniĝis, post kiam mi rakontis, kion mi faras tie, kie nun mi laboras. Mia salajro fariĝis duoble pli alta, ol ĝis tiam mi ricevis.

La maldunga tempo estis tri monatoj, post kiu mi transiris al mia nova laborloko. Tie mi jam estis vera sinjoro inĝeniero, mi enlaboriĝis en la fakon, kaj post du kaj duono da jaroj ankaŭ mia germana pliperfektigis. Dume mi vizitis lingvokurson de la Munkena Universitato, ĉar ĉiu eksterlandano devis fari lingvoekzamenon. Mi pluse pri du studobjektoj: mi do elektis historion kaj matematikon apud la germana lingvo.

Mi bezonis pli ol du jarojn, ĝis apud mia inĝeniera laboro mi povis atingi la kondiĉojn de enskribiĝo en la munkenan Universitaton Ludoviko Maksimiliano¹, por studi filozofion. Samtempe mi plulaboris kiel inĝeniero pri statikaj kalkuloj de tuneloj de la munkena metropoliten.

Kiam komenciĝis la lekcioj en la universitato, mi mensogis en mia laborloko, ke mi plustudos matematikon. Se mi konfesus al miaj kolegoj, ke mi studas filozofion, ili kredus, ke mankas klapo en mia kapo. Tiel oni permesis, ke mi plulaboru dum la interesiaj tempoj kiel inĝeniero. Mi nun do laboris tra jaro kaj duono po tri monatojn kiel inĝeniero, kaj po tri monatojn mi vizitis la universitaton.

Post tempo mi konsciiĝis, ke okupiĝi pri tia duflanka, diversa spirita laboro estas tro laciga, tial mi rezignis la inĝenieradon. Al miaj filozofiaj studoj pli konvenis ŝofori nokte taksion du-trifoje semajne. El tio mi povis modere vivteni min, kiel ankaŭ ceteraj malriĉaj studentoj faris.

3. Ni estis studenta geedza paro, mi studis filozofion, mia edzino psikologion

¹ Ludwig-Maximilians-Universität

Tiutempe mi jam estis edzigita; Helga, mia edzino studis psikologion en la sama universitato. Ni do estis tipa studenta geedza paro. Ŝi tuj ricevis stipendion, do mi devis iom aldoni al la komuna buĝeto, ĝis du jarojn poste ankaŭ mi ricevis kreditan stipendion, kiun, kompreneble, mi repagis ĝis la lasta pfenigo al la ŝtato.

Mia edzino estis diligenta, celkonscia studentino, ŝi do finis dum kvin jaroj siajn studojn kun la plej bona rezulto, ŝi ekzameniĝis kun noto unu. Dume mi jam sep jarojn studis filozofion, kaj laboris pli ol du jarojn pri mia doktoriĝa disertacio, sed ankoraŭ sufiĉe longe mi ne alvenis ties finon. Pro tio mi ne ĝeniĝis, ĉar mi bezonis la filozofion ne por havi universitatan diplomon, por poste ricevi ie bonan postenon, kiel multaj aliaj kolegoj miaj. Tion mia edzino ne plu povis toleri, ni do post dek du jaroj da kuna vivo divorcis.

Al tia oportunema studado kontribuis ankaŭ, ke materiale mi ne estis devigita urĝi min. Dum ĉi tiu tempo mi sukcesis establi taksian firmaon. Unue studentoj ŝoforis ĉe mi, kiel mi mem komencis, poste eĉ kvindek-sesdek homoj povis perlabori sian vivtenon en mia entreprenon, kiun mi direktis ekde la komenco ĉiam pere de negocpartnero, por havigi al mi tempon por la studado de la filozofio.

Ni fondis la entreprenon kun du fratoj studentoj, kaj tiam ĉefe studentoj laboris ĉe ni, kaj kiam diplomitaj, unu kiel psikologo, la alia kiel kuracisto, ili eliris el la negoco, mi fuziis kun entreprenisto, disponanta pli multajn veturilojn ol mi. Ĉiumonate ni ŝanĝis la direktadon de la negoco kaj la respondecon, kio egalas al po duonjara laboro.

Tio estis la financa bazo de ekzistado por tiu memstara, sendependa, libera pensado, kiu laŭ mi necesas al tiu, kiu dediĉas sin al la filozofio. Ĉar se iu ne povas sendependigi sin de io kaj tio: ŝtato, popolo, partio, religio, laborloko, familia ligiteco k.s., tiu prefere lasu la filozofion al aliaj, kiuj povas liberigi sin de diversaj limigoj kaj kapablas libere, universale pensadi.

Dum ĉi tiuj jaroj mi okupiĝis ne nur pri ĉi tiu negoco, sed ankaŭ pri aliaj agadoj, ĉe kiuj mia inĝeniera instruiteco multe helpis. Tamen en aĝo de tridek naŭ jaroj mi kvazaŭ panikiĝis opiniante, ke ankaŭ mi devas fondi familion, ne ĉiam nur studi (kiel germane oni diras *ewiger*

Student, esti eterna studento). Nur post kelkaj jaroj mi akceptis, ke tiu vivmaniero apartenas al mi, „mi tiel ekzistas”.

4. Por kelka tempo mi paŝis en la burĝe normalan fazon de la vivo

Kiam mi konatiĝis kun Gizella, ŝi jam estis triinfana patrino. Ŝi ĝuste tiam divorcis de sia edzo, greka negocisto. Dum amikeca konversacio kun la eksedzo li diris al mi: “nu, nun faru vi, mi jam estas sata de la familia vivo”. Tiam mi ankoraŭ ne sciis, kio atendos min. La du knaboj, jamaj pubertuloj, restadis plie kun sia patro, la knabino Diana ankoraŭ aĝis nur ok jarojn, vizitis la unuan klason de la lernejo. Dum la sep jaroj de nia kunvivado, la inteligenta knabino estis en siaj jaroj, dispoziciaj por lernado. Pli malfrue ŝi rakontis al mi, ke ŝi multe lernis de mi. Ŝi akiris diplomon en ekonomika universitato. La pli aĝan knabon mi jam ne povis influ. Al la pli juna mi havis kelkan rilaton; li fariĝis universitata profesoro en lingvistika (ĝermanistika) fakoj.

Familion oni devas vivteni, ĉu ne, kaj mi devis perlabori por personoj, kiuj ĝis tiam ne konis mankojn. Post la divorco Gizella ricevis sian parton, el kiu ŝi volis krei al si ekzistadon. Ankaŭ la infanoj ricevis sian onon. La plej maljuna ekzameniĝis en aĝo de dek ok jaroj pri stirado, aĉetis sportaŭton de tipo Porsche, kaj post unu monato li faris ĝin totala vrako.

Mi vendis la duonon de mia taksia negocparto, tiel la kvar posedantoj devis ĉiujare zorgi nur kvaronjaron pri la negoco. Tiel mi havigis al mi tempon kaj monon, post kio ni malfermis hotelon po duono kun Gizella. Ni luis secesian vilaon, konstruitan ĉe la turno de la dek-naŭa jarcento, kiun mi transkonstruigis kaj enkondukis kiel hotelon. El libroj mi ellernis, kiel funkcias io tia kiel hotelo.

La lastan fenestron mi enmetis propramane, ĉar nia mono konsumiĝis, sed ni devis nepre ekfunkciigi ĝin, por ke post la multaj elspezoj ni havu ankaŭ enspezojn. Sed ĉi tiu negoco estis por mi interesa, nur dum mi povis per mia racio krei ion el nenio. Kiam la laboro fariĝis rutina, mi baldaŭ tediĝis.

Kvankam la negoco progresis ne malbone, post ĉirkaŭ kvin jaroj, pro

kelkaj disopinioj ni vendis ĝin. Aparte ĝena estis la konduto de mia partnerino. En Germanio regas la antaŭjuĝo, ke la prusoj estas tre ordemaj, la bavaroj malpli, kaj, kompreneble, la ceteraj popoloj de la mondo povas esti nur malordemaj. Nu, mi spertis ĝuste la malon. Malgraŭ tio, ke Gizella devenis el Hamburgo, ŝi estis prusino, tamen ŝi ne povis remeti eĉ unu krajonon tien, de kie ŝi prenis ĝin. Sed ŝi nomis sin negocistino.

Ni vendis la hotelon al vera profesiulo, kiu laboris ĝis tiam en granda hotelo en Francio, kaj nun memstarigis sin en la de mi enkondukita negoco. Eĉ, li transprenis de mi la specialaĵon, pro kiu mi nomis la hotelon “Hotel Galleria”. Mi eksponis nome pentraĵojn de junaj artistoj sur la muroj, da kiuj kelkajn mi sukcesis vendi por la financa ĝojo de la kreintoj.

Iun tagon mi rememoris ĉi tiun fazon de mia vivo kaj enskribis en la guglan serĉilon “Hotel Galleria München”. Mi trovis profesiajn reklambildojn pri ĝi. Kio en mia tempo ankoraŭ ne eblis, ĉar Interreto en tia apliko ankoraŭ ne ekzistis. Mi sentis certan kontenton, kiam mi rekonis la unuopajn lokojn, kiujn mi aranĝis. La tempopason malkaŝis ekz. la arboj, kiuj ĉe mi ankoraŭ havis maldiketajn branĉojn, kaj nun, post tridek kvin jaroj ili fariĝis riĉfrondaj arboj kun dikaj trunkoj.

Ĉi tiu periodo de ĉirkaŭ kvin ĝis sep jaroj estis en mia vivo la tempo, kiam mi plej multe okupiĝis pri konkretaj agadoj, kiuj eble nomeblas normala burĝa laboro. Sed ĉi tiu estis ankaŭ la tempo, kiam mi plej malmulte okupiĝis pri spiritaĵoj. Eble mi bezonis ĝin por tio, ke mi spertu la karakteron de mia personeco en la antaŭ- kaj posttempo. Certan malfermitecon al la nekonata, lerni daŭre ion novan, eĉ ĝis la nunaj tagoj.

5. Mi renkontis mondanojn laŭ mia inklino

Post la vendo de la hotelo mi serĉis societon, kie mi povus apliki miajn ĝis tiam alproprigitajn konojn, aparte en filozofio, en la internacia politiko kaj socia psikologio. Mi trafis anonceton en la gazeto *Süddeutsche Zeitung*, laŭ kiu ĉiusemajne renkontiĝas “mondanoj” (*Weltmenschen*) en postĉambro de kafejo. Mi vizitis ĝin, kaj tie mi vere trovis homojn, kiuj konvenis al mia orientiĝo kaj miaj spiritaĵoj kler-

eco kaj kapabloj.

Krom la universitato ĉi tie mi trovis homojn, kiuj iom komprenis, pri kio mi okupiĝas en mia doktoriĝa laboro. La prezidanto estis mondvojaĝinta “kuracisto sen limoj”, parolanta plurajn lingvojn, kiu post longa restado en Parizo loĝiĝis kiel pensiulo en Munkeno. Ankaŭ la aliaj partoprenantoj estis mondovidintaj poliglotaĵoj civitanoj.

Eble ĉi tie mi sentis min unufoje en Germanio inter homoj, komprenantaj miaspecajn. Post plurmonataj renkontiĝoj mi fariĝis amiko de d-ro Meros kaj ŝatata membro de la societo. Multe kontribuis al tio la loko de mia deveno kaj la temo, studata de mi en la universitato. Meros ekkonis en mi signifan inklinon kaj foje iris al mi: “Junulo, se vi estas tiom internaciema, ellernu Esperanton!”

Pri Esperanto mi aŭdis ion kaj tion jam en mia infanaĝo, sed ĝi ne interesis min pli serioze. Mi telefonis al la munkena Esperanto-klubo kaj tuj partoprenis ĵus komencitan vesperan kurson en la proksima lernejo, kie komence ni estis ĉirkaŭ dudek-ope. Mia Esperanto-instruisto estis irana esperantisto, kiu nomis sin “mondano”, mondohomo. La kunvenojn de la klubo unufoje ĉiusemajne mi asidue partoprenis (kaj partoprenas ĝis la hodiaŭa tago). Ankaŭ ĉi tie mi trovis homojn, inter kiuj mi sentis min hejme kun mia internaciemo.

6. Mi komencis okupiĝi pri Esperanto, kio konsciigis mian ekzistadon

Por pli funde ellerni Esperanton, mi decidis definitive post partopreno en la Universala Kongreso en Brighton, Anglio en la sekva 1989a jaro. Tie, post unujara lingvolernado mi scipovis pli bone komprenigi min kaj kompreni aliajn ol post la pli ol dudek-jara lernado de la angla lingvo.

Baldaŭ mi rimarkis ankaŭ, ke ĉi tiu lingvo funkcias tute en la spirito de la dialogika pensado. Ĉi tiu arte-dialogike, el diversaj klasikaj lingvoj kreita lingvo estiĝis en la tempo, kiam ĉi tiu pensmaniero fariĝis aktuala ankaŭ en la filozofio. Estas kurioze, ke tio estis decido, konforma al mia personeco, kaj ke ankaŭ mia doktoriĝa disertaĵo originas el ĉi tiu spirita manifestiĝo.

Poste mi rekonis, ke la resumo de mia ĝenerala spirita evoluo povas manifestiĝi plej aŭtente en ĉi tiu lingvo. Tiam fariĝis al mi klare, ke la esprimmaniero de mia ĝisnuna kleriĝo kaj spertiĝo aperas plej senpere en la spirito de Esperanto.

Ne tro antaŭ longe konsciiĝis al mi, ke tiu socia-politika avantaĝo, kiu haviĝis al mi, ŝuldeblas al tio, ke mi naskiĝis en regiono, kiu apartenas al la ofte ŝanĝita regadregiono de Eŭropo.

Post la t.n. patrujokupo la hungaroj regis tie preskaŭ duonjarmilon, poste venis la turkoj por pli ol unu kaj duono da jarcentoj, post kies forpelo en la regiono ekregis la Habsburgoj. Danke al ili, diversaj popolgrupoj setlis en ĉi tiuj areoj, senpopoliĝintaj dum la turkaj militoj.

En ĉi tiu regiono formiĝis marĝena centro, libera reĝa urbo, ricevinta la nomon Theresiopolis (poste Szabadka, nun Subotica). Post la disfalo kaj dispartigo de la Habsburga Monarĥio okazis eventoj, regataj de naciismaj kaj komunismaj ideologioj, kiuj efikis, kvankam nur senpere, ankaŭ al mi.

Mia patro devis suferi ankoraŭ kiel senpera viktimo de la naciismo kaj komunismo. Al mi senpere neniu el ambaŭ povis efiki. La naziismon, en kiu mi naskiĝis, mi ankoraŭ ne travivis konscie, kaj la t.n. socialismon mi simple forlasis, eltiris min el ĝi sen ĉia kontraŭstaro.

En mia kazo ĉi tiu forlaso diferencis tiom de tiu de la aliaj elmigrintaj hungaroj, ke mi povis forlasi siatempe Jugoslavion kun vizo, tiel do ankaŭ plu mi povis libere trafiki inter “socialismo kaj kapitalismo”, inter ambaŭ flankoj de la fera kurteno.

Ĉi tiu libereco en la du diferencaj politikaj reĝimoj ebligis al mi akiri spertojn, kiujn tiutempe nur malmultaj povis permesi al si. El ĉi tiuj ambaŭflankaj spertoj originas por mi la transpaŝo el la dialektiko en la dialogikon, t.e. tio, kion mi pli malfrue lernis filozofie, la fundamentadon, travivadon ankaŭ de ĝia ekzistada kompreno.

Pro tio mankas en mi ĉia malamo al iu aŭ la alia reĝimo. Mi naskiĝis en tempo, kiam la revoluciaj kontraŭdiroj mildiĝis, kaj komenciĝis konkurado inter la du reĝimoj.

Tio ne signifas, ke mi ignorus la suferojn kaj kruelajn konfliktojn de

miaj antaŭuloj. Mi ja tre kompatas ilin, sed mi ne vidas elvojon en venĝo, sed sole en la malkaŝo de la realaj eventoj kaj dialogika solvo de la kontraŭdiroj. Ĉi tiuj personaj spertoj efikas ĝis la hodiaŭa tago al miaj spirita orientiĝo kaj politika agado.

7. La okupiĝo pri filozofio fariĝas grava por mi

Ĝis nun mi nomis skize tiujn faktorojn, kiuj estis necesaj por la kreo de mia sendependa materiala bazo (kiel ni lernis ankoraŭ en la marksisma teorio), por ebligi la fundamenton de la „superkonstruo”. En mia kazo mankis ĉia financa subteno, tiel do mi mem devis ĉion ellabori, perlabori.

En kontraŭa kazo estas oferita plej multe la sendependa persona libereco, oni estas submetita al certa orientiĝo, ŝuldas personan lojalecon al granda entrepreno, institucio, politika partio aŭ nacio. Ekz. profesoro en tradiciaj universitatoj neniam povas okupiĝi tute sendepende pri sciencoj, se li ne povas vivteni sin sen la ŝtata salajro.

Mi povis ĝis la hodiaŭa tago certigi al mi sendependecon de ĉio ĉi tio. Tio donis al mi plenan liberecon de pensado. Kompreneble, kun danko al la lando, kie la demokratia libereco povis atingi la plej altan ŝtupon de la nuntempo.

Eble mi ne bezonas emfazi, ke okupiĝi pri filozofio valoras nur en ĉi tiu maniero. Se al iu ne estas garantiita sendependa libereco, bezonata por la pensado, li okupiĝu prefere pri io alia. Ĉar la filozofio nur tiam povas plenumi la starigitajn postulojn, se ĝi kapablas transpasi eĉ sin mem, do la klasikan filozofion, kiu ankoraŭ determinas la naciajn universitatojn.

Memorinte min, iun tagon mia esperantista amiko Fritz Hilpert sendis al mi retmesaĝe tekston, kiun li legis de filozofo: „kiu volas okupiĝi pri filozofio, tiu devas elekti profesion, per kiu li ne estas tute okupita, por havi ankoraŭ tempon por pensado”. Emociita mi legis, kiom trafte tio validas por mi. Mi ŝanĝis mian inĝenieran karieron, taksian entreprenon, por havi tempon por la filozofio.

Mia interesiĝo pri filozofio komenciĝis jam en mia infanaĝo. En mia aĝo de 12-13 jaroj kaptis min forta sciavido: mi volis ellerni kaj ekscii

ĉion amplekse, enciklopedie. En la lernejo oni progresis laŭ mia opinio tre malrapide pri la lernmaterialo, tial mi ŝatus salti antaŭen je du klasoj, sed tio ne eblis en la preskribita instrureĝimo.

Tiutempe estis eldonita la libroserio *Kultūra vilāga* (Mondo de kulturo), dekvoluma resumo de la ĝistiamaj atingoj de la sciencoj, kiun mia onklino en Hungario donacis al mi. Mi povas aserti, ke mia unua ampleksa bazo de konoj pri la sciencoj originas de tie. Socia doktrino estis tiutempe en la socialismo, ke ni homoj iam ĉion ekkonos kaj komprenos. En la radio mi aŭdis prelegon pri la evoluo de la homo, dum kiu la preleganto entuziasmege eldiris: „Tiutempe la prahomo ankoraŭ ne sciis, ke propraforte li atingos la nunan staton de la scienco”. Mi naive kredis tiun ĉiopovecon.

En aĝo de dek kvar jaroj mi venis unuafoje en kontakton kun la filozofio de Hegel tra la marksismo, kiu estis tiutempe ŝtate oficiala pensmaniero. La dialektiko de Hegel firmigis en mi la kredon, ke iam, ja post nelonge, la homo ĉion ekkonos kaj regos la tutan universon.

Sed anstataŭe mi devis baldaŭ ekkoni plie la limojn de la homa povo post la morto de mia amiko, kune kun kiu ni tiel multe kredis la ĉiopovecon de la scienco. Tiam reaperis mia kredo, ankoraŭ naiva en mia infanaĝo kaj forlasita por kelka tempo dum mia adolesko, je la Ĉiopova Dio. En tiu reala universo, kies senfineco montriĝas nur, se ni pretas sensivigi nin por tio.

Por rimarki tion, kiu nove montriĝas el la senfineco de la universo, ni bezonas lerni el tiuj observoj kaj spertoj, kiujn niaj antaŭuloj surpaperigis. Ekde tiam mi nur lernas kaj lernadas, kaj ĉiam pli mi konvinkiĝas, kiel malmulte mi scias, kaj kiel malmulte ni povas scii pri la universo. Sed jam Sokrato ja sciis, ke “li scias nenion”.

8. Miaj studoj en la Universitato Ludoviko Maksimiliano de Munkeno

Do post la akiro de la inĝeniera diplomo kaj tri-kvin jaroj da inĝeniera laboro mi decidis studi plue filozofion. Komence mi provis kunligi la pensmanieron kun miaj ĝistiamaj studoj. Al mi ankoraŭ ne estis tute klare, en kiu direkto de la filozofio mi iros. Mi aŭskultis la lekciojn pri

pozitivismo de prof. Stegmüller paralele kun matematikaj lekcioj kaj praktikoj. Sed laŭ tio, kiel mia spirita liberiĝo progresis, mi komencis aŭskulti lekciojn pri la klasika filozofio.

Baldaŭ mi renkontis prof. Max Müller, disĉiplon kaj amikon de Martin Heidegger. Ĉe li mi trovis historie la plej konvenan adaptiĝon al mia spirita prepariteco. Kiel kroman studobjekton mi elektis internacian politikon kaj socian psikologion. Por la filozofia doktoreco mi bezonis akiri subskribojn en tri studobjektoj, ekzameniĝi pri praktiko kaj teni referaĵojn en seminarioj.

Internacian politikon mi aŭskultis ĉe prof. Gottfried Karl Kindermann, kiu estis unue asistanto de Morgenthau en Usono (fondinto de la ekstera politiko de Usono post la milito) en la universitato de Ĉikago, kaj fondis poste en Munkeno la katedron pri internacia politiko. Fakte la socipsikologia katedro ankoraŭ ne ekzistis en Munkeno, tial mi studis duonsolve laborpsikologion ĉe prof. Arthur Maier.

Okaze de interparolo kun prof. Kindermann, post kiam mi rakontis, de kie mi venis kaj kion mi volas, kion mi faris ĝis tiam, li proponis al mi doktoriĝi ĉe li. Sed mi jam ne volis devii de la vojo de la filozofio, por kiu pli frue tiel ĝoje mi jam devontigis min.

Max Müller ĝuste tiam okupiĝis pri Hegel, tiel do okaze de interparolo – post kiam mi rakontis al li, ke Hegel motivis min filozofii – li proponis al mi habilitiĝi per parto de lia laboro. Sed tiam mi jam komencis okupiĝi pri Heidegger, kaj volis pluevolui en tiu direkto.

Tiel mi rifuzis ankaŭ duafoje proponon por mia doktoriĝa laboro, kiun tiam plej verŝajne mi povus plenumi multe pli facile ol tio okazis pli malfrue. Mi jam studis la kvaran jaron filozofion en la universitato, kiam mi ricevis la necesajn subskribojn, por komenci doktoriĝan laboron.

Kun Heidegger kaj la „nova pensado” komenciĝis ĉe mi longa serĉado. Mi forlasis la terenon de la ĝenerale konata klasika filozofio, kaj paŝis sur terenon, kiu estis konata nur al tre malmultaj specialistoj. Max Müller mem estis disĉiplo de Heidegger, kaj ne volonte lasis min habilitiĝi pri Heidegger. Li sendis min prefere al sia asistanto prof. Alois Halder.

Mi rakontis al li, de kie mi venis, kion mi faris ĝis nun, kaj kial interesas min la „nova filozofio” de Heidegger. Lian atenton kaptis (nun mi jam scipovas prijuĝi) mia rakonto pri tio, ke mi venis de tia regiono de Eŭropo, kie diversaj popoloj vivas kune jam de jarcentoj, ofte domo ĉe domo, pordo ĉe pordo, el kio tamen pluvoje rezultis en la proksima pasinteco katastrofaj eventoj. Mi volus okupiĝi pri la kaŭzoj de ĉi tiuj kontraŭaĵoj kaj trovi solvon por ili.

Li konsilis al mi ekzameni, eble ĝi interesos min, la t.n. „novan pensadon”, ion similan kiel ĉe Heidegger, nome la “dialogikan pensadon”. Kvankam jam la kvaran jaron mi studis filozofion en la universitato, tiam mi aŭdis la unuan fojon pri ĉi tiu filozofia direkto. Aparte li proponis al mi studi Franz Rosenzweig, ĉar ĉe li oni povas plej funde ekoni la esencon de ĉi tiu pensmaniero.

Mi komencis okupiĝi pri la dialogika filozofio, kaj baldaŭ ravis min la ekzistada signifo de ĉi tiu pensmaniero. Unuflanke ĉi tiu filozofio alportis al mi tre multajn ĝojojn, ĉar ĉiam pli novaj realaj interrilatoj pliklariĝis al mi pri la cirkonstancoj de mia ekzistado. Kaj aliflanke pli multe mi profundigis en tiun apartaĵon, kiun la okupiĝo pri la filozofio entute kunportis.

Ĉi tiu pensmaniero estas tre malmulte konata ĝis la hodiaŭa tago, eĉ en akademiaj rondoj, ĝi restis plie fremda. Nun jam pli ol tridek jarojn mi okupiĝas pri ĉi tiu temo, kaj kuraĝas aserti, ke tiuj, kiuj per klasikaj manieroj tenas la potencon en siaj manoj, tute ne volas ekkoni ĝin, multe malpli konigi ĝin. Prefere ili provas malfruigi la konscion pri la ĝenerala neceso de ĉi tiu nova pensmaniero. Ili ankaŭ plu insistas pri la klasikaj manieroj, klasika etiko, kio en nia nuntempo kuntrenas ekzistadan danĝeron, aŭ pri la klasika logiko, kiun la scienco jam transpasis.

Sed la realo ĉiam denove montras la neceson de la transpaso de la klasiko, se ankaŭ plu ni volas ekzisti sur nia terglobo. En la internacia politiko jam eksplicite montriĝis la konscie necesa, decida elekto de la dialogiko.

Prof. Max Müller ne longe restis en la munkena universitato, ĉar li estis baldaŭ emeritiĝonta. Tio signifis por mi, ke mi bezonis serĉi novan

doktorigan patronon (t.n. *Doktorvater*, doktorigan patron). Por mia bonŝanco prof. Fritz Leist okupiĝis ĝuste pri la dialogika pensado, lekcii kaj gvidis seminariojn pri Martin Buber, relative konata ĉi-direkta filozofo. Mi prezentis min al li, kaj volonte li akceptis min inter la doktoriĝontajn studentojn kune kun mia komencita laboro pri Franz Rosenzweig. Tiam sekvis la por mi eble plej fruktodonaj du jaroj, ki-am mi metis la fundamenton de mia filozofia pensado, kaj pretiĝis la unua versio de mia doktoriĝa laboro, kiu esence jam ne ŝanĝiĝis.

Mi aŭskultis ĉiujn lekciojn de prof. Leist kaj aktive partoprenis liajn seminariojn. Mi ekkonis kaj enlaboriĝis en lian labormetodon. La doktorigajn seminariojn partoprenis almenaŭ ok-dek studentoj, kie ni prezentis reciproke niajn laborojn, priparolis kaj diskutis ilin. Mia ĝojo ne povis longe daŭri: prof. Leist neatendite mortis. Denove trafis min la problemo trovi novan doktorigan patronon por mia jam preta doktoriĝa laboro.

Fritz Leist, same kiel Max Müller apartenis al la “katolikaj junularaj movadoj” kontraŭ la nacia socialismo. Leist estis ankaŭ la prezidanto de la katolika movado “Graue Orden”, pro kio Gestapo arestis, pridemandis, poste malliberigis lin. Max Müller apartenis al la katolika parto de la kristana-humanisma movado Blanka Rozo (*Weißer Rose*). La nazioj ankaŭ lin arestis kaj malliberigis, kaj nur pere de amnestio li elprizoniĝis. Ambaŭ ili efikis al mi multe ne nur sur la kampo de la scienco kaj filozofio, sed ankaŭ per sia ĝenerala homa, spirita orientiĝo.

Se mi nun rememoras ĉi tiujn tempojn, frapas la okulojn mia tiama naŭveco rilate al la scienco kaj la profesoroj. Mi povus preskaŭ diri, ke tiam mi kredis tiel, kion mi ne scias, tion scias la profesoro, al kiu mi turnas min. Mi multe eraris, ĉar poste mi spertis, ke ankaŭ ili estas limigitaj en tiu scio, pri kiu ili ĝuste okupiĝas. Kaj mi bezonis trovi instruiston, ĉe kiu mi povus habilitiĝi per mia jam preta doktoriĝa disertacio. Por tio mi bezonis, kompreneble, iun tian, kiu kompetentas pri tio, pri kio mi skribas.

Unue mi turnis min al juna, je kelkaj jaroj pli aĝa profesoro, habilitiĝinta ĉe prof. Leist. Li nomiĝis prof. Knapp, ĉe kiu laboris kelkaj aliaj doktoriĝontoj de Leist. Li legis mian laboron, mi ne kredas, ke multe

li komprenis el ĝi laŭ tiuj rimarkigoj, kiujn li faris. Kio estis aparte okulfrapa, ke li tute ektimis mian tezon, kvankam ĝi originis ne de mi. Li donis al mi kelkajn konsilojn, kiujn mi tute ne povis utiligi.

La timiga tezo estis, ke la hegela dialektiko alvenis sian finon. Kun ĉi tiu kritiko poste mi plurfoje estis trafinta kontraŭ neplaĉon, kvankam mi transprenis ĝin de Rosenzweig, kies pravecon, aparte en nia nuntempa historio, mi volis prui per mia laboro.

Mia sekva provo okazis ĉe la renoma munkena katolika teologo filozofo prof. Eugen Biser. Post kiam mi aŭdis lin dum lekcio menciis la dialogikan pensadon, mi petis de li priaŭskulton. Post kiam probable li iom legis mian laboron, li ne estis rifuza, sed proponis ŝanĝojn en la direkto al la katolika teologio, kiuj tute aliigus la dialogikan kernon de mia disertacio.

Mia lasta provo en la munkena universitato estis ĉe prof. Robert Spaemann, kiu estis la posteulo de Max Müller en la katedro de la katolika filozofio. Mi esperis tiam, ke en la katedro, kie mi ricevis la proponon por mia disertacio, mi trovos pli da kompreno. Anstataŭe ĉi tie pruviĝis, kion mi jam nepre scias, ke estas tro fortostreĉe transpasi tiun direkton, kiun oni reprezentas aŭ tiun temon, pri kiu oni ĝuste okupiĝas, kion la plimulto ne kapablas, kaj ankaŭ ne volas fari, oni emas ja resti prefere sur la jamaj vojoj.

Spaemann estis renoma klasika filozofo en la Katolika Katedro de la Munkena Universitato, kies opinioj interesis ankaŭ plurajn teologojn. En la tempo, kiam la pli malfrua papo Ratzinger ankoraŭ estis en Munkeno, ili staris en diskutrilato unu kun la alia, ili eble interrilatis ankaŭ amike, ĉar Spaemann vizitis Ratzinger ankaŭ en Romo dum lia papado. Eĉ (sed tio estas jam nur mia persona supozo, bazita sur tio, kiom mi konas Spaemann), lia influo kunkontribuis al ties antaŭtempa abdiko, kiu estas senekzempla demokratia decido en la katolika eklezio.

Ĉe Spaemann mi studis ankoraŭ du jarojn, plie klasikan filozofion. Li estis malferma al la nova pensado, estimis Heidegger kaj la dialogikajn pensulojn, el kio devis origini lia profunda, racia, demokratia koncepto (kun simpatio al la verduloj). Sed li ne povis aŭ ne volis apartiĝi

de la klasiko tiel, kiel necesus en la nova pensado. Mi aŭskultis liajn lekciojn kaj partoprenis liajn doktorigajn seminariojn, ellernis lian metodon, sed tute transpreni ĝin mi jam ne povis. Mi trovis ankaŭ ĉe li multe videble tiun klasikon, de kiu ankaŭ mi estis tiom ravita komence de miaj studoj, sed ĉe mi okazis la transpaso, post kiu eĉ ĉe Max Müller mi ne povis persvadi min okupiĝi nur pri Hegel.

Mia doktora disertacio, kompreneble, ne malhavis Hegel. Li restis tie en giganta grandeco, sed mi transpasis la klasikon kaj venis kun la Heidegger'a estofilozofio kaj dialogika filozofio al la nova pensado. Kiel Karl Löwith montras al la vera antaŭulo de Martin Heidegger en la nova pensado, Franz Rosenzweig, kion tamen preskaŭ neniuj scias.

Al ĉi tiu nescio apartenas ĝenerale ankaŭ tio, ke Heidegger estis en sia esenco komprenita de tre malmultaj, kiuj okupiĝas pri filozofio. Por tio oni bezonas kompreni la plupaŝon de Heidegger post lia "Esto kaj tempo" (*Sein und Zeit*) al liaj pli malfruaj verkoj (*Spätschriften*), en kiuj antaŭ Heidegger malfermiĝas la "libera vasto" (*freie Weite*). Kion oni povas sekvi plej aŭtentike en liaj dialogoj kun siaj japanaj studentoj. Sed tiutempe Heidegger jam fariĝis tro maljuna por tio, ke ĉi lia vojo en la liberan vaston povus postlasi percepteblajn spurojn.

Spaemann legis mian laboraĵon, poste en kelkfojaj interparoloj esprimis sian opinion. Li inklinis al la nova pensado, samtempe profunde radikiĝis en la klasiko. La kritikon pri Hegel ankaŭ li ne povis konsumi, li provis ĝin relativigi kaj tiel motivi min. La manifestiĝa teorio de Rosenzweig, kaj kio montriĝas en ĝi fenomenologie, sen kontraŭdiroj, plaĉis al li, sed li ne volis forlasi Hegel el ĉi tiu kunteksto.

Lastafoje ni disiĝis kun tio, ke la modifojn, proponitajn de li, mi faros, kaj post tri monatoj ni denove renkontiĝos. De tiam pasis jam ĉirkaŭ tridek sep jaroj. Mi ne povis persvadi min forlasi el mia laboro tion, per kio mi volis esprimi la evoluvojn de la nova dialogika pensado. Lastafoje mi vidis lin en la operejo, de malproksime, dum la prezentado de "Moseo kaj Aaron". Pasintjare mi legis en ĵurnalo, ke li mortis. Dio donu al li pacon!

Iu lia rimarko pri mi restis al mi aparte en la memoro. Eble ne estas vante konfesi, ke tiu opinio de tiel grandformata homo varmigis mian

koron. Post iu renkontiĝo mi respondis en letero al lia kritiko. Ekestis filozofia diskuto inter ni, en kiu li dialektike esprimis sian opinion. Kaj fine de la letero li skribis (ĉu vere tiel li pensis aŭ volis min nur konsoli, por ne ofendi min pro mia pli frue esprimita starpunkto, res-tos jam eterna sekreto): *Sie sind ein echter Philosoph*, vi estas vera fi-lozofo.

Tiam mi jam pasigis la lastajn de miaj tridekaj jaroj, kiel oni diris, mi fariĝis „eterna studento”. Tio estis mia vivperiodo, pri kiu mi jam mal-longe skribis: mi konatiĝis kun Gizella, kreis kaj enkondukis hotel-negocon. Sed longe mi ne eltenis vivi nur laŭ burĝaj normoj, sen spiri-ta engaĝiĝo, do sen lernado, kiun dum mia ĝistiam viva mi ja ĉiam faris kiel ĉefokupiĝon.

9. Mia aktiva politika agado en FDP

Grava ŝanĝo estis en mia vivo, ke mi komencis okupiĝi pri politiko ne nur teorie, kiel en la universitato, sed ankaŭ praktike. Mi aliĝis al la Libera Demokratia Partio² (FDP). Do germana liberala partio, kiu tiu-tempe estis en registara koalicio kun la Socialdemokratia Partio de Germanio³ (SPD).

Ekde kiam mi fariĝis germana civitano kun balotrajto (jam de pli ol 40 jaroj), ĉiufoje mi elektis FDP, ĉar jam dekomence ĉi tiu partio konve-nis al mia politika orientiĝo kaj eble ankaŭ al la kerno de mia karakte-ro. Por mi estis ĉiam tre grava la laŭeble plej granda persona libereco disde ŝtato kaj burokratismo.

Al la kondutformoj, bazitaj sur la klasika etiko, mi ĉiam rilatis kritike. Soldatoj, policianoj, oficistoj, burokratoj kaj similaj individuoj neniam apartenis al la por mi simpatiaj personoj. Kie kaj kiam ajn mi povis, mi evitis ilin kun iliaj kondutmaniero, karaktero. Ĝis la hodiaŭa tago estas por mi repuŝa ilia supraĵa, uniforme superema, regema konduto al la civitanoj, kaj ke kelkaj misuzas la ekzekutivajn leĝojn, rajtig-antaj ilin.

La liberaligo estas la civilizacia evoluo de la homa kunvivado, se ĝi

² Freie Demokratische Partei

³ Sozialdemokratische Partei Deutschlands

preterlasas, kiom eblas, ĉi tiujn kondukt- kaj regadformojn, originantajn el mezepokaj reĝimoj, kaj pluevoluas en demokratio al malferma, libera socio.

La decida motivo por mia aliĝo al ĉi tiu partio estis tamen la ekstera politiko de FDP. En ĝi mi trovis plej adekvate realigita la necesan internacian politikon de la postmilita Germanio. Kiu ankoraŭ longe ŝajnis al mi en ĉi tiu lando “eksterlanda”, tamen konvenis al mia konscio, leviĝinta jam frue super la naciajn limojn.

La internacia politiko de la registaro Brant-Scheel iom post iom montriĝis ankaŭ en la realo de la ĉiutagoj. Mi loĝis en Max-Vorstadt, kie mi laboris en la eksterpolitika sekcio kun aliaj partianoj. Tie mi havis okazon senpere sperti la efikon de tiu politiko al la civitanoj. Kompreneble, ĉi-kampe ankoraŭ restas multe da plibonigendoj. Sed mi troviĝis inter ili kaj povis diri mian opinion, kiu en multaj okazoj ankaŭ helpis al ili.

Mi estis dek kvin jarojn longe membro de FDP, dumtempe mi aktive laboris kun nia grupo antaŭ la elektoj, kune ni partoprenis politikajn seminariojn kaj prelegojn, interparoladis, diskutadis. En ĉi tiu partio mi trovis iom malfermajn orelojn por la esprimiĝo kaj pludono de mia internacieco. Tio plifortiĝis, kiam mi komencis okupiĝi pri Esperanto. Sed en tiu tempo ankoraŭ mankis al mi, komencanta esperantisto la veraj argumentoj, ligitaj kun la politiko.

Kaj kiam mi pluevoluis en Esperanto, utiliginte mian politikan scion, partoprenis la fondon de nova partio, pli precize politika movado: EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto), tial mi devis ekŝiĝi el FDP.

Mi havas plej malnovan, ankoraŭ nun daŭrantan membrecon en iu politika organizaĵo (t.e. mi ankoraŭ pagas la jarkotizojn, kaj jam de tridek kvin jaroj ricevas ĝiajn invitilojn al diversaj politikaj prelegoj, kunvenoj, kiujn laŭokaze mi ankaŭ vizitas.) Ĝi estas la munkena sekcio de *Europa-Union*. Ĝi estas superpartia, por-Eŭropa civila politika movado.

Ĝi estis fondita de pli maljunaj germanaj politikistoj, volantaj unuiĝintan Eŭropon, kiuj malgraŭ sia aĝo transpaŝis la fermitecon de la nacia pensado, kaj alvenis al eŭropa internacieco. Tiutempe ankoraŭ ne

ekzistis EU, do la nuna Eŭropa Unio. Ĉi tiu civila movado tiam ankoraŭ nur volis EU, kiu hodiaŭ jam realiĝis, kvankam kun ankoraŭ multaj riparendo. Tial ĉi tiu organizo iel perdis en la lastaj jaroj sian plenan aktualecon, kvankam ankaŭ nun ĝi estas subtenata de multaj Eŭropo-amikoj (similaj al mi).

Post mallonga tempo, okupiĝante paralele pri *Europa-Union*, mondci-vitanoj, FDP kaj Esperanto, ĉi lasta komencis okupi plej multe mian interesiĝon, kaj mi decidis studi ĝin pli funde. En Esperanto mi estis trovonta la eblon de kulmino de ĉio ĝis nun lernita kaj spertita. La *inter-eco*, kiun mi studis en la universitato en la dialogika pensado, ĉi tie manifestiĝis konkrete en la *inter-nacieco*, kiu fariĝis dialogike necesa en la Eŭropa Unio kaj la tutmonda politiko.

Grava turno okazis en mia vivo, kiam mi panikiĝis kiel “eterna studento”, kaj volis fondi ĉiupreze familion. Ŝajnis, ke mi bezonis tiujn kvin-ses jarojn, kiam plej multe mi okupiĝis nur pri la negoco, nu kaj krome aktive ankaŭ pri politiko. Tiam konsciiĝis en mi la manko de tio, kion mi faris kiel ĉefokupon: la lernado. Post kiam ni rezignis la familian kunestadon kaj la negocon, kiu postulis la pliparton de mia tempo, denove mi povis fari tion, kion antaŭe. Ankaŭ plu mi povis okupiĝi pri scienco.

Tio okazis al mi en la aĝo, kiam la ĝis tiam studentaj homoj ĉirkaŭ 40-jaraĝaj kreas al si karieron kaj ankaŭ atingas multe, ĉar kiel oni kutimas diri, en ĉi tiuj jaroj la laborkapablo de la homo kulminas. Tial oni devas bone utiligi ĉi tiun vivoperiodon. Ĉe mi tio okazis tute ne tiel. Kvankam ankaŭ ĝis tiam mi multe lernis, havis ankaŭ iom da vivospertoj, sed anstataŭ uzi ilin por kariero kaj famo, mi denove komencis studi.

10. Per jogo mi malfermis min el la fermiteco de la klasika mondo

Refoje komenciĝis mia lernado tie, kie la pli multaj homoj, okupiĝantaj pri filozofio, plej ofte finas kaj aplikas la ĝisajn lernitaĵojn. Mi ne finis, sed mi ne estis materiale altrudita, kiel miaj plej multaj universitataj kolegoj. Mi povis permesi al mi la „lukson”, ke mi eĉ ne iris al la lasta konsulto de la profesoro, ĉar mi ne volis devii de tio,

kion per dekjara esplorklaboro mi eltrovis. (Eble tamen ĉi-punkte pravis Spaemann, kiam lastafoje li diris: „vi estas vera filozofo”).

Tiel mi alvenis ĝis stato, ke tiu filozofio, per kies helpo mi transpaŝis la klasikon, la klasikan logikon, t.e. la klasikan pensmanieron, malfermis al mi la pordon al la vasta mondo, tien, kie la universo komenciĝas, pri kiu ni tre malmulte scias, sed al kiu ni devas esti malfermitaj, kaj pretaj ekkoni tion, kio montriĝas, se ĝi montriĝas.

Pri jogo mi okupiĝis jam de mia infanaĝo, sed ĝis tiam nur pri korpaj ekzercoj de la hatha-jogo. Ĉar la eŭropa dialogika filozofio atingis per la transpaso de la klasiko tiun staton, en kiu ĝi malfermiĝis por la kompreno de aliaj kulturoj, mi formis al mi alian sintenon al la jogo. Ĝi komencis interesi min ne kiel korpa ekzerciĝo, sed konsciiĝis en mi, ke ĝi estas vivoformo, kiu diferencas de nia eŭropa vivmaniero, sed kiel kompletigo de nia esto ĝi povas havi gravan rolon. Tie, kie malfermiĝis la klasika ferveco de mia eŭropa kulturo, montriĝis nova eblo proksimiĝi al la universala. Mi plivastigis miajn ĝistiamajn konojn pri la jogo per legado kaj pli intensaj ekzercoj.

Mi anoncis min ĉe la munkena jogocentro *Shivananda Yoga Zentrum*, kie 2-3-foje semajne mi vizitis grupajn trejniĝojn krom miaj ĉiutagaj ekzercoj. Kaj kiam mia eksedzino Helga faris la ekzamenon pri instruado de jogo, ŝi instigis min fari la samon. Rilate al tio estas interese mencii, ke kiam ni ankoraŭ vivis kune, ŝi konsideris miajn ekzercojn vanaj. Ŝi ŝanĝis sian opinion, kiam ŝi fariĝis psikologo. Post tri jaroj da lernado en la munkena *Zentrum für Naturheilkunde*⁴ mi fariĝis jogoinstruisto laŭ la metodo de la Eŭropa Jogounio (EYU).

Mian jogoinstruistajn konojn mi aplikis nur dum mallonga tempo en la munkena *Surath-Shabd-Jogazentrum*, kie mi gvidis ekzercojn de hatha-jogo. Sed (pro plendo de hungara geedza paro) mi devis baldaŭ eksiĝi, ĉar laŭ ili „mi alportis fremdajn fortojn” per miaj korpaj ekzercoj „en la meditanan centron”.

Dum ĉi tiu tempo mi allernis ne nur teoriajn konojn al mia ĝistiamaj jogopraktiko, sed faris kun mi ankaŭ korpajn kaj animajn eksperimen-

⁴ Centro de Naturkuracado

tojn. Laŭ la propono de la jogomajstro Swami Shivananda mi reguligis mian vivmanieron. Mi fariĝis vegetarano, tute senalkohola, razis mian kapon kalva, trifoje tage mi faris korpajn ekzercojn, al kiuj apartenis krome ankaŭ ĉirkaŭ duonhora kapostaro.

Lige kun la kapostaro estas interese mencii mian travivaĵon en Aŭstralio. En la tute antipoda parto de la terglobo venis en mian menson, ke starante surkape miaj antropomorfaj “supre” kaj “sube” relativigis rilate al la universo. Dum mia vojaĝo mi spertis ankaŭ ekzistade, ke la tero estas globo- kaj ne diskoforma, ĉar mi alveturis per alokcidenta flugo kaj reflugis el la orienta direkto. (Do mi bezonis ne nur kredi la globoformon de la tero, kion aliaj kaj la scienco asertas, sed ankaŭ per mia persona ekzistado mi spertis ĝin.)

La efikon de la jogo mi sentis jam post kelkaj semajnoj. Kvazaŭ mi estus fariĝinta tute alia homo. Mi trankviliĝis, kio pli frue incitis min, fariĝis negrava, mi fariĝis kvieta, ekvilibrata. (Ĉiokaze mi devas rimarkigi, ke tian vivmanieron mi povis permesi al mi, ĉar jam de longa tempo mi estis memstara kaj finance sendependa. Tion mi ne povus permesi al mi kiel inĝeniero, t.e. kiel averaĝa eŭropa civitano, kia mi antaŭe estis.)

Post ĉirkaŭ unu jaro mi fariĝis tute alia homo. Miaj korpo, animo kaj ankaŭ spirito ricevis tute novan kvaliton, kiu pli frue estis al mi tute nekonata, ĉar atingi ĝin en nia kultursfero estas preskaŭ nebla. Post tiaj spertoj kelkaj volas resti definitive en tia stato kaj elmigras al Malproksim-Oriento, ekz. Barato. Tio montras al la vero, kiu fone de ĉi tiu vivmaniero ekzistade kaŝiĝas.

Ke mi elektis ne ĉi tiun vojon, sed post mia restado en Malproksim-Oriento (Barato, Ĉinio kaj Japanio) tamen revenis al Eŭropo, ties kaŭzo estis ekskluzive la dialogika filozofio. Mi ne volis salti en alian flankon kaj al kutimiĝi, sed volis travivi kaj studi la *interecon*, ĉar ĉi tiu estas la stato, por kiu ni devas prepari nin en la futuro en la procezo de la tutmondiĝo.

En ĉi tiu elekto mia influis min persone la rememoro pri tiu provoka tezo mia, ke „Heidegger povas esti komprenita sole kaj nure dialogike”. Tio, kompreneble, ne plaĉis al multaj Heidegger’anoj. Ili opinis vidi en

Heidegger la pluevoluiginton de la germana idealismo, tute ignorante la turnon (*Kehre*) post lia “Sein und Zeit”⁵, kiam kun la tempo li elpaŝis en la liberan vaston⁶ okaze de siaj dialogoj kun la japanoj.

Ĉi tiun tezon mi provis ellabori en mia doktora disertaĵo en la ĉapitro pri Heidegger. Pli malfrue mi trovis konfirmon de ĉi mia tezo en la eseoj de Wilfried Hartling “Die Lehre des Buddha und Heidegger”⁷.

Nun sufiĉu tiom, ke tio havis gravan influon al mia plua spirita orientiĝo, t.e. kondukis al la relativiĝo de mia eŭropa klasika kulturo, konfirmis miajn ĝistiamajn spertojn ekde-infanaĝajn, la konsciigon de la dialogika efiko de la tri naciaj kulturoj kaj lingvoj. Ĉi mia vojo tra la t.n. nova pensmaniero, kiun mi lernis dialogike de Rosenzweig kaj esto-adekvate de Heidegger, helpis mian kompreneman rilatiĝon al aliaj kulturoj.

Klariĝis al mi ankaŭ, ke fremdan kulturon mi neniam kapablos tute alproprigi, nur en certa grado, kiun mi povas diversmaniere progresigi. Ekz. se mi okupiĝas pri jogo teorie kaj ankaŭ praktike, eĉ la vivmanieron mi alproprigas (kiom mi povas en ĉi tiu medio), mi povas atingi tian kognan konvinkon, laŭ kiu ankaŭ mia ĝisnuna denaska kulturo povas, kvankam nur relative, adaptiĝi al la universala.

Ĉe ni, en Eŭropo, laŭ la klasika scienca pensmaniero ni dividas la animon disde la korpo. Ĉi tiu dupartigo ja kontribuis al la disvolviĝo de la scienca ekkonprocezo, tamen tute disduigis la homon, kio kaŭzis korpajn kaj psikajn perturbojn, poste ankaŭ malsanojn. Pri tio ekatentis en Eŭropo nur la novaj sciencoj kaj la nova pensmaniero. En ĉi tiu okazo estas ĝojige, ke ankoraŭ plu ekzistas kulturoj (dank’ al Dio), ĉe kiuj ĉi tiu tuteco restis. Ekz. tiajn kulturojn oni povas aliri pere de jogo.

11. Spertoj pri la diverseco de la meditado kaj pensado

Ĝis kiam mia memoro kapablas retroiri, mi estis ĉiam „pensema” homo. Unue en negativa senco, kiam oni pikpuŝadis min dirante „faru, ne cerbumu tiom”. Krome mi sufiĉe longe lernis filozofion, poste an-

⁵ Esto kaj tempo

⁶ freie Weite

⁷ Instruoj de Budho kaj Heidegger

kaŭ studis ĝin, dum kio la ĉefa tasko estis ĝuste la pensado. Tial estis por mi io tute alia, kiam mi aŭdis, kaj poste ankaŭ spertis, ke tamen ne la pensado estas la plej grava ŝtupo de la homa estado, sed ekzistas io, kio ankaŭ ĝin superas, tamen restante ankoraŭ ene de la homa ekzistado: la meditado.

Ĝi apartenas jam al tute alia sfero, sed la homo ankaŭ tien povas penetri, se li konvene adaptas sin. Tie lia pensado povas ankaŭ halti. Eĉ, la tasko estas ĝuste tio, haltigi la pensadon, kiu estas plie perturba en la procezo de la unuiĝo kun la universala. Oni povas atingi ĉi tiun staton, se oni aplikas ne nur siajn animajn-spiritajn fortojn, sed enigas ankaŭ sian korpon. Tio okazas en la hatha-jogo en diversaj pozicioj de la korpo. Oni povus diri ankaŭ, ke tie povas reaperi tiu korpa-anima unueco, kiun, kun la disvolviĝo de la scienco, la pensado apartigis dum la tempopaso.

Sur la plej alta ŝtupo de la hatha-jogo aperas la *tantra*, en kiu la korpo estas estimata kiel “templo de Dio”. Enigante kaj aplikante ankaŭ la erotikan allogon, pere de diversaj korpaj ekzercoj kaj pozicioj atingebblas tiaj sentoj, impresoj kaj spertoj, kiuj ja apartenas al la homo, sed kiuj estis ekskluditaj el la homa vivo fare de la klasika moralo, tial en la klasikaj kulturoj ili tute ne povis aperi.

Mi partoprenis aranĝojn de *skay dancing*, ĉieldanco laŭ la programo de Margo Annand, disĉiplo de Osho en plurciklaj seminarioj, kie mi akiris la diplomon de *skay dancer*, ĉieldancisto. En grupaj kondut-psikologiaj seminarioj mi antaŭe jam plurfoje partoprenis, sed tian grupan komunuman senton, kiel dum ĉi tiuj renkontiĝoj, en tiel alta ŝtupo mi ankoraŭ nenie povis atingi.

Daŭran, intensan influon faris al mi la grupa terapio, ampleksigita trifoje al unu jaro, daŭranta tutajn semajnojn en grupo el 35-40 personoj, kio riĉigis min per tiaj homaj spertoj, kiajn nenie aliloke mi povus akiri. Fine de la seminario kaptis min emocio, kiun pli frue mi ankoraŭ neniam spertis, kaj ne nur mi, sed la plimulto el ni – en tia grado, ke en ĉi tiu granda grupo ni, viroj kaj virinoj, senescepte amis unu la alian. La disiĝo poste doloris, plorante disiris nia grupo.

Tute alian formon de meditado mi spertis en la munkena centro de

Surath-Sabdh-Joga. Tie, por tiel diri, oni tute ignoras la korpon, do ĝi ne havas gravan rolon dum la meditado, plie oni bezonas nur meti sin en komfortan pozicion. Oni devas ripetadi enpense la “sanktan vorton”, donitan de la guruo (ĉi-okaze de Rajinder Singh), kaj koncentri sin al punkto sur la frunto inter la okuloj kaj nur atendi, ke lumo aperu, kiu indikas la atingon de la alta stato de la meditado. (Mi devas konfesi, tiun staton mi neniam atingis, sed pluraj asertis, ke tio estas ebla.)

Ĉi tiu meditado estas aplikata en la siĥa religio, fondita de guruo Nanak. Mi ekatentis ĝin, ĉar post la unua impresio mi opiniis trovi provon de dialogika unuigo de religioj, serĉata de mi. Mi estis surprizita, ke ĉi tiu strebo okazis jam antaŭ proksimume kvincent jaroj en la sama tempo, kiam en Eŭropo la (ankaŭ ĝis tiam nur relativan) unuecon de la kristanismo ĝuste distaŭzis la protestantismo. Guruo Nanak volis unuigi islamon kaj hinduismen en unu nova religio. Kiom sensukcese, tion bedaŭrinde ni povas sperti en nia nuntempo.

Sed la siĥoj ĝis niaj tagoj ne rezignis sian ambicion interpacigi la diversajn religiojn. En tia spirito mi partoprenis en 2004 (?) en la barata Nov-Delhio la kongreson de mondreligioj, organizitan de Rajinder Singh. Kie kunvenis fideluloj de diversaj religioj el la tuta mondo kun la intenco meditadi en reciproka kompreno. Pli ol cent miloj da homoj ni marŝis sur la stratoj de Nov-Delhio. Ĉiu religia grupo tenis antaŭ si surskribon sur rubando kun la nomo de sia religio. Tio estis impona manifestado de la pacovolo, kiu tamen havis bedaŭrinde nenian influon al la konvinkigo de la regantaj religiaj gvidantoj.

Samtempe mi havis unikajn travivaĵojn en Barato. Ne senkiale oni diras, ke ĝi estas la origina lando de religioj. Multo estas tie, kio ne lasas sin priskribi, kion tie, surloke oni bezonas travivi, sperti, eĉ se nur mallonge, por vidi la diferencon al nia eŭropa vivmaniero. Al tio apartenas ankaŭ la tuta medio kun la karakteriza klimato, vivoritmo kaj la tolero de la malriĉeco fare de la popolo. Mi havis la impreson, ke mi aliris pli proksimen al la esto, esenco de la esto, al la universala.

Du semajnojn mi restadis en Sant Kirphal-Ashram, en tute internacia medio, kune kun partoprenantoj, apartenantaj al la plej diversaj religioj (pri kelkaj mi eĉ ne sciis, ke ili ekzistas). Kio al mi aparte mankis, estis, ke ni ne povis lingve interproksimiĝi. (En ĉi tiu tempo mi jam

sufiĉe bone parolis Esperanton, tial mi konscie sentis la mankon de la Lingvo Internacia.) Plej multaj eĉ la nivelon de mia malforta angla lingvaĵo ne atingis, tiel do restis nur la afablaj ridetoj kaj la komuna meditado kun pacema homa bonvolo, esperante renkontiĝi ĉe Dio en la meditado.

12. Joga farmo en Veszprémvarsány, poste loĝlokoj en Győr, Budapeŝto kaj Alsóörs

Kio apartenas al la kuriozaĵoj de la hazardo: en Barato mi konatiĝis kun mia najbaro el Győr, kiu loĝis nur du stratojn for de mi. Li partoprenis kun hungara grupo em la aranĝaĵo kaj mi kun munkenanoj. Poste ni volis realigi kune projekton: konstrui jogan farmon en Veszprémvarsány, kion, bedaŭrinde, ni devis baldaŭ rezigni.

Mi aĉetis malnovan biendomon, eble en la plej bela parto de la montaro Bakony, de altaĵo oni povis vidi tute ĝis la abatejo en Pannonhalma. Ni ricevis la konstrupermeson por la pretaj transkonstruaj planoj. Ankaŭ la elektro estis jam kondukita supren el la proksima valo per subtera kablo. Ni ankaŭ komencis la konstruadon, kiam estis ŝtelitaj la instrumentoj, ŝlositaj en la kelo. Tiam diris al mi mia hungaria kuzo Tomi: konstruu ĉi tie nenion, de tiel soleca domo oni ŝtelos eĉ la tegmenton. Li pravis. Poste ni spertis, kiel oni malaperigis eĉ la barilon ĉirkaŭ la parcelo.

Kiel mi venis al Győr, kiel mi fariĝis tiea loĝanto? Proksimiĝante al mia 50a vivojaro mi pensis, ke por miaj maljunulaj jaroj mi devus trovi ian restadejon ankaŭ en mia “hungara patrujo”. En Munkeno estis mia negoco jam bone progresanta, por tiel diri, ĝi jam preskaŭ de si mem funkciis, do restis al mi sufiĉa tempo por mia ĉefa okupiĝo, la filozofio.

Mi veturis al Budapeŝto, por trovi, t.e. aĉeti loĝejon. Estis la unuaj tagoj de la t.n. reĝimŝanĝo. Mi prenis hotelĉambron proksime al la Orienta Stacidomo, parkumis mian aŭton, freŝnovan Mercedes 200/D sur la strato. Sekvatage matene ĝi malaperis, estis ŝtelita. En la policejo oni traktis min rutinece, ŝajnis ke mia kazo ne estis unika, prefere ĉiutaga. Al miaj demandoj mi ricevis nur hezitajn respondojn. Mia assekuristo pagis nur post pli ol jaro, post pluraj enketadoj, ĉar oni ankaŭ

supozis, ke mi “kunlaboris” kun miaj sampatrujanoj, kaj tiel malaperis la aŭto, kiaj kazoj verŝajne plurfoje okazis. Tio trosufiĉis al mi en Budapeŝto.

Mi decidis aĉeti loĝejon en Győr, ankaŭ pro tio, ke mia onklino, fratino de mia patrino kaj du miaj kuzoj loĝis en la proksima Gönyű. Ĝi estis bela loĝejo en la centro proksime al la teatro. La distancon inter Munkeno kaj Győr oni povis traveturi facile sur aŭtovojo. Sed baldaŭ mi konvinkiĝis, ke ĝi estas eta urbo kompare kun Munkeno – kvankam mian infanaĝon mi pasigis (ĝis mia aĝo de 19 jaroj) same en eturbo, en Subotica –, kaj tial ĝi ne konvenis al mi. Mi vendis la loĝejon kaj aĉetis domon en Alsóörs ĉe la lago Balatono. Al ĉi tiu domo poste ligiĝis pluraj Esperanto-rilataj eventoj, pri kiuj mi ankoraŭ rakontos.

13. Esperanto influis min en la konsciigo de eventoj

Nun jam pli ol tridek jaroj okupas min Esperanto kun ĉiam pli da influo. Mia interesiĝo en ĉi tiu direkto komenciĝis post la formiĝo de mia internacieco, kiam d-ro Meros, prezidanto de la Societo de Mondohomoj (*Weltmenschen*) diris al mi: „Junulo, se vi estas tiom internaciema, ellernu Esperanton!” Kvankam poligloto, li ne parolis tiun ĉi lingvon, sed estas probable, ke li komprenis la spirite internacian signifon de Esperanto, kio, povas esti, konsciiĝis al li nur en lia pli maljuna aĝo. Post kiam li sciigis pri mia dialogika filozofia orientiĝo, li rekonis la eblon de mia plua evoluo. Li ĝuste opiniis.

Pri Esperanto mi aŭdis jam en mia infanaĝo. Kvankam la neceso de tiu ĉi lingvo montriĝas senpere ĝuste en tiuj regionoj kaj sociaj medioj, de kie mi venis, tiutempe mankis al mi la konscio pri tio, en kion mi naskiĝis (urbo Szabadka, Subotica, Theresienstadt).

Por transpasi la tie travivitajn kontraŭecojn, por ke konsciiĝu la neceso de evoluo, mi devis forlasi tiun medion, t.e. mi devis elpaŝi el ĝi. Ke la solvo de ĉi tiuj lokaj problemoj havas ne nur lokan signifon, sed tuttere mondan, nur multe poste konsciiĝis en mi. Por tio mi bezonis forlasi tiun medion, en kiu mi naskiĝis.

Unue mi iris en grandurbon, Beogradon, kie ĉiuj konataj, famaj politikistoj, ŝtatestroj de la tiama mondo faris viziton (ekz. de la stratorando

mi vidis Kennedy, Ĥruŝčov, Nehru, Nasser), por doni omaĝon al personeco (Josip Broz Tito), kiu batalis kontraŭ la naziismo por la internacia libereco.

La historiaj interligoj konsciiĝis en mi multe pli malfrue. Nur antaŭ nelonge mi komprenis tiun kuriozan eldiron, ke „Tito estis la lasta habsburga reganto”. Post kiam lia verko Jugoslavio kolapsis, montrigis, ke tiuj dialektikaj kontraŭaĵoj, sur kiuj la klasika Habsburga Monarĥio estis konstruita, ne plu estas aplikeblaj.

Ĉar la dialektiko reportas ĝuste tion, kion ĝi volas ĉesigi. Ne eblas dialektike neniigi ion en nia nuntempo (kiel la revoluciuloj de la pasinteco volis), ĉar tio estas nun ekzistade danĝera, sed transpasinte, kompreninte tion, pluevoluigi, t.e. apliki la novan dialogikan pensadon (kio konsciiĝis jam al pluraj famaj politikistoj, sed pluraj regantaj idiotoj ne konsentas pri tio kaj prefere malfruigas ĝin).

Ankaŭ mi naskiĝis en tia dialektiko, kiu kruele funkciis proksime al mia naskiĝloko, tial ĝia efiko ankaŭ ĉe mi ne forrestis. Tra Marx mi trovis Hegel, pere de kiu mi kredis trovi la laŭleĝan moviĝon de la mondo. Mi povas diri, ke de ĉi tie fontas mia filozofia interesiĝo, kiun komence mi ne povis kontentigi, ĉar de hejme mi estis motivita al stabila, serioza okupiĝo, kiu estis proksima ankaŭ al la ava tradicio, tial mi studis konstruan inĝenieradon.

Sed apenaŭ mi, por tiel diri, stariĝis proprapiede en la mondo, reaperis mia malnova inklino al la filozofio, kaj mi komencis okupiĝi pri la filozofio de Hegel, nun jam sur universitata nivelo. Sed tiam okazis io, kun kio komence mi tute ne kalkulis. Mi konatiĝis kun pensmaniero, kiu transpasas la antaŭan dialektikon. Ĝi estis la dialogika pensado, tra kiu la spertoj de miaj infanaĝaj travivaĵoj povis aperi en tute alia lumo, kaj pli malfrue mi trovis ankaŭ la konkretan aplikon de ĉi tiu maniero en Esperanto.

En Esperanto mi trovis la adekvatan esprimmanieron de la aktualeco de la nuntempa mondo. Ĉar Esperanto estas ne sole necesa internacia lingvo de nia nuntempo, sed ĝia spirita efiko pluiras ĝin ĉe la apliko de esprimoj. Kiel la plej novaj sociopsikologiaj ekkonoj pravas, la spirita influo komenciĝas jam ĉe la vortoj, frazoj kaj plupenetras ĝis la

lingvo, determinante la orientiĝon de la personeco kaj ĝian starpunkton al ĝia medio.

La vortoj, frazoj, lingvoj postlasas daŭran spiritan impreson en la personeco. Ĉi tiu efekto donas en nia nuntempo al Esperanto aktualan signifon en la procezo de la tutmondiĝo, helpante kompreni tion, kio okazas en la disvolviĝo de la mondo. En ĉi tiu procezo estas aparte grava ne la tradukado, kiu nun jam ankaŭ teknike estas solvebla, sed la kompreno en senperaj homaj interrilatoj.

Sed la senpereco, kiu en la diversaj (eĉ plej malgrandaj) lingvoj okazas, en la internacia mondo ne estas sufiĉa, por ke ni sentu nin hejmece en la nun dominantaj medioj. Esperanto helpas solvi kaj transponti la internacian fremdecon, por ke ni sentu nin hejmece ankaŭ en internacia medio. Kvankam nun jam sufiĉe bone ni scipovas komuniki internacie per dominanta nacia lingvo, sed tiuj, por kiuj ĝi ne estas gepatra lingvo, ankaŭ plu estas malavantaĝataj pro la dialektiko de la naciaj lingvoj.

Ĉi tiun fremdecon dissolvas ĉi tiu en sia esenco kaj estiĝo dialogika lingvo, kiu transpasinte la dialektikon de la klasikaj lingvoj, aplikas la dialogikon. Kiam la transpaso de la klasiko signifas ne ties neniigon, sed nur ĉerpon de instruo el ĝi, kaj post ĝia pluevoluigo transprenon de tio, kio estas aktuale necesa, kun forlaso de tio, kio ne plu utiligeblas aŭ eble fariĝis eĉ danĝera.

Sed mian internaciecon alportis ne Esperanto, sed la konsciiĝo de miaj ekzistadaj spertoj kondukis min al ĝi. En ĝi mi trovis la plej taŭgan manifestiĝon de la esprimmaniero. Tiel do unu kompletigas la alian, almenaŭ ĉe mi.

Pro tio, ke mi estas nek hungaro, nek germano, mi ne apartenas kaj ankaŭ ne volas aparteni al ajna nacio. Eble nur al Eŭropo, sed jam ankaŭ ĝi fariĝis por mi spirite malvasta. Mi volus estis kristano, malferma al dialogo, sed kiel ĉiam, ankaŭ nun tio estas tre malfacila. Ĉar eĉ la kristanoj ankoraŭ ne povis liberiĝi de la klasiko, de la daŭre plu multaj barbaraj kutimoj.

En tio helpis al mi Esperanto trovi „patrujon”, kie, en la societo de la t.n. esperantistoj mi sentas min plej hejmece. Kompreneble mi ne

volas tion idealiste troigi, ĉar ankaŭ inter ili funkcias (kelkfoje eĉ tro) konkuremo, ĵaluzo, envio kaj ceteraj psikaj mankoj. Pro kio kelkfoje oni nomas ilin ekstravagancaj, plej ofte tiuj, kiuj ne komprenas ilin, aŭ kiuj estas cementitaj en siaj kutimoj, el kiuj ili ne kapablas elvidi.

Inter ili mi trovis homojn, kiujn mi komprenis, kaj kiuj komprenis ankaŭ min, kion mi sentis manko en mia antaŭa medio. Ĉar la internaciemo, kvankam ĉio tutmondiĝas, estas ankoraŭ plu nur aparta kondutformo, kiu kiel ideologio estas tempoadekvate akceptita en vastaj rondoj, sed senpere nur de tre malmultaj travivata kaj sekvata. Ofte eĉ al tiuj mankas tia sinteno, kiuj disponante jam plurjarajn internaciajn spertojn, tamen ne kapablas transpasi la klasikan patriotismon kaj naciismon.

Ĉi tiu manko troveblas ofte, kompreneble, ankaŭ ĉe esperantistoj. Ĉi tiuj, miskomprenante la esencon de Esperanto, volas konigi sian propran nacian kulturon al la mondo, ne pensante pri tio, ke se ankaŭ aliaj volas tion fari, tio estas kvante simple neplenumebla. Kaj ili forgesas la dialogikan taskon de ĉi tiu lingvo, kiu volas konsekvence elkonduki ĝuste el la klasika individuismo kaj naciismo.

14. En AIS de San-Marino mi trovis profesorojn, komprenantajn la dialogikon

En esperantistaj rondoj mi trovis, preskaŭ hazarde, la konkretan neceson de la apliko de tiu filozofia pensado, pri kiu mi okupiĝis jam preskaŭ dek jarojn antaŭ mia esperantistiĝo kaj pri kiu mi skribis mian doktoriĝan disertacion. Eble mi povas konsideri donaco de la sorto, ke inter esperantistoj mi trafis personecojn, universitatajn profesorojn, kiuj kapablis kompreni mian jam pretan doktoriĝan laboron. Post kiam mi perdis bedaŭrinde prof. Fritz Leist en la Munkena Universitato, mi ne trovis profesoron (nun mi jam kuraĝe eldiras), kiu komprenus mian laboraĵon (la vojon de mia serĉado mi supre jam priskribis).

Apenaŭ kelkaj monatoj pasis post la Esperanto-kongreso en Brighton, kiu motivis mian decidon plu lerni Esperanton kaj plu okupiĝi pri ĝi, kiam mi trovis AIS, la Akademion Internacian de la Sciencoj en San-Marino.

AIS estis fondita en San-Marino en la jaro 1983. Ĝiaj fondintoj estas: Helmar Frank, Ivo Lapenna, Reinhard Selten, Fabrizio Pennacchietti, Humphrey Tonkin. Universitataj profesoroj, sciencistoj el diversaj landoj, do internacie.

Ĝi funkciis en pluraj ŝtatoj – Bulgario, Sud-Koreio, Ĉeĥio, Slovakio, Rumanio, Pollando, Germanio, Italio, Francio, Rusio, Svedio – kiel somera universitato.

En ĉiuj ĉi landoj (escepte Sud-Koreion) mi partoprenis ĝiajn aranĝojn en la sekvaj dek jaroj. Ni estis plej ofte kiel gastoj en la tieaj universitatoj. Mi ĉeestis komence kiel studento, poste ankaŭ lekciante kiel asociita docento (ADoc).

Mi havis la feliĉon povi esti en persona kontakto kun ĉiuj membroj fondintoj, escepte de Ivo Lapenna, kiu estis jam forpasinta, kiam en 1990 mi fariĝis membro de AIS. ASci-membro, do scienca adjunkto povas esti personoj kun supergrada diplomo. Post plenumo de certaj postuloj ili povas aspiri, pruvi sian ASci-kleriĝon ankaŭ en la lingvo Esperanto, t.e. agnoskigi sian titolon fare de AIS.

AIS estas fundamentita aparte sur tri principoj:

1. Manko de ĉiuj lingvaj kaj kulturaj antaŭjuĝoj. Ne nur ĉe sciencaj enhavoj, sed ankaŭ ĉe ties instruado estas aplikata la neŭtrala ILo, internacia lingvo Esperanto. La studantoj devas skribi sian finan laboraĵon en du lingvoj, en Esperanto kaj plej ofte en sia gepatra lingvo. Tio signifas kognan dulingvecon, t.e. transpason de la unulingva idioteco, ĉar ĝi instigas al la rekonsiderado de nocioj. Ĉi tie, ĉe AIS mi trovis konkretan ekzemplon por la dialogika pensado (pri kiu mi jam ankaŭ dek jarojn pli frue okupiĝis) lige kun Esperanto.

2. Plustudado en diversaj landoj, almenaŭ en la menciitaj someraj universitatoj, por kontakti ankaŭ aliajn kulturojn. Ankaŭ tio apartenas al la dialogika vivkoncepto, kiu elkondukas el la unuebena pensado kaj helpas ekkoni la faktan realecon.

3. Interfaka plustudado en diversaj fakultatoj, diversaj sciencobranĉoj. Tio apartenas eble al la plej alta ŝtupo de la dialogika principo. Kiam ne nur fakidiotoj estas produktataj en la universitatoj (kio bedaŭrinde estas la plej karakteriza kazo en la klasikaj naciaj universitatoj), sed

ankaŭ akademianoj, spertaj en diversaj sciencoj.

Ĉe mi troveblis ankaŭ ĉi tiu principo laŭ punkto 3, kio estas ne ĉiutagaĵo ĉe supergradaj diplomitoj. Pro eksteraj influoj mi nome studis unue inĝenieradon, kiun pli malfrue mi povis utiligi en mia racia filozofia pensado. Al kio aldoniĝis, jam de mia infanaĝo, mia trilingveco, kiu fariĝis poste bazo de mia internacieco kaj samtempe ekzistada kompreno de la dialogika metodo de mia pensado.

Tio, kompreneble, ne signifas, ke AIS devas klerigi ĉiosciajn geniulojn, sed ke ĝi ebligu eviti la danĝeron, ke se iu scias ion, li ne konsideru tion la plej grava akiraĵo de la mondo, ĉar tia koncepto jam kaŭzis multajn tragediojn en la historio. Gravas nur, ke konsciiĝu en ni la multflankeco de la mondo kaj la scio pri ĝi.

Ĉiuj ĉi tri punktoj apartenas neforpenseble al mia ĝistiam ĉefokupiĝo, la dialogika filozofio. Post tempo mi devis miri, ke ĉi tiu internacia grupo de akademianoj, konsistanta el profesoroj kaj scienculoj, ankoraŭ ne konsciiĝis eksplicite pri la filozofia kaj politika graveco, en nia tempo, de ĉi tiu dialogika pensado. Mi devas aldoni ankaŭ, ke ĉiuj tiuj, kiuj nomeblas AIS-membroj, konsentis pri ĉi tiuj bazaj principoj, do logike ili devis konsenti ankaŭ pri la dialogiko.

En la jaro 2006 AIS havis ĉ. 250 registritajn membrojn, inter ili la Nobel-premiito Reinhard Selten, kiu estis ankaŭ kunfondinto. 300 sciencistoj estis membroj de la *International Scientific Colleg*⁸ (ISK), kie estis baza kondiĉo de la membreco agnoski la principojn de Esperanto.

Tamen ŝajnas ne hazardo, ke en ĉi tiu rondo mi trovis personecojn, profesorojn, sciencistojn, progresemajn pensulojn, kiuj komprenis kaj kun intereso sekvis la aktualecon de la dialogika filozofio, kiu trovis en klasikaj universitataj medioj aŭ nekomprenon aŭ homojn, kiuj en la nova pensado rekonis danĝeron por sia kariero kaj rifuze kontraŭis ĝin.

15. Mi tradukis mian doktoran disertacion el la germana en Esperanton

⁸ Internacia Scienca Kolegio

Sub la spirita influo de AIS kaj Esperanto mi tradukis en Esperanton mian doktoran disertaĵon, jam pretverkitan en la germana lingvo en la munkena Universitato Ludoviko Maksimiliano. Mi prezentis ĝin dum prelego, post kiu mi ricevis proponon de certaj profesoroj defendi mian laboraĵon kaj habilitiĝi ĉe AIS.

En la sekvaj tri jaroj mi aŭskultis lekciojn, partoprenis seminariojn kaj praktikadojn en AIS en San-Marino ĉe profesoroj, kiuj lektiis en diversaj universitatoj de Eŭropo.

Ĉe AIS oni povas akiri akademian diplomon en tri ŝtupoj: 1. bakalaŭro (latine: *baccalaureatus scientiarum*) 2. magistro (latine: *magister scientiarum*) 3. doktoro (latine: *doctor scientiarum*).

Mi faris la preskribitajn ekzamenojn por ĉi tri ŝtupoj ĉe AIS por mia jam en la Munkena Universitato verkita doktora disertaĵo. Ĝia titolo estas:

Dialogik am Ende der Dialektik

*Befreiung des Denkens von der hegelschen Dialektik mit der Dialogik
Rosenzweigs und der nicht-dialektischen Ontologie Heideggers*⁹

Mian disertaĵon mi defendis antaŭ la sekvaj internaciaj profesoroj de AIS:

D-ro Helmuth Angstl, profesoro de filozofio en la Munkena Universitato kaj AIS, kiu entreprenis la patronadon pri mia doktoriĝa laboro. Plej ofte li faris lekciojn kaj praktikadojn pri konektoj inter la formala logiko kaj matematiko. Li estis la dekanato de la filozofia sektoro de AIS. Tiel do sub lia superrigardo kaj konsento ankaŭ mi povis prelegi en diversaj San-Marinaj Universitataj Sesioj (SUS), krom en diversaj universitatoj de la supre menciitaj landoj.

D-ro Ignat Bociort, filozofia profesoro de AIS, lekcianto en la Berlina (Germanio) kaj Timișoara (Rumanio) Universitatoj, kiu alprenis la respondecon de kunreferanto de mia doktoriĝa laboraĵo, post kiam li esprimis sian plaĉon pri la de mi prilaboritaj temoj. Liaj lekcioj povas

⁹ Dialogiko je la fino de dialektiko. Liberigo de la pensado de la hegela dialektiko per la dialogiko de Rosenzweig kaj la ne-dialektika ontologio de Heidegger.

esti klasitaj al la direkto de la klasika humanismo.

D-ro Fabrizio Pennacchietti, membro fondinto de AIS, orientscienca kaj semidologia profesoro de la Torina Universitato (Italio). Mi volas elstarigi lin ankaŭ inter tiuj, kiuj komprenis la gravecon de la dialogika pensado. Post kiam ni kune partoprenis plurajn sekciajn kunvenojn, kreiĝis bona kolega rilato inter ni.

D-ro Carlo Minnaja, matematikisto kaj historiisto, profesoro de la Padova Universitato kaj AIS. Li estas tiu alia profesoro el Italio, kies prelega stilo ravis min per sia majstra esperanta retoriko.

D-ro Helmar Frank, kibernetikisto, matematikisto, filozofo, profesoro de la Paderborna kaj Berlina Universitatoj, ĉefa fondinto de AIS, ĝia dekanoo prezidanto, kaj direblas, ĝia ĉefa motoro. La mankon pro lia perdo la universitato ĝis nun ne povis tute kompensi.

Frank akceptis komence mian Hegel-kritikon (kiun mi transprenis de Rosenzweig) skeptike, eĉ li asertis, ke li estas hegelano, sekve ne konsentas kun mi. Nur pli malfrue, post kiam pli bone li ekkonis min, li komencis demokrate akcepti min. Poste li nomumis min afergvidanto de la konstruo de la planata Komarna Universitato, kaj mi fariĝis kun lia rekomendo membro de la estraro de la tradicia Eŭropa Klubo (je kies iniciato AIS estis fondita).

Krome la sekvaj AIS-profesoroj el diversaj landoj kaj universitatoj faris al mi influon en la pluevoluigo de miaj ĝistiamaj scio kaj internacieco:

D-ro Eva Polakova, kibernetika profesoro de la Bratislava Universitato (Slovakio); d-ro Horst Holdgrün, matematikisto, profesoro de AIS kaj la Gotingena Universitato (Germanio); d-ro Hans-Dietrich Quednau, profesoro de AIS kaj la Munkena Universitato (Germanio); d-ro Reinhard Fössmeier, kibernetikisto, profesoro de AIS kaj la Munkena Universitato (Germanio); prof. d-ro Tyburcjusz Tyblewski, sociopsikologo; Jelena Gora (Pollando), d-ro Günther Lobin, pedagogo, profesoro de AIS kaj la Paderborna Universitato (Germanio); d-ro Kjell Gunar Sellin, filozofo (Danio, Norvegio), profesoro de AIS; d-ro Reinhard Selten, matematikisto, Nobel-premiita ludoteoriisto, profesoro de AIS kaj la Bonna Universitato (Germanio); prof. Sergej Kuz-

necov, interlingvisto, profesoro de AIS kaj la Moskva Universitato (Rusio); d-ro Hans Michael Maitzen, astronomo, profesoro de AIS kaj la Viena Universitato (Aŭstrio), post prof. Frank li transprenis la estradon de AIS, antaŭ kiam li transdonis ĝin al prof. d-ro Amri Wandel.

16. AIS transpasis la limojn de la klasikaj universitatoj

Pri AIS oni povas diri, ke ĝi transpasis la klasikajn universitatojn. Ĝi puŝiĝis plurflanke al kontraŭstaro. Ĝis nun ĝi povis plene validiĝi nek en San-Marino, nek en Komárno, nek en Sibiu, nek en Karlovac, nek en Bydgoszcz, nek en Timișoara, nek en Moskvo. Por menciigi nur tiujn universitatojn, kie ĝi provis trovi al si lokon. Ne nur sekve de nekompreneo; la stabo de klasikaj pedagogoj eĉ ĝian komprenon mem ne povis toleri, ĉi tiu ja vidis en ĝi tian konkurencon, kiu povus endanĝerigi ilian ĝisnunan dominantan pozicion.

La spirita fono de ĉi tiu rifuzo politike kompareblas kun la tragedio de la Habsburga Monarĥio. Ĝi estis donita en la fakto, ke la monarĥio ne rekonis la signifon de la dialogeco, radikita en la pluretna socio. Tiuj, kiuj rekonis ĝin, forlasis la landon, baraktantan en la ĥaoso de la secesio, kaj elmigris ĉefe al Usono, por, utiliginte la ĉi tie akiritajn spertojn, entrepreni rolon en la konstruo de nova socio, adekvata al la modernaj tempoj, kie por la transpaso de la klasiko estis certigita libera evoluo.

La rezulton, mi kredas, ne necesas aparte pruvi, sufiĉas nur elstarigi la rezultojn de la scienco en la lastaj kvindek ĝis cent jaroj. Nur skize, elstarigante la kazojn de la transpaso de la klasiko: demokratio estas la unua transpaso en la nova tempo, kiu komenciĝas en la socio. Poste sekvas la sciencaj inventoj, en la fiziko ekz. la relativec- kaj kvantumteorio, nanoteknologio, komputotekniko ktp, ktp, sen kiuj la nuna moderna vivo estus neimagebla. Ĉiuj ĉi metodoj rekondukeblas al la transpaso de la klasiko. Kion la regantoj klasikece profitas, sed en sia pensmaniero estas nekapablaj konsekvence adapti.

Simila estas la kazo de AIS. Internaciaj profesoroj, sciencaj personecoj, spirite – por tiel diri – pluevoluintaj trans la klasiko, volis fondi tian institucion, kie la plua disvolvo de la nova pensado povus ricevi liberan spacon. Konkreta provo estis la lanĉo de la Libera Eŭropa Uni-

versitato *Akademia Kelementia Komárno* (Slovakio), kiu estus kunligita koncerne siajn programon kaj profesorojn kun la Universitato Lucian Blaga en Sibiu (Rumanio).

En la centro de Komárno la parcelo estis jam aĉetita (mi fariĝis la afergvidanto) en la espero, ke tie ricevos “jure kaj mure” lokon la universitato de ĉi tiu nova pensmaniero. Ankaŭ la konstruprojekto estis jam ellaborita de loka slovakia inĝeniera buroo, ĝi ricevis la konstrupermeson de la urbo, sed la slovakaj ŝtataj instancoj ne donis liberan vojon al la plua realigo. Tiel oni devis ĉesigi la ĝistiamajn laborojn kaj plurajn planojn rilate al la malfermo de ĉi novspeca universitato. Ĝi ja evidente ne kongruis kun la klasika ŝtata sistemo de instruado.

Miaj spertoj pri AIS kaj Esperanto direktis mian atenton ĉiam pli al la politiko en la konvinkiĝo, ke ĉi tiu ŝtoniĝinta, kutimiĝinta stato povas esti lozigita nur per pli vasta socia influo, do politike. Tiam konsciiĝis en mi, kiel granda politika forto latentas en Esperanto. Kiu forto unuflanke ne estis sufiĉe ekspluatata de la esperantistoj, kaj aliflanke tie, kie ĝi estis rekonita, elvokis plie kontraŭajn reagojn.

Tiam mi ekatentis la striktan ligan inter Esperanto kaj la historio spertebla, de kiam ĉi tiu movado entute ekzistas. Ĝia geneza tempo koincidas kun vasta spirita disvolviĝo. La malnova klasikregima pensado kolapsis, kiu kaŭzis secesian haoson plej multe en Mez-Eŭropo, kie anstataŭ kunprogresi kun la evoluo, oni volis malhelpi ĝin, kio kondukis al la katastrofo de la du militoj.

Samtempe aperis diversaj solvoprovvoj: naciismo, naziismo, komunismo, por nomi nur la plej popularajn movadojn. Sed fone estiĝis pluraj, spirite kaj science progresemaĵoj tendencoj, kiuj tamen ne povis atingi vastan, popularan influon. Tiel ekmarŝis la popolo, parte propravole, al la katastrofo. Kvankam fone jam aperis antaŭvidema averto, eĉ kelkfoje ankaŭ solvopropoj, al kiuj apartenis ankaŭ Esperanto.

La solvopropoj, formitaj dialektike el kontraŭaĵoj, fiaskis senescepte. Kio restis, tio adaptiĝis al la historia disvolviĝo de la tempo, t.e. ne provis perforti, sed “serioze konsideri la tempon”. Pri kies graveco kelkaj novaj pensuloj jam ĝustatempe atentigis.

Revoluciaj sturmoj trafis nur en sakstratojn, de kie ne kondukis elvojo,

kaj oni deviĝis deiri denove el la antaŭsturma stato, konstrui tion, kio pli frue estis ruinigita, por ke la evoluo povu pludaŭri en homa maniero, transpasinte tion, kio estis forlasenda. Tiel manifestiĝis la fino de la dialektiko post la spertoj de la militaj katastrofoj. En tiu procezo, kiam la grandpotencoj venis en ekvilibran, sendecidan situacion, ne povante plene apliki la persvadan dialektikon, kaj se ili volis plu moviĝi, ili estis devigitaj apliki la dialogikon.

17. Montriĝis la neceso de la libereco de l' nova pensado

Tiam montriĝis, unuafoje en la internacia politiko, la neceso de la dialogiko, kio tute ŝanĝis la ĝistiaman klasikan politikon, influante la sociajn rilatojn, la ĝis tiam memkompreneblajn normojn, devigante la tutan ĝistiaman klasikan etikon al rekonsideroj.

La influo de la libereco de la nova pensado efikis en la tuta mondo, kaj en la plua disvolviĝo de la politiko ĝi tute ŝanĝos la donitan internacian mondordon. Sen elpafo de kuglo kraŝos la muroj, dividantaj la popolojn, disfalos la tiranecaj reĝimoj. Bedaŭrinde ne pro tio, ke la homaro ĝenerale plisaĝiĝis, sed ĉar tio restis la sola alternativo, se ĝi volas pluekzisti sur nia planedo. Kelkaj antaŭvidemaj politikistoj feliĉe rekonis tion.

Mi persone travivis la plej gravajn periodojn de ĉi tiu evoluo. Kiel junulo mi havis la feliĉon aparteni al lando, kie ĉi tiu libereco jam iel-tiel ekburĝonis, kvankam la influo de la idealismo ankoraŭ restis tre forta. Mi ne bezonis eskapi, mi ne bezonis timi esti mortpafita ĉe la landlimo, sed povis libere trafiki kun vizo al landoj ambaŭflanke de la “fera kurteno”.

Unika travivaĵo estis por mi sperti en eksterlando post tia reĝimo tiun socian liberecon, kie la demokratio senpere funkciis, ne nur skribita sur papero kiel ideologio. En Malproksim-Oriento furiozis ĝuste la vjetnamia milito. Sed ne tio estis aparta, eĉ ne la krueleco de la napalmaj bomboj de Usono; similaĵoj furiozas bedaŭrinde eĉ en nia nuntempo en aliaj formoj, aliloke. Sed la liberaj reagoj kontraŭ la milito. La demokratia protestmovado en la sama ŝtato, kiu eksplodigis ĉi tiun militon.

Plej forte impresis min la hipia muzikalo *Hair*, komponita de Gald Mac Dermont, pli frue preĝeja orgenisto. Mi spektis ĝin unuafoje en Munkeno en 1968, kaj poste en la sekvaj jaroj plurfoje sur diversaj scenejoj de la mondo. Ĝi tute ŝanĝis mian ĝistiaman etikan sintenon. Ĝis la hodiaŭa tago sonas en miaj oreloj la melodio de *Aquarius*, kune kun la teksto. Poste formiĝis en mi tute alia opinio pri la povraj “hero-oj”, ol kian oni altrudis al mi en la lernejo.

Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke mia pensmaniero, post miaj filozofiaj studoj, disvolviĝos en ĉi tiu direkto, kaj grave influos ankaŭ mian pli malfruan politikan orientiĝon. Poste ĝi akordiĝis kun la filozofio de la libereco, kiun mi lernis ankoraŭ ĉe Max Müller, poste ĝi plene esprimiĝis en mia dialogika pensado, apartenanta al mia plua laboraĵo.

Se nun mi skize retrorigardas al ĉi tiu evoluo mia, poste al la stato, kiu ricevis lokon en mia konscio, kun aparta kontento mi konstatas, ke tio estis ne nur mia subjektiva evoluo, sed mi ankaŭ iris kaj iras sur sama vojo kaj en la sama direkto, kie kaj al kiu la historio, la internacia politiko, kaj se esprimi filozofie, al la direkto de la adekvatiĝo de la esto, t.e. adaptiĝante al la esto.

Kompreneble ĉiam kun la kondiĉo, kiu estas donacita al nia homa libereco, do ke ni libere povas elekti, ĉu ni volas ekzisti aŭ ne. Jen tio estis en nia nuno la decida alternativo, kiu determinas la aktualan internacian politikon kaj efikas ankaŭ al la pluevoluo de la socio de la mondo.

Al ĉi tiuj grandaj paŝoj, al la ekzistado de mia esto la loko, kie mi naskiĝis, de kie originas mia plurlingveco, kondukanta min konsekvence al mia internaciemo. Ĉi tiu stato konsciiĝis en mi dum la studado de la dialogika filozofio, kiu poste kondukis min al Esperanto. Post ĉio mi ekkonis la necesan evoluon de la internacia politiko en direkto al la nova pensado. Pri kiu Gorbaĉov, prezidento de monda potenco eksplisite parolis, poste verkis libron kaj kiun li ankaŭ aplikis en sia politiko.

18. Gorbaĉov la plej potenca aplikanto de la nova pensado en la plej nova historio

Al Gorbaĉov ligas min (eble mi povus tiel diri) kvazaŭ mistika rilato post la unuopaj, por mi memorindaj eventoj. Li estis tiu, kiu konkrete aplikis tiun pensmanieron, pri kiu mi verkis mian doktoran disertaĵon, per kiu li enkondukis la periodon de nova tempo en la historio de la mondo. Estas tamen kurioza apartaĵo, ke ĉi tiun novan pensadon, kiu konsciiĝis por mi, kaj pri kiu li parolis, nur tre malmultaj komprenis, kvankam en nia nuno ĝi fariĝis necesa. Tial mi vidas en li praviganton, de la plej alta ŝtupo, de mia pensmaniero. Super ĉio ĉi ŝvebas en mia memoro la dufoja persona renkontiĝo tute proksima kun li.

La unuan fojon mi havis tute hazarde la okazon vidi lin kaj mansvingi al li de tre proksime en Nov-Jorko, kiam li estis vizitanta Bush, la pli maljunan. Mi, kiel vizitanta turisto ĵus eliris el *World Trade Center*, kiam li elaŭtiĝis, kaj ekiris kun sia akompanantaro tien, de kie mi elvenis.

Mia duafoja renkontiĝo estis jam multe pli riĉenhava. Mi havis la okazon ne nur mansvingi al li, sed li ankaŭ manprenis kun ni okaze de grupa renkontiĝo de AIS-anoj en Moskvo. Eĉ, ĉe la tablo, kie ni sidis kaj aŭskultis lian prelegon, mi povis plurfoje interŝanĝi rigardojn kun li. Ni estis dekkelkaj kun la AIS-prezidanto prof. Frank kaj kun kelkaj rusaj AIS-membroj, kiuj organizis la renkontiĝon. Li prelegis al ni kiel ordinara AIS-profesoro, kiel estas skribite en la listo de la profesoroj.

Mi supozas certa la efikon de la nova pensado al lia simpatio al Esperanto kaj sekve al AIS. Kio estas aparte grava al mi, se mi konsideras tian formon de la filozofia pensado, kiu ĝis la nuna tago okupas min, kaj kiun mi konsideras vivnecesa, se ni volas konservi niajn viveblojn sur ĉi tiu planedo. Tial mi opinias, ke kion li faris, tio levas lin inter la plej gravajn homojn de la plej nova historio, kion ĝis nun bedaŭrinde nur tre malmultaj rekonis.

Rezulte de miaj ĝisnunaj spertoj kaj studoj mi akiris tiun punkton en mia spirita evoluo, kiu montriĝis en la historio de la scienco, sed kion ĝis nun ankoraŭ nur tre malmultaj komprenis. Eŭropece oni povas nomi tion transpaso de la klasiko aŭ nova pensmaniero.

Ĝia efiko sentebblas en la disvolviĝo de ĉiuj sciencoj, sur la kampo de la natursciencoj kaj teknikaj sciencoj, kiel ankaŭ sur tiu de la spiritaj

sciencoj. La transpaso de la klasiko apartenas efektive al la eŭropa kultursfero, ekde ĝia estiĝo en la antikveco tra la kristanismo ĝis la hodiaŭaj tagoj.

Ĝi ricevis novan inspiron (jam kelkajn jarcentojn pli frue) de la artoj. En la pentroarto, skulpturo, literaturo ktp, por nur mencii la artojn, kie okazis la ĝenerale komprenebla transpaso de la klasiko. Ĝi daŭris plu en la diversaj sciencoj. Por kompreni la nocion transpaso menciendas kiel ekzemplo la relativecteorio, poste la kvantumteorio en la fiziko, la diversaj revolucioj en la socia realaĵo, poste la nova, dialogika maniero de la pensado en la filozofio, al kio ankaŭ Esperanto apartenas.

Gravas emfazi, ke por la kompreno de ĉiuj ĉi interrilatoj necesas certa filozofia preteco. Ĉar la filozofio estas tiu pensmaniero, kie oni povas kaj devas pensi en tempe pli grandaj paŝoj. Ĉar nuntempe la sciencoj specialiĝas prefere en profundon, fariĝis necesa ĝenerala trarigardo, t.e. kompreno de la rilatoj inter la diversaj sciencoj. En la vulgara lingvo oni povus tion esprimi tiel, ke ĉi tie utilas la filozofio en la „grand-trajta” kompreno de la mondo.

Ĉi tiu evoluo montriĝis konkrete en la politiko. Efektive ne pro tio, ke ni fariĝis pli saĝaj, sed ĉar ni atingis limon, kies transpaŝo endanĝerigas nian ekzistadon. Ĉi tie denove ni devas mencii Gorbaĉov, kiu rekonis ĉi tiun kritikan situacion, kaj per la apliko de la nova pensado ŝanĝis la sistemon de la mondpolitiko. Se konkludi el tio, ne estas hazarde, ke li simpatias al Esperanto kaj AIS.

19. Post la transpaso de la klasiko turno al la dialogika pensado

Ĉi tiu punkto, t.e. turno (*Wende*) al la dialogika filozofio okazis ĉe mi post la konkretaj spertoj pri Esperanto, kio kondukis min al la politiko kaj senpere al la internacia politika movado EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto).

Mi devas aldoni, ke mi iris sur spiritan kampon, kie tre malmultaj trafikis, ĉar multaj ne kapablas orientiĝi tie, kaj kiuj iom estas informitaj, prefere volas prokrasti ties disvolviĝon, vidante endanĝerigatan nunan klasikan potencon. Al ĉi tiu grupo apartenas multaj ekde

naciemaj politikistoj ĝis profesoroj, laborantaj en naciaj universitatoj. Kiu volas transpaŝi ĉi tiujn limojn, trafiĝas kontraŭ diversajn barojn (vidu la ekzemplon de CEU, Centr-Eŭropa Universitato en Budapeŝto aŭ la provon de AIS en Komárno).

Ĉi tiu kunmetita nocio “transpaso de la klasiko” estas nekonata en tia formo, sed post mallonga klarigo ĝi povas fariĝi tute komprenebla, precipe se apogita de ekzemploj el la artoj aŭ sciencoj. Mi uzas volonte ĉi tiun esprimon, ĉar ĝi esprimas en nia nuno kun antropomorfa plastikeco vivnecesan ŝanĝopaŝon en la evoluo.

Kiom ajn nekutime estas eĉ niatage okupiĝi pri la historio de la sciencoj, kelkaj scienculoj jam en la 19a jarcento komencis ĝin, pleje en sia propra fako. En kelkaj t.n. malgrandaj fakultatoj de kelkaj universitatoj nun oni jam povas enskribiĝi ankaŭ por “la historio de la sciencoj”. Kompreneble, ĝi simile utiligeblas post la fino de la studoj kiel la filozofio. La enhavo de la studo staras tre proksime al tiu de la historifilozofio. Kio nun nove aldoniĝis, estas la interfakeco, kiu ne troveblis en tia formo en la klasika filozofio.

Kaj ĝuste ĉi tiu interfakeco estas tio, kio bezonatas por la transpaso de la klasiko. Kiam la sciencisto elpaŝas kun sia scio el sia rutina unuflankeco, en kiu la klasiko limigis lin per sia „altklasa” superemo. Ĉi tiu memsufiĉo montriĝis en la plej diversaj sferoj de la esto, malhelpante la pluevoluton (ekz. per la denaskaj privilegioj de la klasdiferencoj en la socio).

El la *alio*, se ĝia manifestiĝo ne estas malhelpata, sed permesita, oni povas aldoni ion al la *sio*, kaj relativigi ĝin en la ekzistanta rilato. La plej efikaj sukcesoj de la novaj inventoj aperas pruveble en la intersfero. Ne estas hazarda en la lastaj tempoj la divido de la unuopaj Nobel-premioj inter pluraj sciencistoj el diversaj sciencobranĉoj.

Kaj kio por mi aparte interesa estas: ĉi tiu *inter-eca* sfero estas la loko, al kiu ankaŭ Esperanto fakte kaj esence apartenas. Esperanto estis kreita de Zamenhof tiel, ke li komponis ĝin “arte” el diversaj lingvoj. Tial ankaŭ la nuna uzo de ĉi tiu lingvo estas taŭga por helpi la reciprokan komprenon de la popoloj, parolantaj diversajn lingvojn.

Kaj por ke ĝi estu konvene aplikata, necesas unue la dialogika pens-

ado, t.e. nova pensmaniero, kiu, transpasinte la persvadan hierarĥion de la klasika dialektiko, konsideras ĉiujn lingvojn kaj popolojn dialogike samrangaj. Ĉi tie renkontiĝas en Esperanto la transpaso de la klasiko kun la nova dialogika pensmaniero.

Kvankam dialogiko ludis ĉiam gravan rolon en mia politika pensmaniero (kion pruvas mia preskaŭ 15-jara aktiva membreco en la partio FDP), okupiĝi pri ĝi pli intense motivis min mia rilato al Esperanto. Post kelkjara pliriĉiĝo de miaj konoj pri ĝi mi rimarkis, ke la bremsado de la rekono de Esperanto klarigeblas per politikaj motivoj. Tiam fulmis en mi la penso, ke oni devus aktive kaj politike fari ion kontraŭe.

20. Naskiĝis la ideo fondi esperantan politikan partion

Mi ankoraŭ klare memoras, ke babilante dum hejmeniro post kunveno en la munkena klubo kun miaj du amikoj esperantistoj Fritz Hilpert kaj Alfred Schubert, mi menciis, ke “ni devus ion fari politike por Esperanto”. Ili ambaŭ reagis konsente. Tiam ni decidis iniciati aktivadon en politika direkto por Esperanto. Ankaŭ pluraj membroj de la Esperanto-klubo aprobis nian intencon kaj stariĝis helpeme al nia flanko.

Tiel ni komencis ellabori – unue nur ni tri – projekton por la fondo de politika Esperanto-partio. Post kelkmonata laboro, en plurfojaj priparoloj ni konsistigis programon, kiun ni ĉiuj tri akceptis per nia subskribo. La novan partion ni volis nomi IEP, Internacia Esperanto-Partio.

Miaj sekvaj vivojaroj (nun jam antaŭ pli ol 20 jaroj) estis motivataj esence de la politika signifo de Esperanto, kaj surbaze de ĝi, de la dialogika pensado. En ĉi tiu konsisto realiĝis la apliko de miaj ĝistiamaj spertoj, studado kaj scio.

Unuaj pensoj pri la fondo de memstara Esperanto-partio:

Kiuj estas tiuj principoj, kiujn apogus ne nur Esperanto-parolantoj, sed ankaŭ aliaj civitanoj? Ene kaj pere de tiu partio estus pli facile ankaŭ disvastigi la Internacian Lingvon. Ne postkuri partiojn, por ke ili akceptu nin, sed mem fondi, je la spirita bazo, pri kiu ne nur la esperantistoj konsentas, sed ankaŭ aliaj, kiuj tamen ne povas, konas aŭ volas lerni la lingvon. Niaj plej gravaj principoj estu: internacieco,

dialogikeco, homaj rajtoj kaj demokratio. Nia partio estu tiu de la internacia dialogo per la nova pensado.

Kiel bone aplikeblaj estis ĉi tiuj pensoj, montriĝis pli malfrue en la posta disvolviĝo kaj evoluo de EDE. Ekzemple en la germania EDE la tiama prezidanto Manuel Cebulla ne parolis Esperanton, sed entuziasme gvidis la elektokampanjon por la EU-parlamentaj balotoj en la jaro 2009. Kiam per ĉi tiu elano ni ricevis pli ol mil subskribojn por EDE-GE ol estis necese.

La formiĝo de la politika pensado pri Esperanto komenciĝis fakte ankoraŭ antaŭ la ellaborado de la programo de IEP. Komence de la jaro 2000, do ĉe ekiro de la tria jarmilo, t.e. 21a jarcento ni kunvenis unuafoje en Alsóörs, por paroli kaj poste diskuti pri tio, ĉu valoras aŭ rekomendindas okupiĝi pri Esperanto-politiko. La opinioj por kaj kontraŭ ankaŭ tiam estis tute diversaj (kaj restis ĝis la hodiaŭa tago). Mi estis ĉiam flanke de la por-uloj, ĉar mi vidis esence politikan obstaklon en la subpremado de Esperanto.

Por majo de la jaro 2000 mi invitis en la nomo de la Esperanto-klubo de Munkeno politike aktivajn aŭ interesatajn esperantistojn por klariga diskuto en Alsóörs. Al ni, kvin munkenanoj aliĝis pli granda esperantista grupo el Pécs, tiel do ni estis ĉirkaŭ dudek, elĉerpinte la dormeblajn en la domo. Dum du tagoj ni diskutis politikajn problemojn, kernantajn Esperanton. La rezulto de nia kunveno motivis la ellaboradon de la programo de la posta IEP.

Kun la intenco fondi politikan Esperanto-partion ni disvastigis tra unu jaro dum diversaj Esperanto-renkontiĝoj la pensojn laŭ la programo de IEP. Poste surprizite ni legis en Interreto, ke la francoj jam fondis partion, kiun ili nomis Eŭropo-Demokratio-Esperanto, do EDE, kaj ke ili volas partopreni la sekvajn EU-parlamentajn elektojn en la jaro 2004.

Ni konsultis ilian programon kaj povis legi, ke ĝi en tre multaj punktoj identas kun la pensoj de IEP. Tiam la estraro de IEP decidis aliĝi al EDE. La rezolucion pri tio ni fiksas dum nia kunveno en januaro de 2004 en la sekva protokolo:

Je la 31a januaro 2004 kunvenis la fondintoj de IEP (Internacia Es-

peranto Partio): Eugen Macko, Alfred Schubert, Fritz Hilpert en Munkeno, “Eine Welthaus”, Schwanthalerstr. de 17-19 h kaj decidis la sekvantan rezolucion:

Nia societo kunlaboras nun jam ekde la 7-a de majo 2002 en la intenco fondi Esperanto-partion.

Niajn strebojn ni prezentis dum kelkaj Esperanto-aranĝoj. Antaŭ kelkaj tagoj ni ĝoje konstatis, ke en Strasburgo jam estas fondita Esperanto-partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE), kio estis sekvita de grupo el Emden, kun tre similaj principoj kiel de ni ellaboritaj por IEP.

Pro tio ni decidis ĉesigi nian ĝisnunan intencon fondi Esperanto-partion kaj oferti niajn ĝis nun evoluintajn pensajn kaj spiritajn spertojn por la EDE-partio kaj per kunigita forto organizi la kampanjon por la eŭropaj balotoj je la 13a junio 2004.

München, 31.01.2004.

21. En 2004 ni komencis nian kunlaboron kun EDE

Kvankam ni tuj komencis kolekti – kun la komuna forto de pluraj junaj esperantistoj el la nord-germania Emden – la necesajn kvar mil subskribojn por la EU-balotoj, por povi eniri la elektoliston, sed la tempo, apenaŭ tri monatoj, estis fine tro mallonga, por havi sukceson, do ni ne povis kolekti la postulatan nombron da subskriboj. Tial ni ne povis partopreni la elektojn.

La junaj esperantistoj el Emden komencis la laboron kun granda elano, kaj eĉ pli grandaj esperoj. Kelkaj jam revparolis pri tio, kiel grandan honorarion ili ricevos kiel parlamentaj deputitoj. Post la eventoj ili tre seniluziiĝis. Pli multaj el ili ankaŭ malaperis el la ĉirkaŭaĵo de EDE. Ni restis malmultaj, plejparte pli spertaj, kiuj daŭrigis la konstruan laboron de la politika partio.

Post la elektoj sekvis kelkaj analizoj, restintaj sur amatora nivelo, kaj dum du jaroj ĉesis ĉia aktivado ĉe la germania EDE. Kvankam la franca EDE povis partopreni la elektojn – ĉe ili estas tute aliaj kondiĉoj por plenumi la kriteriojn –, ili same restis nekontentaj pri la rezultoj. Ankaŭ ĉe ili silentiĝis la agado por kelkaj jaroj.

En Munkeno ni estis kelkaj, kiuj de-temp-al-tempe afiŝis en la ret-forumo de EDE notojn, rekomendojn, kaj provis elvoki politikajn diskutojn. Ankaŭ plu restis instigaj la renkontiĝoj printempe de ĉiu jaro en Alsóörs ĉe Balatono, kie la diskutoj tuŝis ĝenerale Esperanton kaj aparte la politikajn rilatojn. Kun la tempo ĉi tiuj renkontiĝoj fariĝis unu el la motoroj de la internacia EDE. Ĉi tie kunvenis plurfoje la estraranoj de la franca kaj germana EDE, kiuj donis impulsojn por la fondo de la hungara, poste pola EDE.

Post kelkara paŭzo kaj preskaŭsilento per la refondo de la germana EDE ni sukcesis revigligi trarete la interesiĝon, eĉ membrigi kelkajn novvenintojn. La 5an de junio 2008 kunvenis en Wiesbaden la refondintoj: Ulrich Matthias, Manuel Cebulla, Eugen Macko, Konrad Grammelspacher, Alfred Schubert, Monika F. Reuss, Mariane Buchholz-Maurer.

Per tio komenciĝis la preparaj laboroj en EDE-GE por la EU-parlamentaj elektoj por la jaro 2009. Nun ni havis unu jaron por plenumi la necesajn farendojn, postulatajn por la partopreno de la partio en la politikaj elektoj.

Unue ni devis varbi en esperantistaj rondoj, kio ne estis afero simpla, ĉar ĉiam denove ni trafis kontraŭstaron pro tio, ke ni entute volis disvastigi Esperanton politike. Mi faris plurajn prelegojn, kie mi provis pruvi, ke la neprogreso de Esperanto rekondukeblas al politikaj kaŭzoj. La celo estis ne nur superi aŭ almenaŭ malpliigi la objetojn, sed ni bezonis ankaŭ aktivan helpon.

Por ke partio povu partopreni la eŭropajn elektojn en Germanio, necesas kvar mil subskriboj (kiun nombron en 2004 ni ankoraŭ ne sukcesis atingi). Por la kolekto de la subskriboj ni devis aktivigi esperantistojn aŭ homojn, kiuj konsentis pri niaj celoj. En la germaniaj Esperanto-kluboj iom post iom ni sukcesis trovi tiajn, kiuj kunlaboris kun ni kaj kolektis subskribojn.

Tra la reto ni kunlaboris kun la franca EDE, eĉ dum personaj renkontiĝoj kun francaj, germanaj, poste hungaraj kaj politike interesataj esperantistoj en Alsóörs, ni povis harmoniigi niajn programojn, por ke sur internacia bazo la realigo de nia komuna celo en la du landoj en la

2009-jara EU-parlamentaj elektoj okazu en akordo kaj konkordo.

En majo de 2008 renkontiĝis en Alsóörs la francaj kaj germanaj EDE-estraranoj, por krei komunan strategion por la EU-elektoj en junio de 2009. Ni havis ankoraŭ unu jaron por prepari nin por la elektoj. Poste sekvis intensa trareta kunlaborado. Ni komponis kune la tekstojn de flugfolioj, poste plakatoj.

Printempe de 2009, senpere antaŭ la juniaj elektoj kunvenis la membroj de la franca kaj germana EDE, por preparoli la tuj komencotan intensan elektokampanjon. La preparoloj estis sukcesaj, estis faritaj proprakoste mallonga reklamfilmeto en la franca kaj germana lingvoj.

En Germanio ĉiu partio rajtas senkoste prezenti en difinita tempo partian reklamon en la germana TV1 kaj TV2. Tio tre multe helpis ne nur en la popularigo de EDE, sed entute en la diskonigo de Esperanto. Post la elektoj rimarkeblis la kresko de la interesiĝantoj pri Esperanto.

Ankaŭ en Munkeno ni intense preparis nin por la elektoj. Post kiam du monatojn antaŭ la elektoj ni eksciis la rezulton de la germanaj subskriboj, ni daŭrigis la entuziasman laboron. Ni sukcesis kolekti ne nur la kvar mil necesajn subskribojn, sed krome kaj krone preskaŭ sep mil. Kun memcerta konscio ni daŭrigis la kampanjon. Ni gluis afiŝojn en la pli gravaj stratoj de Munkeno, mi persone en Leopoldstrasse, antaŭ la universitato kaj en la Olimpika parko, poste enĵetis pli ol mil flugfoliojn (kun la helpo de Andrea Ruzicska) en la leterkestojn de domoj.

Kompreneble, antaŭ ol povi fari tion, ni devis plenumi la necesan administran laboron. Por ĉiu agado ni devis unue peti kaj ricevi permeson de la urba registaro, kiujn mi aranĝis, alprenante respondecon per mia subskribo.

22. La politika organizo EDE-GE partoprenis en junio de 2009 la EU-parlamentajn elektojn

En junio de 2009 okazis la elektoj por la Eŭropa Parlamento. Fronte de nia EDE-GE-listo staris la Nobel-premiita sciencisto Reinhard Selten, kompare kun la aliaj partioj la intelekto plej elstara personeco. Dualoke sekvis en la kandidatlisto nia prezidanto Manuel Cebulla, poste la matematikisto d-ro Ulrich Matthias kaj mi en la kvara loko.

Laŭ niaj atendoj sukcesis akiri deputitan lokon nek ni en Germanio, nek la francoj en Francio. Tamen malagrabla tuŝis nin poste, ke ni, kiuj tiel multe laboris por ĉi tiu rezulto, anstataŭ danko ricevis kritikojn de la esperantistoj. Aparte tiuj, kiuj faris nenion por la elektoj, saĝumadis laŭtbuŝe pri tio, kion ni ne faris bone kaj kiel ni devus fari.

Mi respondis al tiuj kritikoj, ke antaŭ la elektoj estis donita por ĉiuj la eblo aliĝi kiel membro al nia movado kaj proponi demokratie siajn ideojn. Por ilustru per nombroj nian sukceson, mi diris al ili, ke ili bonvolu rakonti al tiuj pli ol 40 mil eŭropaj civitanoj, kiuj plenigus futbalstadionon, ke iliaj voĉoj valoras neniom (ĉar en EU tio povas esti esprimita nur en apenaŭ videblaj procentoj). Ĉi tiuj elektintoj reprezentas videblan malplimulton, kiuj havas rajton en EU esti atentataj.

Sed en la politiko, aparte ni, EDE-membroj devus akcepti ankaŭ tiel la kritikojn, kaj ne devus retiriĝi ofenditaj. Sed bedaŭrinde multaj el tiuj, kiuj pli frue multe laboris, opiniis, ke ilia laboro estis sensenca, pluraj turnis sin unu kontraŭ la aliaj. Nia prezidanto Manuel Cebulla, kiu laŭ mi faris tre bonan laboron, estis kritikata tiamaniere de Ulrich Matthias, ke li abdikis la prezidantecon kaj ekŝiĝis el EDE.

Post tio la diseriĝo de la partio plu daŭris, kiam Ulrich Matthias ekhavis la ideon, fondi novan partion, kiun li nomis Unu Mondo (UM). Verŝajne lia ĉina edzino motivis la baze ne kontraŭesperantan ideon, sed alia demando estas la reala ŝanco de tia iniciato en EU, multe malpli en la mondo. Tial restis el la UM-partio nur german-monda UM-partio.

Tio efikis alekstere, aparte en esperantista medio tre negative, tiel ankaŭ tiuj, kiuj ĝis tiam subtenis nin, forturnis sin de ni, kvankam ni bezonis pleje la helpon de la esperantistoj. Konrad Grammelspacher provis savi, kio ankoraŭ saveblis, kaj transprenis la prezidantecon. En la lastaj tempoj li multe laboris por la plua vivteno kaj progresigo de EDE-GE. Mi restis plu ankoraŭ por kelkaj jaroj vicprezidanto, ĝis mi transdonis la postenon al iu pli juna.

Ni restis kelkaj, kiuj ankaŭ plu estis konvinkitaj pri la neceso de EDE en EU. La finiĝo de la aktualaj elektoj signifas ĉiufoje novan prepariĝon al la sekvaj elektoj. Ankaŭ ni tenis nin al ĉi tiu saĝaĵo kaj provis

pripensi niajn erarojn, kaj lerninte el ili plu avanci. Mi ankaŭ plu organizis la kunvenojn de politikaj dialogoj en Alsóörs, kie ni ricevis plurajn impulsojn daŭrigi nian politikan movadon por Esperanto.

EDE konsideris sia tasko disvastigi sin al la ŝtatoj de la tuta Eŭropa Unio, do esti eksplicite internacia movado. Ĝi malvolvis la flagon en Francio, ni en Germanio aliĝis al ĝi, sed ne al franca partio – kiel ni ĉiufoje emfazas –, sed al eŭropa internacia partio, kiu konsistas el minimume du membropartioj.

23. Al la pluevoluo de EDE kontribuis la renkontiĝoj en Alsóörs

Ĉi tiun internacian societeton, al kiu aliĝos laŭ niaj espero ankaŭ aliaj nacioj, ni nomas EDE-Federacio (EDE-FED). Ĉi tiu tegmenta organizo nun jam havis eĉ tri francajn prezidantojn. Min oni elektis tujkomence vicprezidanto, tiel do mi povis konstrue kunlabori kun ĉiuj tri francaj prezidantoj je federacia nivelo. Por tiel diri, mi sukcesis efektiviĝi kaj certigi kontinuecon en la internacieco de EDE-FED. Al tio grave kontribuis ankaŭ, ke dum la prezidanteco de ĉiuj tri ili partoprenis la dialogikajn akordigajn renkontiĝojn en Alsóörs.

Per nia internacieco ni impresis ankaŭ esperantistojn, vivantajn en aliaj EU-ŝtatoj, el kiuj pluraj ankaŭ aliĝis al ni, subtenante la federacion en diversaj formoj. Sed ĉar en la Eŭropa Unio ni kune ne estis agnoskitaj kiel internacia partio, EDE devas adaptiĝi en ĉiuj landoj al la tieaj elektoleĝoj. Tial nia programo enhavas punkton, kiu postulas en EU unuecajn elektoleĝojn.

Ni partoprenis diversajn Esperanto-kunvenojn, informante nun jam de pli ol 15 jaroj pri la agado de EDE, varbante novajn membrojn kaj aktivajn helpantojn. Dum ĉi tiu tempo mi faris persone plurajn diversajn prelegojn, plej ofte pri politikaj, filozofiaj temoj, kunligante la okazojn kun la popularigo kaj diskonigo de EDE. Tiaj estis ekz. miaj prelegoj dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto en diversaj landoj de la mondo aŭ en diversaj Esperanto-renkontiĝoj, informante plurfoje kune kun la francaj EDE-estraranoj.

La plej sukcesaj informkampanjoj estis por mi persone en Hungario

kaj Pollando. En ambaŭ landoj funkcias laŭleĝe registrita, ŝtate agnoskita politika movado de EDE. En ĉi du landoj bedaŭrinde povis partopreni EU-elektojn nek EDE-HU, nek EDE-PL, ĉar la ŝtataj limigoj por la eniĝo en la elektolistojn por nova partio estas tiel altaj, ke la esperantistoj ne povas superi ilin. Sed en la politika fono EDE funkcias en ambaŭ landoj. Eble mi povas ankaŭ diri, ke en Pollando kun aparta sukceso (pri tio poste mi pli detale parolos).

Inter la hungariaj esperantistoj la okupiĝo pri Esperanto-politiko – kun diversaj reagoj – jam antaŭ la ekzisto de EDE komenciĝis, nun jam antaŭ pli ol 19 jaroj okaze de la unua kunveno en Alsóörs dum la komunaj renkontiĝoj kun munkenaj esperantistoj. Sed aktivajn kunlaborantojn ni sukcesis varbi nur post la EU-elektoj en 2009.

Al la diligenta laboro de Blazio Vaha kaj Andrea Ruzicska ŝuldeblas la plenumo de la multa burokratia laboro por la laŭleĝa registrado de EDE. Krom ili la subtena kontribuo de pluraj hungariaj esperantistoj helpis la organizadon de informaj tabloj kaj prelegoj.

24. Kreo de la hungara EDE (EDE-HU)

Mi rememoras diskuton en la reto, kiu kontribuis al kaj lanĉis la formiĝon de la hungara Esperanto-politika movado kaj pli malfrue de EDE. (La komenco rekondukeblas eble al ĉi suba interveno mia en la retlisto esp-en-hung.) Poste ekviglis la interesiĝo pri politiko en la hungaria Esperanto-movado. Mi ne diras, ke tute konsente, sed almenaŭ temigante ĝin.

Kun la sekva teksto mi anoncis min por la reta diskuto:

Estimataj diskutantaj esperantistoj, mi volus partopreni ĉi tiun opini-interŝanĝon, ĉar mi trovis ideojn, kiujn laŭ mi valorus pluevoluigi, eĉ pli bone, apliki en la praktiko.

Mi komencu de la praktika flanko, antaŭ ol iu ne plulegus pro la tro multa teksto.

Kelkaj el vi jam certe aŭdis pri la majaj renkontiĝoj, okazantaj jam de kvin jaroj en Alsóörs, kie ni diskutas politikajn temojn. Mi jam povas diri, ke mi „luktas” de jaroj por tio, ke la esperantistoj rekonu internacie la politikan signifon de Esperanto; en Hungario, bedaŭrinde, ĝis

nun ankoraŭ ne kun multaj rezultoj.

Ĉi-okaze mi invitas ĉiujn politike interesatajn listanojn kaj ĉiujn eventuale interesiĝontojn, partopreni ĉi-jare la 6an politikan diskuton en Alsóörs de la 17a ĝis la 21a de majo 2006. La detala programo estos poste konigita. Kiu volas pliampleksigi la programon per prelego kun politika temo, bonvolu anoncu sin.

Unuflanke mi komprenas la skeptikecon de multaj al la politiko, post kiam ni devis sperti, kio okazas, se oni starigas politikistojn pinte de grandaj entreprenoj. Sed ekzistas ankaŭ tiaj sociaj problemoj, kiujn fakuloj ne kapablas solvi, por kio necesas demokratia decido, kaj tio estas jam politiko. Al tiaj problemoj apartenas kelkaj kampoj de la kulturo, inter kiuj eble la plej grava estas la lingvo kiel ties portanto. Ĉi tiujn problemojn kapablas solvi nek lingvistoj, nek universitataj profesoroj. Kiuj asertas la kontraŭon, tiuj, bedaŭrinde, ankoraŭ ne sukcesis liberiĝi de sia faka partio, kaj al ili konsilindas plu lerni.

Por la justa solvo de tiuj sociaj problemoj, kiujn nia scio ne kapablas fari, restas sole la politiko. Pasintec diktaturoj ofte mensogis prie. En nia nuntempo ni povas apliki la demokration, nu ne por la decido de la lasta vero, sed por la provizora esprimo de niaj interesoj. Science ne eblas decidi, kiu kulturo, kiu lingvo valoras pli, tial ni ne scias ankaŭ, kiu el ili rajtus primari inter la aliaj, ĉu iu t.n. primitiva aŭ t.n. alta kulturo. En ĉi tiu relativa vero povas helpi unusole demokratio kaj obeo al ties reguloj.

En ĉi tiu ludo de la politiko gravas ankaŭ, ke pri la direkto decidas intereso kaj potenco. La historia sperto montris, ke la plej granda potenco kaj forto estas la intereso de la plimulto, kiu tamen ŝanĝiĝas kun la tempo. Se la socia postulo de la tempo ne estas rekonita, ĉi tiu forto erupcias kaj detruas la t.n. bremsojn kaj kontraŭpezojn de la socio. Ĉi tiun detruon celas malhelpi la civilizita demokratio. Por tio bezonatas aktiva civitana kunlaboro. La politiko de la nuna tempo povas manifestiĝi ne nur en retenigema kritiko, ja povas esti, ankaŭ en kanaligo de la detrua forto de akumulitaj frustriĝoj, sed prefere ja en socia laboro por konstrua solvo. Ĉar se individue ni ne pledas por tio, kion ni volas, de la socio mem ni ne povas atendi solvon. Ĉar la socio estas ne ia superhoma forto sed la sumo de niaj malgrandaj individuaj fortoj.

Se ni plimultaj volas, ke la diverseco de la kulturoj kaj lingvoj konserviĝu, ni devas pledi por tio, kaj se tio estas opinio de multaj civitanoj en Eŭropo, tiam unuigitaj, ili prezentas politikan forton, per kiu oni povas krei potencon, aŭ se ne, almenaŭ vekti atenton pri la problemoj kaj la reakciaj fortoj kaj proponi tempoadekvatan solvon. Ĉi-kampe povus fari esperantistoj kune utilan politikan laboron.

Tia politika aktivado de esperantistoj estus ĝuste la kontraŭo de ilia ĝisnuna agado. Ili ĝis nun esperadis, ke la apliko de Esperanto ŝanĝos la medion. Sed en la nuna pragmata mondo gravas ne ideoj (da ili estas jam sufiĉe kaj ili ankaŭ trosufiĉas al ni), ja oni tuj starigas la demandon: Kaj kie ĝi utiligeblas?

Imre skribis: >Estas kelkaj, kiuj konsentas pri la ideo, sed la lingvon ne emas lerni. Ŝajnas, ke tio restos eterna kontraŭdiro.<

Mia respondo: Tio estas tute ne kontraŭdiro. Eĉ la du aspektoj tre bone kompletigas sin, nur oni devas apartigi kaj disteni ilin, kaj doni al ĉiu, kion tiu serĉas, sed la fortojn, originajn el ĉi du aspektoj, ni devus unuigi. Kaj tio estas jam tereno por politiko. Kiuj ideoj akordas kun ni, prezentas grandan potencialon, pri tio mi mem scipovus diri multajn ekzemplojn. La problemoj estas nur, ke ni ne utiligas ĝin. Kial ne agadi inverse, ol la Esperanto-movado faris ĝis nun, kaj el tiu agado ne ekskludi ankaŭ la menciitan eblon.

Do ne atendi, ĝis Esperanto disvastiĝos (aŭ ne) en la socio, sed progresigi tiajn kondiĉojn en la socio, kiuj postulos tian solvon kiel Esperanto.

>...ni bezonas ĉiujn, kiuj ne estas niaj malamikoj. Kiu ne estas kontraŭ ni, tiu estas kun ni.<

Mia respondo: Tio estas absolute en la t.n. dialogika spirito de Esperanto, kaj tio estas la novo en la politika nuntempo, do ke ni ne diras, al kio ni dialektike alkitimiĝis, ke „kiu ne estas kun ni, tiu estas kontraŭ ni“. Ne pro tio, ke ni fariĝis pli saĝaj, sed ĉar ni havas nenian alian alternativon. Kaj tion oni devas ankoraŭ nur rekonii.

Sed en la politiko oni kutime povas kaj bezonas eluzi siajn malamikojn, se oni volas atingi, ke tiuj prenu onin serioze. Alternative ni povas montri al ili, ke ni ja ne estas iliaj malamikoj, nur havas pli bonajn

proponojn por la problemsolvoj.

Eble la plej bona reklamo por Esperanto en la lastaj tempoj estis, kiam iu kristan-socialista politikisto (Gauweiler) diris, ke Germanio ne rezignu la markon por esperanta mono. Nun ni scias, ke eŭro fariĝis unu el la plej fortaj valutoj de la mondo. Tial do ni povas nun diri: ni jam havas esperantan monon, ni bezonas jam nur esperantan lingvon.

Géza skribis: >Ĉe konatiĝoj kun nekonatoj mi ĉiufoje klopodas havigi okazon menci i Esperanton. Preskaŭ senescepte la reago estas, ke ili miras, kial ili ne aŭdis pri ĝi pli multe.<

Mia rimarko: Ĉi tiu „preskaŭ senescepta reago” estas politika potencialo. Kvankam la plimulto de ĉi tiuj interesiĝantoj eĉ post pluaj informoj ne decidus lerni la lingvon pro diversaj kaŭzoj konataj (tempo, okupateco, utiligebloj, ofte pro konduto de esperantistoj ktp). Tamen post tia esprimiĝo ili estus sufiĉaj por politike subteni nin. Se ekzistus partio, kiu apogas ĉi tiujn ideojn aŭ faras ilin sia programo. Por balotoj, ekz. ĉe EU-parlamentaj elektoj. Kun sufiĉa probablo ĉi tiuj personoj povus voĉdoni ankaŭ por tia partio.

Kial estus pli avantaĝa nova partio, la ĉefa celo de kies programo estas la konservo de la diverseco de kulturoj kaj lingvoj, kompare kun tio, ke tiaj ideoj estus integritaj en la programon de ekzistanta partio, mi bezonus pli longan eksplikon por la disvolvado de la temo, kion mi antaŭvidas ĉi-jare fari en kelkaj hungarlingvaj prelegoj kun la tendenco, ke ankaŭ tiaj personoj estu alparolataj en la socio, kiuj ankoraŭ ne pretas ellerni Esperanton, tamen konscias la neceson de la demokratia solvo de la eŭropa lingva problemaro.

Géza: >Plurfoje stariĝas en mi la demando: ĉu vere estas ĝuste, ke la Esperanto-movado tenas sin for de ĉiaj politikaj tendencoj.<

Mia opinio: laŭ mi la respondo al tio estas simpla: ne.

>Se ekzistus kelkaj esperantistoj, kiuj havas spertojn en la organizado kaj pretas ankaŭ labori por tio, mi mem same volonte partoprenus tian laboron.<

Mia respondo: *Bonvolu, jam tuj ni povas komenci. Kiu pretas inter vi kunlabori ĉe starigo de informa tablo en Budapeŝto, Munkeno kaj Pa-*

rizo?

Mia koncepto estas jena:

Ekz. por loko taŭgus en Budapeŝto placo Deák, sed se iu scias pli bonan, ni faru tie.

Sur tablo oni povas meti diversajn reklammaterialojn, kiel esperantaj libroj, ĵurnaloj, flugfolioj. Malantaŭ la tablo ni pendigas 2-3 metrojn longan kaj eble 60 cm larĝan reklambendon kun la surskribo hungara en Budapeŝto: „Civitanoj de Parizo kaj Budapeŝto por Eŭropo per Esperanto”. Ĉeestus en ĉi tiu okazo almenaŭ du personoj el Parizo kaj (espereble) pli multaj el Budapeŝto, kiuj povus demonstri per viva ekzemplo al la pasantoj, kiel funkcias la komunikado per Esperanto.

La samon ni povus ripeti ankaŭ en aliaj urboj. Laŭ mi konforme al la maksimumo, ke la Esperanto-movado bezonas eliri el sia enmemeco sur la straton, atingi vastajn rondojn de la socio, ne nur virtuale (kio, ĝojinde, jam okazas en ĉiam pli granda grado) sed ankaŭ per vivaj ekzemploj.

Tion ni povus fari en Florenco dum la Universala Kongreso, eble en pluraj placoj kaj stratoj, kaj kompreneble, ankaŭ en aliaj urboj.

Mi tute konsentas kun Géza: >reklamo-propagando, reklamo-propagando, nove kaj denove kaj refoje< Nur oni devas efektive fari tion!

Mi atendas viajn sinanoncojn.

Post ĉi tiu alvoko komenciĝis ankaŭ en Budapeŝto la strata informado laŭ munkena modelo, unue nur pri Esperanto, kaj post la fondo de EDE-HU ĉe la sama tablo kaj sub la sama tendo pri ambaŭ.

Dum pli ol dek jaroj ni faris tion de printempo ĝis aŭtuno, kiam la vetero permesis, plej ofte sabate inter la 10a kaj 15a horoj ĉe la angulo de placo Városháza aŭ sur placo Deák antaŭ la luterana preĝejo. En nia tendo la supre menciitaj surskriboj estis de malproksime videblaj. Sur nia tablo estis elmetitaj kaj kunportebaj aŭ aĉetebaj diversaj informfolioj kaj esperantaj libroj.

Aktivaj organizantoj kaj kunlaborantoj estis Andrea Ruzicska, Blazio Vaha, Thierry Salomon, Eŭgeno Macko, Anna Besenyei, Kornélia

Nagy, Géza Schuller, Péter Tihanyi, Eszter Besenyei.

25. La EDE-federacio funkcias en kvar eŭropaj landoj kiel laŭleĝe registrita politika movado por la lingva demokratio

Nun EDE funkcias en kvar eŭropuniaj landoj, unuigitaj formale en federacio (Federacio de Eŭropo-Demokratio-Esperanto). Jure ĉiuj estas memstaraj organizoj kun komunaj celoj en la unuopaj landoj, sed havas komunajn regularon kaj programon, konceptitajn per komuna laboro kaj internacie aprobitajn per demokratia voĉdonado. La nuna prezidanto de la federacio estas Bert Schumann, mi estas la vicprezidanto de nun jam pli ol dek jaroj.

Niaj strategiaj celoj kongruas internacie kun la ĝisnunaj celoj de la franca, germana, pola kaj hungara EDE-organizoj.

En ĉi kvar landoj EDE estas laŭleĝe registrita kiel socia organizo, kies ĉefa celo estas la internacia demokratia interkomprenigo, por kiu necesas internacie neŭtrala lingvo.

La kunlaboro okazas en la lingvo Esperanto. La EDE-Federacio estas oficiale, jure registrita en Strasburgo en la sidurbo de la EU-parlamento. Sed en ĉiuj ĉi landoj la konkreta funkciado adaptiĝas al la juro de la ŝtatoj pro tio, ke en tia formo ne ekzistas komunaj preskriboj en la Eŭropa Unio. Nia perspektiva celo estas, ke en EU formiĝu komuna elektojuro.

La franca EDE funkcias kiel politika partio, kaj en 2004, 2009 kaj 2014 ĝi partoprenis EU-parlamentajn elektojn. La germana EDE kiel civila organizo partoprenis en 2009 la EU-balotojn.

La pola EDE kunlaboras kun parlamentaj deputitoj, kaj atingis, ke Esperanto estu agnoskita kiel parto de la Pola Kultura Heredaĵo.

Perspektiva komuna celo de EDE estas agnoskigi Esperanton ankaŭ en eŭropa rilato kiel parton de la Eŭropa Kultura Heredaĵo.

Grupo de polaj parlamentaj deputitoj, subtenantaj Esperanton, alvokis la atenton de siaj kolegoj politikistoj en la viŝegradaj landoj, aparte en Hungario, kie Esperanto havas altnivelan tradicion, ke ili aliĝu al la subteno de Esperanto en la Parlamento de la Eŭropa Unio.

Detalaj informoj pri EDE haveblas per enskribo de la vortoj Eŭropo-Demokratio-Esperanto en Guglo en la paĝaro de la federacio¹⁰. Tie vi trovas la landojn kun aktivaj kaj eble onte aktivaj EDE-organizoj. La hungara EDE: en la paĝaro de la federacio¹¹, senpere la paĝaro de EDE-HU¹².

¹⁰ <https://www.e-d-e.org/?lang=eo>

¹¹ <https://www.e-d-e.org/-HU-Hungario-?lang=eo>

¹² <http://ede-hu.hupont.hu/>

26. Mi prelegis en diversaj landoj de Eŭropo por diskonigi EDE kaj Esperanto

Mi prelegis en diversaj landoj kaj lokoj kaj lingvoj, plie pri filozofiaj, politikaj-filozofiaj, lingvofilozofiaj kaj historiaj-sociopsikologiaj temoj, al kio aldoniĝis la konkreta diskonigo de kaj informado pri EDE.

Kiel ekzemplojn de ili mi nomas la sekvajn raportojn:

EDE partoprenis la 96an UK-on en **Kopenhago** (Danujo) 23-30.07.2011, tie informis, kunsidis, prelegis. Sabaton ekde la 19h okazis Movada Foiro en la ĉefa kongreshalo por saluti aŭ diskuti (Elisabeth, Eŭgeno kaj aliaj). Dimanĉon 13h-13h45, **Eŭgeno Macko prelegis** pri: «Dialogiko, Demokrateco, Esperanto» en la salono Zacho, ĉeestis ĉ. 40 partoprenantoj.

La politika movado EDE, funkcia en la Eŭropa Unio, prezentis sin en la 98a Universala Kongreso de Esperanto en **Rejkjaviko**, vendrede 26.07.2013, en la salono Beleva. **Prelegis Eŭgeno Macko**: La unuhoran prezentadon partoprenis pli ol 50 personoj el 17 landoj. El Francio 10, Pollando 8, Germanio 6, Svislando 5, Norvegio 4, Belgio, Kanado po 3, Bulgario, Hungario po 2, Aŭstralio, Britio, Israelo, Italio, Japanio, Litovio, Rusio, Ukrainio po 1.

EDE partoprenis la 100an UK-on en **Lilo (Francio)** 25.07.-1.08.2015, tie informis, kunsidis, prelegis. Mardon, 9h-10h30 en la salono Bourlet, fakte en ŝtuparejo kun 35 homoj el 7 landoj, publika membrokunveno, anoncita kiel „Agado por Esperanto en politika kunteksto” kun **prelego de Eŭgeno Macko**: „EDE estas la plej konsekvenca politika movado en EU por internacia demokratio”, sekvita de demandoj kaj diskuto kun la ĉeestantoj.

EDE partoprenis la 101an UK-on en **Nitro (Slovakio)** 23-30.07.2016, tie informis, kunsidis, prelegis. Marde, 14h-16h en la salono Zvara. Reprezentitaj estis: EDE-Francio de prezidanto Pierre Dieumegard, EDE-Germanio de vicprezidanto **Eŭgeno Macko**, EDE-Pollando de prezidanto Eduard Kozyra, EDE-Hungario de prezidantino Andrea Ruzicska. La kunvenon malfermis **enkonduka prelego de Eŭgeno Macko**, poste prelegis Pierre Dieumegard, Laure Patas d’Illiers kaj

Marcelle Provost. La kunvenon ĉeestis pli ol 40 personoj el 12 landoj: Francio (12), Germanio (6), Pollando (6), Hungario (4), Belgio, Britio, Danio, Litovio (po 2), Brazilo, Nederlando, Slovenio, Svislando (po 1).

Samtempe, 28-29.07.2016 okazis en Nitro Internacia Konferenco pri la „Perspektivoj de lingva komunikado en la Eŭropa Unio“, kunlabore kun la universitato kaj la Slovaka Esperanto-Federacio, en la filozofia fakultato. Invititaj estis profesoroj, politikistoj kaj ankaŭ la movado EDE. Pierre Dieumegard kaj **Eŭgeno Macko prezentis en 2-foja 20-minuta prelego** kaj en sekvaj respondoj al diskut-demandoj, la politike aktivan solvon de lingvaj problemoj, kiun celas EDE.

EDE partoprenis la 104an UK-on en **Lahtio (Finnlando)** 20-27.07.2019. Sabaton, de 19h estis Movada Foiro en la kongresejo. Deĵoris Georg Hennemann, Eŭgeno Macko k.a. Kunveno vendredon, 13h30-14h30 en la salono *Konisi*, temo: Ĉu politiko en la Esperantomovado? **Prelegis kaj diskutigis Eŭgeno Macko**. Ĉeestintoj: pli ol 30 el Francio, Germanio, Pollando, Hungario, Finnlando, Usono, Ĉinio, Koreio, Estonio, Svisio ktp.

Kelkaj el miaj (nun pli ol 100) prelegoj kaj artikoloj troveblas esperante, germane kaj hungarlingve en Ipernitio¹³. La sekve menciitajn en la jaro 2020 mi eldonis ankaŭ paperforme:

Dialogika kompreno, demokrateco kaj Esperanto. Politika kaj Esperanto-filozofia prelego en Wagrowiec, Pollando, la 27an de junio 2011¹⁴

Dialogiko de la historio. Post la fino de klasika historio necesas dialogika historio. Prelego en la 93a Germana Esperanto-kongreso en Munkeno¹⁵.

Prelegserio pri la temo: Kion povus lerni la Eŭropa Unio el la historio de la multpopola ŝtato de la Habsburg-Monarkio? Interfaka pritrakto de la problemoj el interpopola sfero, inter filozofio, historio, politiko, sociologio kaj sociopsikologio. Historia ekzemplo por la neceso trans-

¹³ <http://www.ipernity.com/blog/32767>

¹⁴ <http://www.ipernity.com/blog/32767/1229286>

¹⁵ <http://www.ipernity.com/blog/32767/4725224>

paŝi la klasikan historion de la pasinteco.

Parto 1: **Aŭstrio estas alia ol klasike unuavide ŝajnas**, 27.11.2014, prelego en “Eine Welthaus” München, organizita de la Munkena Esperanto-Klubo, dulingve, esperante kaj germane.

Parto 2: **Naciigo de la multpopola ŝtato Aŭstrio**, 05.03.2015

Parto 3: **Evoluo de la internaciismo**, 24-25.09.2015

Parto 4: **Disrompiĝo de la postrestinta Aŭstra-Hungara Monarĥio kaj la Carisma Rusio**, 16.06.2016

Parto 5: **Histori-filozofiaj konsideroj** el 4 prelegoj kaj rigardo al la estonteco de la Eŭropa Unio, 17.11.2016¹⁶.

Dialogika pensado kaj Esperanto. Filozofia pritrakto. Prelego en Timișoara/Temesvár/Temeschburg, en internacia scienca Esperantorumana kolokvo en la Universitatea de Vest, 11-12.11.2016¹⁷

Prelego en “Eine Welthaus in München” 18.05.2017, organizanto Esperanto-Klubo Munkeno kaj Seminario en Alsóörs/Hungario 25-27.08.2017. Unua kaj dua parto: **La ligiteco, al Esperanto, de la superpaso de la klasiko.** Transpaso de la eŭrop-idealisma klasiko per la nova dialogika pensado kaj la filozofia pritrakto de la ligiteco al Esperanto. La pensoj estis kunfanditaj en 2x12 punktoj. Okazis kiel prelegoj (2x 40-45 minutoj) en Munkeno kaj pli profunde prilaborita en tuttaga seminario en Alsóörs¹⁸.

Internacieco kaj Esperanto ĉe la transpaso de la klasiko en la secesio. Prelego en la Munkena “Eine Welthaus”, organizanto la Esperanto-klubo en Munkeno 28.02.2019¹⁹.

Filozofia principo por la novkompreneo de la historio, pri la dialogika pensado, post la transpaso de la klasikismo. Prelego en San-Marino ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj en 1994. **Nociaj ekzemploj de la Heidegger-a ne-dialektika pensado kaj la simileco kun la Rosenzweig-a dialogiko**²⁰

¹⁶ <http://www.ipernity.com/blog/32767/803695>

¹⁷ <http://www.ipernity.com/blog/32767/4639906>

¹⁸ <http://www.ipernity.com/blog/32767/4675514>

¹⁹ <http://www.ipernity.com/blog/32767/4707892>

²⁰ <http://www.ipernity.com/blog/32767/2098676>

Prelego en la Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo/Japanio, en la jaro 2007. **Dialogo inter Oriento kaj Okcidento laŭ la pensmaniero de Heidegger**²¹

Prelegoj en la jaroj 2018 kaj 2019 antaŭ la eŭropuniaj parlamentaj elektoj en majo de 2019 en Munkeno, Pfaffenhofen, Budapeŝto, Szeged, Debrecen kaj Nyíregyháza: **Por kunrestado de la Eŭropa Unio necesas Esperanto**. Politikaj pensoj, kunfanditaj en 10 punktoj²².

27. En Alsóörs ni festis la 10an datrevenon de la internaciaj diskutkunvenoj pri la politika signifo de Esperanto

En la jaro 2010 ni festis la 10-jaran jubileon en Alsóörs. En la sekvaj linioj legeblas parto de la tiama protokolo:

La 26an kaj 27an de junio 2010 okazis en Alsóörs, Hungario, unuafoje en la historio de EDE federacia kunveno kun reprezentantoj el ĉiuj tiamaj ekzistantaj landaj sekcioj (Francio, Germanio, Hungario, laŭ fondordo) kaj ankaŭ reprezentantoj de la tiam kreota pola sekcio. La polan sekcion efektive oni fondis la 7an de julio 2010. Ankaŭ notindas, ke ĉeestis fondunto de kataluna aŭ hispana sekcioj.

Tiun unuafojan kunvenon, ampleksan laŭ la diverseco de landoj reprezentitaj partoprenis el Francio Bertrand Hugon, prezidanto de la federacio, Fabien Tschudy sekretario de la federacio, el Germanio Monika Finnegan-Reuss, kasistino de EDE-GR, Konrad Grammelspacher, konsilianino de la federacio kaj prezidantino de EDE-GR, Eugen Macko, vic-prezidanto de la federacio kaj de EDE-GR, konsiliano pri Germanio kaj orientaj landoj, el Hispanio Guillem Gómez Blanch, federacia politika konsiliano, el Hungario Andrea Ruzicska, konsilianino de la federacio, Thierry Salomon, konsiliano de la federacio, Géza Schuller, estrarano de la EDE-HU, Péter Tihanyi, membro de EDE-HU, Balázs Wacha, konsiliano de la federacio, el Pollando Franciszek Witucki, Kazimierz Kryzak, Eduardo Kozyra.

La celo de la renkontiĝo en Alsóörs estis ĉefe paroli, pri kian programon havu la eŭropa EDE. La ideoj, eldiritaj en Alsóörs, certe ne kon-

²¹ <http://www.ipernity.com/blog/32767/814612>

²² <http://www.ipernity.com/blog/32767/4699186>

sistigas ion definitivan sed estas laborbazo por plu konturi la enhavon de la programo de EDE. Renato Corsetti, konsiliano de EDE-Eŭropo, akceptis esti redaktoro de la teksto, pri kies pluevoluigo respondecas la konsilio. La membroj ankaŭ rajtos intertempe partopreni en Interrreto ĉe maturigado de la teksto kaj pri la fina teksto ili povos voĉdoni. La Eŭropa EDE-programo ne celas trudiĝi al la landaj sekcioj, ĝi nur montros gvidliniojn. La landaj sekcioj povos ene de ĝi pli emfazi, pli detali, malemfazi tiun aŭ jenan enhaveron laŭ sia interespunkto dum la balotkampanjo. Tamen oni trovu interkonsenton, por verki tekston subtenatan de ĉiuj el ili.

Pliaj informoj legeblas en Interreto ĉe EDE-Dokumentoj²³.

La renkontiĝojn en Alsóörs partoprenis plurfoje ankaŭ polaj esperantistoj. Ĉi lasta jubilea renkontiĝo en 2010 havis tian efikon al la partoprenantoj, ke poste ili decidis fondi la polan EDE:

La fondo de la pola sekcio de EDE okazis la 20an de marto 2011 en la pola urbo Wągrowiec (Grandpolujo), kun ĉeesto de redaktoro de loka gazeto Słoma. Sub prezido de Stanisław Rynduch kunsidis 17 personoj, kiuj unuanime elektis sian estraron.

La elektita estraro konsistas el Edward Kozyra, prezidanto, Jerzy Antoni Walaszek, vicprezidanto, Mariusz Borysiewicz, sekretario, Halina Borysiewicz, kasistino, Irena Grochowska, konsilianino.

En la sekvaj jaroj – ni povas aserti – la pola EDE plenumis la plej sukcesan laboron. Sub la energia gvidado de Edward Kozyra estis organizitaj pluraj kontaktoj kun polaj politikistoj kaj parlamentanoj.

Grandan atenton elvokis poste mondvaste en esperantistaj rondoj, ke en Pollando kiel unua estis agnoskita la spirita heredaĵo de Esperanto. Ankaŭ ĉi-foje okazis – kio en esperantistaj rondoj, bedaŭrinde, jam plurfoje –, ke pro konkuremo (aŭ ni povus nomi ankaŭ ĵaluzo) la polaj esperantistoj volis noti tion sole kiel sian propran sukceson, sen menciigi EDE. Mi devis alparoli dum iu UK, korektante la eldiron de Barbara Despiney, ke la merito apartenas unuavice al la laboro de EDE-membroj, kaj ne al tiu de la Pola Esperanto-Asocio, kiu komence eĉ

²³ <https://www.e-d-e.org/-Dokumentoj-?lang=eo>

kontraŭis la politikan laboron de EDE.

Membroj de la eŭropa politika movado Eŭropo-Demokratio-Esperanto iniciatis kaj atingis en Pollando la enskribon de la lingvo Esperanto en la landan liston de nemateriala kulturheredaĵo.

Nun post la sukceso anonciĝis tute impertinente kelkaj aspirantoj, kiuj dekomence kontraŭis la tutan iniciaton. Pinto de senhonto estis la distordo de la vero kaj prisilento de EDE kiel vera iniciatinto.

En la UK en Lillo, dum la respondoj de la estraro, plenbuŝe estis anoncita la „granda sukceso de la poloj“, kiun devus imiti ankaŭ aliaj landoj. Ankaŭ la kontaktpersono kun UNESKO, Barbara Despiney, emfazis kiel ekzemplon por aliaj landoj agi tiumaniere, tute forgesante mencii EDE.

Tute nekomprenebla estis la sinteno de Etsuo Miyoshi en lia artikolo en la UEA-gazeto Revuo Esperanto. Li mem kunlaboris kun EDE-anoj kaj ja sciis, kiuj estis tiuj homoj, kaj en tiu artikolo li diris neniun vorton pri EDE. Mi povas klarigi tion nur tiel, ke ĉi-foje okazis cenzurado de la artikolo fare de UEA.

Tamen mi havis lastatempe la impreson, ke post la jam 15-jara intensa diskuto pri politikeco de Esperanto en Alsóörs/Hungario kaj aliloke, post la agado de EDE, iomete malgrandiĝis la kontraŭeco. Sed verŝajne la diskuto restas eterna, aŭ ĝis ni havos vaste akceptitan, internacie demokratan lingvon.

Fakto estas ĉe la atingo de la sukcesoj de la Pola EDE la akcepto de politikeco en Esperanto. Kazimiro Krzyzak, la plej grava aktivulo estas plene politike pensanta persono, li ĉiam denove emfazas, ke li estas EDE-ano. Bedaŭrinde ankaŭ liaj laŭdantoj ofte forgesas mencii tion.

Sed ankaŭ aliaj kunlaborantoj estas neforgesindaj. Eduardo Kozyra, Stanislav Rynduch, Antoni Walasek, kune kun Kazimiro, estis partoprenantoj de la diskutoj en Alsóörs en 2011, 2012 kaj 2013.

La persista laboro de ĉi tiuj aktivuloj en la fono de la internacia politika movado de EDE (Francio, Germanio, Hungario, Pollando, Bulgario) rezultigis la sukceson de la pola EDE. Kaj tiun ekzemplan atingon devas plufari la EDE-anoj kun la subteno de esperantistoj ankaŭ en aliaj

EU-landoj.

28. Mi ricevis la distingon Pola Kavalira Ordeno por mia agado por la popularigo de Esperanto

La pola EDE esprimis sian dankon al mi por la politikaj renkontiĝoj, organizataj de mi ekde pli ol dek jaroj en Alsóörs por la internacia agnoskigo de Esperanto, kaj signe de tio rekomendis min por la distingo per la Pola Kavalira Ordeno, ricevita en la jaro 2012 en Poznań.

La 6an de decembro 2012 Prezidento de Pollando Bronisław Komorowski dekrete atribuis al Eŭgeno Macko altan ŝtatan distingon: la kavaliran krucon de la Ordeno de Merito por la Respubliko Pollando pro la popularigo de Esperanto, akiraĵo de la pola kulturo. La propon por tiu grava distingo faris la pola asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE-PL) okaze de la 125-jara jubileo de Esperanto. La enmanigo de la kruco okazis en la Grandpolia Vojevodiejo en Poznań la 25-an de marto 2013, kien la kavaliro de la ordeno Eŭgeno Macko estis invitita kiel honora gasto. La kavaliran krucon de la Ordeno de Merito por la Respubliko Pollando persone transdonis la vojevodo de Grandpolio Piotr Florek (vidu la foton)²⁴.

Ĝis nun ne estis por mi grave ricevi rekonon de ie ajn, eĉ, en la plej multaj lokoj mi pliparte ne konformiĝis tute al la medio, kaj tenis ĉiujfoje certan distancon. Tio ne tro kontribuis al eventuala ricevo de distingoj. Tio tamen ne signifas, ke mi ne povis adaptiĝi, eble ĝuste la kontraŭon, ĉar mi kapablis plurloke rilati kompreneme al la homoj en mia ĉirkaŭaĵo, tial mi devis elvoki la impreson, ke mi kvankam bone komprenas ilin, tamen mi ne tute apartenas al ili.

Ĉi tiu apartaĵo kuniris kun mi kaj sentebliis ekde mia plej juna infanaĝo. Kiam en la tria klaso de la bazlernejo mi estis inter la pintolernantoj (eble la plej bona), mi ekploris, ĉar mi ne ricevis libropremion. Mi ne estis „laborista knabo” (kion oni pli malfrue ankaŭ sciigis al mia patrino). Poste en la mezlernejo mi same ne povis eniri inter la elitajn lernantojn de la lernejo. Kvankam mi estis unu el la plej bonaj, tamen ĉiam estis tiaj samklasanoj, kiuj, instruitaj hejme de siaj gepatroj, povis montri pli ĉi-rilate.

²⁴ <http://poznan.uw.gov.pl/fr/node/6647>

Mi sciis nur, ke mia patro en la pasinteco faris politikan agadon, ne konforman al la tiama tendenco, kiun mi ja tute ne konis. Kaj mi tute ne havis kontakton kun li, kvankam kvin jarojn post la milito (spirite detruita) li ree aperis hejme, sed ne vivis kun ni.

Tiel mi estis kiel infano, poste ankaŭ dum mia junaĝo tute sollasita, kio koncernas mian politikan orientiĝon. Mia patrino kaj mia ĉirkaŭaĝo montris neniajn politikajn manifestiĝojn. Pri la politika agado de mia patro mi aŭdis nur negativaĵojn. Oni diris, ke „li iradis agiti” (kio ĝi estas, mi longe ne sciis), kaj „estus pli bone, se li fermus la buŝon”.

Sed pro tio, ke en la tiama Jugoslavio ni vivis kiel hungara „nacia malplimulto”, ĉiam pli konsciiĝis en mi nia politika situacio. Al mi baldaŭ komencis ne plaĉi, ke mi apartenas al malplimulto. Dum mia studato en Beogrado mi jam tiel bone parolis la serban, ke oni ne scipovis distingi min de la ceteraj, tamen ĝenis min, ke ne estis malfermita por mi la vojo al la pli altaj pozicioj de la hierarĥio.

Kvankam ne tiel realiĝis tio, kion mi tiutempe volis, tamen lasis al mi lokon kaj tempon, por pripensi aferojn, pri kio en mia ĝisnuna evoluo mi estas nun tute kontenta. Eble funde de tie originas mia pli malfrua vasta interesiĝo, kiu komenciĝis per la filozofio, ĉar en ĝi mi trovis esprimmanieron en mia komplika situacio, por trovi poste mian vojon al la internacia politiko kaj sekve al la konkreta internacieco de Esperanto.

Surbaze de tiaj biografiaj cirkonstancoj mi ĝojas kun aparta kortuŝiĝo pri la Pola Kavalira Ordeno, donita al mi de la pola prezidanto de la respubliko, Bronisław Komorowski por la internacia popularigo de Esperanto.

Mi ricevis la rekonon en tia internacia medio, kie mi sentas min plej bone kaj plej hejmece, kiel “lokano”. Mi ricevis similan rekonon en neniuj aliaj landoj, kie mi pli longe vivis, kaj eĉ alproprigis la tieajn lingvojn, kutimojn, vivmanierojn. Tamen ĉie mi restis iom fremda. Kaj estas tiel bone! Mi estas determinita de nenio, tiel mi estas libera mondano.

Eble kio dialogike-internacie determinas min, estas la historia amikeco pola-hungara, al kiu aldoniĝas ĉe mi mia speciala proksimeco al la

slavaj popoloj. Mi parolas sudslavajn lingvojn en gepatralingva nivelo, eĉ mia familia nomo estas slavdevena: slovaka.

29. La lukto en la politika movado de EDE por la lingva demokratio estis la ĉefaj spaco kaj tasko de mia okupiĝo

En la lastaj jaroj la plej grava tereno de mia okupiĝo estis en la politika organizaĵo EDE. Ĝi komenciĝis kun miaj munkenaj amikoj. Laŭ la spertoj de miaj multe pli fruaj politikaj agadoj en la germana Libera Demokrata Partio (FDP) konsciiĝis en mi, ke post sia historia apero Esperanto elvokis politikajn reagojn al sia medio, kie ĝi aperis. La iniciato ne estis facila, ĉar dekomence ni trafis kontraŭstaron en esperantistaj rondoj, kiuj preferis neŭtralecon.

La renkontiĝoj (jam de antaŭ pli ol 20 jaroj) servis ĉefe por tio, ke post la diskutoj ni serĉu kaj trovu interkonsentajn solvojn pere de dialogoj, por fundamenti la pluan politikan agadon. Estis grave, ke EDE povu aktive partopreni la EU-parlamentajn elektojn. En ĉi tiu direkto ni povis atingi modestajn rezultojn en Francio, poste en Germanio. En la du aliaj landoj, kie nia movado estas leĝe registrita, do Pollando kaj Hungario, ni ne povis plenumi ĝis nun la por ni neatingeblajn altajn postulojn por la partopreno en la elektoj, tiel do ĝis nun ni funkciis ne kiel partio, nur kiel civila politika movado.

La kulminon de mia politika aktivado mi atingis praktike (se konsideri mian aĝon) ĉe la parlamentaj elektoj de la Eŭropa Unio en la jaro 2009 en la elektolisto de la germana Eŭropo-Demokratio-Esperanto. Mia nomo estis registrita en la kvara loko de la dekkandidata listo, kiu aperis en Germanio antaŭ ĉ. 80 milionoj da elektantoj. Nian kandidatliston gvidis la Nobel-premiita prof. d-ro Reinhard Selten. Do ĉe nia organizaĵo EDE-GE aperis la plej altranga scienculo kiel kandidato.

Jen mia prezentiĝo al la elektantoj en la germana EDE-listo antaŭ la EU-parlamentaj elektoj de 2009:

D-ro Eŭgeno Macko

*naskita en 1943 en Szabadka (tiam Hungario, nun Subotica en Serbio)
1962-1966 studo de arkitekturo en la Beograda Universitato
(diplomiĝo kiel inĝeniero)*

Laboro kiel konstruvinĝeniero en Wiesbaden kaj Munkeno

1970-1979 studo de filozofio, internacia politiko kaj sociopsikologio en la Munkena Universitato, doktoriĝo

De 1979 memstara kunposedanto de entrepreno kun 50-60 dungitoj

Post teoria-filozofia opkupiĝo pri mia doktoriĝa temo, la dialogika pensado mia atento turniĝis al Esperanto, ĉe kiu mi rimarkis la praktikan uzeblecon de ĉi tiu pensmaniero.

En 1989 mi partoprenis la unuan fojon universalan kongreson de Esperanto en Brighton (Britio). Jam post duonjara lernado mi pli facile kapablis konversacii en Esperanto ol post dekjara lernado de la angla.

De 1991 mi estas membro en la sciencista kolegio de AIS (Akademio Internacia de Sciencoj) en San-Marino. Ĉi tie mi spertis la plenan esprimkapablon de ĉi tiu lingvo ankaŭ en scienca kampo.

Sekvis tradukado de filozofiaj verkoj kaj originalaj studoj en Esperanton.

Jogon mi praktikas de mia infanaĝo. 1992-1995 klerigo al jogoinstruisto laŭ la normoj de la Eŭropa Joga Unio (EYU).

De 2004 membreco en EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto). En 2007 mi estis elektita vicprezidanto de la EDE-Federacio. De 2008 mi estas vicprezidanto ankaŭ de EDE Germanio.

Kial mi kandidatiĝis en la EU-elektoj por EDE?

De mia infanaĝo mi estas alfrontita kun problemoj de kunvivado de diversaj popolgrupoj. Mi plenkreskis en plurlingva medio. Nun mi parolas kvin lingvojn, malgraŭ tio mi scipovis nur tre limigite kompreni min en Eŭropo kaj en la mondo. De kiam mi ellernis Esperanton, mi scipovas senpere paroli kun homoj el ĉiuj partoj de la mondo. Bedaŭrinde ankoraŭ nur relative malmultaj estas, kun kiuj oni povas paroli en Esperanto. Tial mi volas, nun per politika agado, fari ion por tio, ke pli multaj homoj informiĝu pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ellernu ĝin, por ke en la futuro ni scipovu en pli senperaj interparoloj, demokratie interkomuniki kaj interkompreniĝi.

Mi aparte interesiĝas pri kultura kaj kleriga politiko, pacesplorado kaj

pri la demando, kiel paco efektivigebla. Mi volas labori por konservo de diversaj kulturoj kaj ties dialogika interkompreniĝo, por la dialogika kompreno de la historio, por la dialogika interakordigo de la historiinstruado inter la ŝtatoj membroj de EU kaj por la dialogo de religioj.

EDE – por ke Eŭropo interkompreniĝu!

Por la EU-elektoj de 2009 la konsisto de la prepara teamo de EDE estis optimuma. Ni estis ne multaj, sed troviĝis inter ni homoj kun kapabloj, kiuj necesis por la lanĉo de tia nova politika movado, kaj scipovis efektive kunlabori por la komuna celo. Fronte de la listo staris Nobel-premiita scienculo, kiu tiam aĝis iom pli, tiel li ne kunlaboris intense kun ni, sed lia ĉeesto al ekstero efikis tre efektive. Kio plej gravis, ni scipovis ĉiuj racie kaj celkonduke kunlabori.

Kvankam la prezidanto ankoraŭ ne parolis Esperanton, sed sekve de sia internacia orientiĝo estis ravita de nia movado. Pri politiko kaj jurscienco li jam havis ankaŭ pli frue spertojn, tiel li bone scipovis reprezenti EDE, aparte alekstere en germanlingvaj intervjuoj por la amaskomunikiloj, krome li skribis trafikajn artikolon, impresajn por la ekstera mondo, alparolante neesperantistan publikon. Kompreneble, troviĝis inter ni spertaj kaj bone parolantaj esperantistoj, kiuj plurrilate diferencis de la ĝisostaj „klasikuloj”, tiel ili scipovis bonrezulte kunlabori kun la prezidanto.

Mi havis aparte bonan rilaton al nia prezidanto. Eble mi rajtas diri ankaŭ, ke sub mia influo, post sia esploro en Interreto li decidis aliĝi al EDE, poste kunlabori kun ĝi ĉiam pli intense. Dum mallonga tempo mi sukcesis komprenigi al li la internacian dialogikan taskon de EDE, kiun li baldaŭ entuziasme alproprigis, poste kun profunda kompreno interpretis, kio ankaŭ pruviĝis poste ĉe la ellaboro de nia programo.

Troviĝis inter ni fakuloj, laborantaj en informaj komunikiloj, kiel ĵurnalisto kaj radioredaktisto, kiuj scipovis tre bonrezulte kunagadi en tiaj bazaj organizaj laboroj. De ili dependis la konsistigo de reklamoj kaj la sukcesa formado de la informado por la ekstera publiko. Ili ellaboris ankaŭ kelkminutan reklamfilmeton, kiu aperis senkoste en la unua programo de la germana televido post la ĉefaj novaĵoj kune kun la reklamoj de la aliaj partioj, partoprenantaj la elektojn.

30. Rezultoj de EDE en la EU-parlamentaj elektoj kaj la postaj opinioj kaj kritikoj

Miaparte mi estis kontenta pri la rezulto de la elektoj. Mi provis fari plastike komprenebla tion, kio en EU estis esprimebla nur en iaj 0,0... procentoj, ke tiuj, kiuj nin elektis en Francio kaj Germanio, plenigus tutan stadionon. Ĉu la opinio de tia „amaso” en demokratio estus tute ignorebla? Krome kaj krone, de ni estis reprezentata ankaŭ la politika opinio de sciencisto, havanta la plej prestiĝan distingon de la intelektula homaro, la Nobel-premion.

Oni devus kompreni nian agadon kiel provon de ĝermanta politika movado por la lingva demokratio, proponanta Esperanton kiel solvon, do movado, kiu estis efektive ankoraŭ ĉe la komenco de sia disvolviĝo kaj kiu havis ankoraŭ multajn farendojn por la pluevoluigo. Persisto en la politiko estas rara eco, la partneroj estas tiom konvinkitaj pri sia vero, ke tuj ili volas rikolti laŭrojn. Kaj se tio ne efektiviĝas, ili prefere forĵetas la ne tute kontentigajn rezultojn, atingitajn ofte per peniga antaŭa laborado. Io tia okazis ankaŭ ĉe la germana EDE. Pluraj ne akordis pri la balotrezultoj, kaj ekŝiĝis el la laboro de la movado.

Mi povas diri, tio estis politike sufiĉe naŭva kondukmaniero, ĉar kontraŭ sia konvinko ili ne plu faris tion, por kio antaŭe ili jam dediĉis tre multan tempon kaj energion. Ili simple kapitulacis. Ĉe EDE kelkaj transsaltis en alian politikan formacion, esperante atingi tie per nova komenco pli da sukcesoj. Forĵetinte Eŭropon, ili intencis fondi tutmondan partion, la t.n. Unu Mondon. Ili opiniis, ke al Esperanto pli konvenas la monda ol la eŭropa determineco. Bedaŭrinde ili naŭve forĝis tiun politikan realaĵon, kiu ĝuste en EU havis sian sencon (post la tre bela Esperanto-idealismo) en la konkreta praktiko.

Poste sekvis debatoj en Interreto, kie kelkaj kun mi provis konvinki la deviintojn pri senceco de ilia malkonstrua agado. Bedaŭrinde sensukcese. Komenciĝis la distaŭzado de EDE. Nia pravo pruviĝis nun jam post du EU-elektoj, en kiuj la malfortiĝinta EDE-GE ne povis partopreni. Kaj la t.n. (germana) Unu Mondo tute disfalis, eĉ, en la lastaj EU-elektoj Ulrich Matthias aperis kiel kandidato en la lasta loko de nia EDE-listo.

31. Mi prezentos sube la tekstojn de kelkaj debatoj, kiuj antaŭis ankoraŭ en 2010 ĉi tiun bedaŭrindan diseriĝon

Diskuto inter Ulrich Matthias (UM), Unu Mondo kaj Eŭgeno Macko (EM) el Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE) pri la kunlaboro de EDE kaj UM

Ulrich Matthias >Eble do montriĝos, ke en Germanio ekzistos ĉefe Unu Mondo, kaj en Francio ĉefe EDE.<

Eŭgeno Macko: *Sed mi kredis, ni volis havi internacian politikan asocion aŭ partion. Se ni ne kapablas kunlabori eĉ kun nia plej proksima najbaro, tiam kion ni celas en la mondo? Ni jam havis en la historio okazon, kiam eŭropaj ŝtatoj volis propravole "tutmondiĝi" kaj sekve ili ek militis en Eŭropo.*

UM >La „eŭropa ideo” estis tre aktuala en la 1950aj jaroj. Sloganoj kiel „por pli da Eŭropo” allogas nuntempe malmultajn, kaj same ank-aŭ „pli da demokratio” ne allogas multajn – fakte tion postulas en Germanio eĉ ekstremaj dekstruloj.<

EM: *Nun Eŭropo ne plu estas ideo, sed jam konkreta realaĵo, kiu estas plibonigenda. „Ideo” (bedaŭrinde) restis ĉiam plu la „justa mondo”. Konkretaj internaciaj faroj necesas, por ne resti nur ĉe la ideo.*

Ni ne agu en dialektika rilato al dekstruloj, ĉar tiam ni restas en la sama kvalito. Demokratio estas fenomeno, kiu evoluas (en Eŭropo) ekde la antikvaj grekoj kaj ĉiam plu ĝi disvolviĝas.

UM >„Pli da etiko” sonas miaopinie pli bele.<

EM: *Politiko ne estas „etiko” kaj ankaŭ ne „io bele sona”, sed uzo de demokratie realaj ŝancoj en la socio, por solvi aktualajn problemojn. Aktuala problemoj estas ankaŭ la lingva demokratio en EU. Jes, ankaŭ alie en la mondo, sed en EU jam ekzistas (komenca) internacia strukturo, en kiu oni povas konkrete labori por la solvo.*

UM >Sed en Germanio la situacio estas alia. Jam unufoje, en 2004, EDE-Germanio disfalis, kaj laŭ mia impresoj nun estas risko, ke tio okazos denove. Eble do en Germanio povus esti eĉ bone por EDE, se ĝin „transprenus” Unu Mondo, ĉar tiam almenaŭ grava parto de la idealoj de EDE pluvivus en la germana politiko.<

EM: *En Germanio la situacio en la senco de la lingvaj problemoj kaj politiko baze tute ne estas alia ol en iu ajn alia lando en la mondo. Sed en EU montriĝas kadroj, en kiuj eblas komenci konkretan laboron kaj proponi solvon de la problemoj.*

En Germanio EDE ne disfalis post 2004, sed ni konstruis ĝuste sur la sama bazo kaj atingis ses mil subskribojn. Kaj ankaŭ ĉi-foje ĝi ne disfalos. Pli konsilinde estus por Unu Mondo konstrui sur ĝi memstare, aŭ reunuiĝi al EDE, ol instigi la disfalon kaj eble tiel atendi eblan konstruon sur la pecoj de la ruino.

En la sekva diskuto mi ankoraŭ provis malpliigi la malakordon kun Unu Mondo, t.e. laŭeble kunlaborigi EDE kun UM. Pli malfrue montriĝos, ke tio havis nenian sencon. Poste pro internaj konfliktoj UM baldaŭ disfalis, kaj ĉiuj ĝiaj membroj fondintoj, kiuj estis venintaj el EDE, kune kun Ulrich Matthias kaj Alfred Schubert, forlasis la partion. Jen mia komento:

Nun ni devas atenti ne kaptiĝi per la nura kontraŭeco al UM. Fakte ni havas multajn komunaĵojn, kiujn EDE jam pli frue ol UM emfazis. Aliflanke ni devas tute klare diri, de kiuj ecoj ni ne volas foriĝi.

Pri mia opinio (nur mallonge): al la logo de EDE kaj la tri bazaj nocioj en ĝi ni restu fidelaj. Ni neniam kontraŭis UM, sed ni agas konkrete en Eŭropo. Tiel ni vidas pli da ŝancoj envolvi ankaŭ neesperantistajn civitanojn en EU. Tamen ni ne kaŝas nian intencon proponi pere de Esperanto solvon de la konkreta lingva problemoj en EU. (Ni ne kontraŭas, se UM volas tutmonde solvi ĝin.) Ĉe tia movado estas bazaj por ni demokratio kaj ĝia evoluigo. (Ĉiujn ĉi tri faktorojn opinias UM ne gravaj.)

Poste ni povos diskuti pri la maniero de la demokratio kaj aliaj aferoj, kiuj ĝis nun ne estas fiksitaj en la federacia programo. En la landaj asocioj eblas eĉ kelkaj diferencoj, kiuj ne tro malproksimiĝas de la ĝenerala linio. Sed ĉi tiujn aferojn ni devas solvi komune, demokratie. Ne individue elpaŝi kaj kredi tiel trovi la oran bovidon, eĉ malpli kontraŭ niaj ĝisnunaj kunagantoj. Ĉar se ni ne scipovas solvi tiujn problemojn inter ni, ni ne plu taŭgas ankaŭ por la monda komunumo.

La provoj de UM proksimiĝi al ILEI kaj EEU ne estas tre danĝeraj por

EDE. Stefan MacGill favoris jam la fondiĝon de EDE en Hungario kaj la opinion de Zlatko Tišljari ni konas ankaŭ en nia diskutlisto, kaj mi ne povas imagi, ke Seán Ó Riain pensas tute alie pri tiu afero.

Kio koncernas prof. Glossop el Usono, ankaŭ mi mem estas kontenta pri liaj mondcivitanaĵaj opinioj (kiuj estas legeblaj en liaj libroj). Ni en EDE fakte ne kontraŭas lin (verŝajne nek li nin), sed ni volas nun pli konkrete labori. Sed li verŝajne ne estas sufiĉe informita pri la aferoj en Eŭropo.

Kio koncernas Silber, mi ne povis legi, ke li favoras nun UM, ĉar li ŝanĝis sian esprimon kaj nun diras „ne en la kuirujo sed en la tagĉambro estis fondita UM”. Plie mi vidas iun ĝeneralan ĝojon pri la kvereloj en la nova esperantista politika movado. Sed la rimarkojn el la Civito ofte instigas klara akriĝo de kontraŭaĵoj.

En la venontaj tagoj ni planas en la estraro de EDE-GE organizi telefonkonferencon kaj priparoli la problemojn, kaj se necese (verŝajne jes), ŝanĝi ankaŭ la sidejon.

Ekzemple: en la la demandoj de Guillem Gómez Blanch el Barcelono/Hispanio al Ulrich Matthias plene montriĝas la problemoj de EDE-GE.

Li citas en sia hejmpaĝo Ulrich Matthias kaj skribas:

“En Germanio ni nun devas atente sekvi la evoluon de EDE, al kiu tiel mankas agemaj homoj, ke momente la sola tre konkreta propono pri ĝia estonto estas, ke Unu Mondo ‘transprenos’ ĝin, t.e. ke la membrokunveno transformos la asocion al la partio Unu Mondo, kiu do transprenos la juran personecon de EDE. Tia paŝo trovos subtenon de kelkaj membroj, sed ankaŭ kontraŭstaron, i.a. pro tio, ke esperantistoj vidas ŝancon ĝuste en la lingva problemo de EU, aŭ ke iuj opinias la demokration en EU nepre plibonigenda. Tiam kontraŭstaron ni eble povus mildigi, se ankaŭ la germana Unu Mondo enmetus en sian programon proponon pri justa kaj efika kompreniĝo en EU pere de Esperanto. Kaze de transpreno ni relative facile ekhavis nian unuan landan sektion kun membraro, banka konto kaj financaj rimedoj – tamen mi povus ankaŭ imagi, ke tiukaze ni donacus la financan havaĵon de EDE-Germanio al la EDE-Federacio, por ke neniu plendu pri ‘ŝtelo’.”

Al „Sinjoro de Unu Mondo“ (Ulrich Matthias) metis Guillem Gómez

la sekvajn demandojn:

>Mi volas demandi vin: kial vi ne simple fondas novan partion kaj forgesas EDE? Kial vi volas “transpreni” la juran personecon de EDE? Vi volas ja detrui EDE Germanujon. Kial? Ĉu vi timas ĝin aŭ ĉu vi abomenas ĝin? Senkaŝe, tio ŝajnas al mi pli inspirata en “Tekniko de la ŝtatpuĉo” ol de iu kristana libro!<

Respondo de Ulrich Matthias al la demandoj de Guillem Gómez:

Kara Guillem, se troviĝos agemaj homoj, kiuj volas daŭrigi la agadon kaj asocian vivon de EDE-Germanio, tio kompreneble eblos, kaj mi ne malĝojus pri tio. Mi ne kontraŭus, se EDE-Germanio elĵetus min kaj translokus la oficialan sidejon de EDE-Germanio (kiu daŭre estas la loĝejo – aŭ la leterkesto – de mia familio). Sed inter la germanaj EDE-anoj parto subtenas la ideon de transiro al UNU MONDO, i.a. almenaŭ 4 el la 10 kandidatoj de la pasintaj eŭropaj balotoj, kaj ankaŭ en la ĝenerala germana Esperanto-movado (inter homoj, kiuj iomete subtenis EDE okaze de la balotoj) mi trovis pli da pozitivaj ol negativaj reagoj al tiu ideo. Notu, ke gvidi registritan politikan asocion ne estas tute facile. Necesas okupiĝi pri kontaktoj al loka tribunalo, la financ-oficejo, la balotestro kaj atenti pri multaj asociaj formalaĵoj. Se troviĝos entuziasma kaj kapabla nova gvidanto de EDE-Germanio, tiam havas sencon daŭrigi EDE kaj starigi germanan sektion de UNU MONDO (kun jura personeco) tute aparte. Se ne troviĝos tia gvidanto, miaopinie la daŭrigo de EDE-Germanio ne havos veran sencon, kaj la plej bona solvo estus, se UNU MONDO transprenus ĝin. Tiam eĉ ne necesus ŝanĝi la sidejon. Kaj EDE plu havus almenaŭ aktivan „fratan” organizon en Germanio. Mi tute ne abomenas EDE, sed pensas, ke ĝi povas esti tre utila, se ĝi havas kapablajn aktivulojn. Tia estas la situacio en Francio. Ne estas mia celo detrui EDE, tamen mi sentas min malkomforte, kiam loĝas sub mia tegmento du partioj, el kiuj mi tre ŝatas unu kaj la alian iom malpli. Ĉiukaze la decidoj pri la estonto de EDE okazos per demokratia decido de la membraro. Mi ĝis nun nur proponis konkretan ideon, kiu povus cedi al pli bonaj ideoj, se aperos tiaj.

32. Elstarigitaj ekzemploj el interretaj raportoj, kiuj donos

mallongan trarigardon pri la problemoj de la EDE-kunlaboro

Dum miaj plurfojaj renkontiĝoj kaj preparoj kun la gvidantoj de la franca EDE (en Parizo kaj kastelo de Greziljono eĉ trifoje) mi ĉiufoje emfazis, eĉ avertis, ke EDE havas sencon nur kaj sole internacie. Kvankam la francoj iniciatis ĉi tiun movadon kiel partion por la disvastigo de la Esperanto-politiko, t.e. por la politika postulo de internacia demokratia interkompreniĝo en EU, ankaŭ ili ne devus enmemiĝi, sed kunlabori kun la civitanoj de la aliaj eŭropuniaj ŝtatoj por komuna lingvodemokratia celo.

Mia raporto el la kastelo de Greziljono okaze de aŭtuna renkontiĝo en la paĝaro de la EDE-Federacio:

La 26an kaj 27an de oktobro de 2013 en la kastelo Greziljono/Francio, kunvenis 12 delegitoj de la Franca EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) kaj unu delegito de la germana EDE, politikaj partioj, por preparoli la partopren-strategiojn en la eŭropuniaj parlamentaj elektoj de 2014, por koordinigi komunan balotstrategion de la du federaciaj EDE-asocioj. En la aliaj tri sekcioj (Hungario, Pollando, Bulgario) reale ne estas atendebla ŝanco partopreni la venontjarajn elektojn pro la tro altaj partoprenpostuloj.

La kunveno pasis en laborintensa, internacie amika atmosfero. Ni praktikis ne nur la esperantistajn postulojn paroli nur Esperante en kunvenoj, sed uzis la proponon de EDE paroli por Esperanto ankaŭ nacilingve en la senco de la federacia programskeleto, proponita kulturekologia dulingveco. Tio okazis praktike tiel, ke se inter la francparolantaj diskutantoj iu ne komprenis la francan kaj forlasis la salonon, la ĉeestantoj parolis france, sed kiam li revenis, oni ree parolis internacilingve.

Per tiu praktiko ni plene konvenis al la procedo de EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto), kiu esprimas la rilaton de la tri nocioj, kaj al la „nova pensado“ de la eŭropa filozofio, post la idiote unueca idealismo. La tri estas daŭre unu kun la aliaj en movada rilato. Ĉiu nur en si mem unuece kondukus al memsufiĉo. Realan sencon, ĉi tie kaj nun, por la aktuala politiko havas la tri kune, nur en la rilato unu al la aliaj.

Eŭropo en si mem estas idiotaĵo, sen rilato al demokratio. La demokratio mem deformiĝas sen reala internacieco al nacia idiotaĵo. Esperanto donas en tiu triopo la realan internacian sperton tiakvalite, kiel ĝis nun nenie alie en la mondo eblis atingi. Kaj Esperanto sen rilato al la realo, en si mem, ankaŭ idiotiĝas.

La 6a Postsomera Universitato de EDE estis parto de staĝo AŬTUNE, en kiu partoprenis pli ol 40 esperantistoj. Unu el la plej interesaj aranĝoj estis la prezento de teatraĵo de ses gejunuloj en Esperanto. Kvankam ili estis nur amatoroj, la ludkvalito estus eĉ por profesiaj aktoroj sufiĉa. Sekve ili ricevis laŭtegan aplaŭdon de la publiko.

Eksterordinare bongustis la manĝaĵo preparita de spertaj kuiristoj. Povis elekti vegetaranoj kaj viandomanĝantoj el la sortimento. Ni vivis, kiel germana proverbo diras: wie Gott in Frankreich, kiel Dio en Francio.

Per plurcent artikoloj kaj laboraĵoj mi provis difini la politikan taskon de EDE kaj Esperanto, interalie okaze de retaj dialogoj kaj diskutoj. Sube mi montros kelkajn elektitajn ekzemplojn.

33. EDE kaj Esperanto kiel politikaj movadoj. Sed kio estas la diferenco inter ili?

Iu esperantista partio devus, laŭ la klasika politika kompreno, efektiviĝi, per ĉiuj siaj disponeblaj rimedoj, la principojn de la Esperantomovado. EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) ne volas batale venki Esperanton, sed solvi per Esperanto politikan problemon de la lingva demokratio en la Eŭropa Unio. Esperanto mem estas nur rimedo sed ne celo de EDE.

Politiko estas la plej ĝenerala ago krei bonfarton en la socio. Nuntempe socia evoluo eblas nur demokratie. Al socia bonfarto apartenas lingva demokratio. Pro tio agas EDE politike.

Esperanto jam montriĝis kiel plenkapabla lingvo ĉiufланke en la uzado, nun necesas diskonigi tiun fakton, por ke ĝi povu solvi la aktualan problemon de la lingva demokratio en la Eŭropa Unio. Sed ne sufiĉas nur ripeti la avantaĝojn de Esperanto, necesas ankaŭ montri, kial ĝi estas bezonata en la socio, kaj tio estas politika laboro.

EDE staras kritike al la Esperanto-movado kaj ne alprenas ĉiun principon memkompreneble. Antaŭe ĝi ekzamenas la aktualan disvastiĝan formon de Esperanto kaj ankaŭ de la demokratio mem en la aktuala evoluostato. Sekve EDE ĉi-maniere prenas serioze la tempon.

Tiu ĉi agadmaniero okazas precipe laŭ la principoj de la dialogika pensado, naskiĝinta samtempe kun Esperanto. Tiutempe tamen nek Esperanto, nek la dialogika pensado havis ŝancon disvastiĝi ĝenerale. Anstataŭe sekvis du teruraj militoj. Depost tiam maturiĝis kelkaj spertoj, kaj alvenis la tempo disvastigi kelkajn ekkonojn ankaŭ ĝenerale (t.e. politike).

Kvankam la dialogika principo sidis ĉiam en la fundamento de Esperanto, longe ĝi ne havis eblon libere evolui dum la historio. Pli ofte eĉ kontraŭe. La Esperanto-movado mem degeneris al antikveca, idealisme dialektika, superema pensmaniero, postulanta iun „finan venkon“. Tiu dialektika venkopensado estis fakte malsano de la pasintaj idealismaj tempoj. La nova dialogika pensmaniero de interkompreniĝo povis denove montri sin kiel daŭre restanta valoro nur post la memneniĝo de la bataladoj.

La nova, dialogika metodo en la politiko komenciĝis en la kvindekaj jaroj de la lasta jarcento kiel necesa internacia mondpolitiko. Tiu metodo fakte kuŝas ankaŭ ene de la originaj principoj de Esperanto, sed ĝis nun ĝi ne povis libere disvolviĝi. Novan ŝancon ricevis tiuj principoj perceptiĝi kaj pluevolui en la nuntempa Eŭropa Unio. Antaŭ nur kelkaj jardekoj tiusenca agadmaniero publike estis ankoraŭ tute neimagebla.

En la nuna, nova situacio EDE ekkonis la aktualecon de la jam oficialaj lingvaj rajtoj, kiuj devus esti ankaŭ politike, oficiale postulataj. Por tio necesas plenforte agi (ne nur hobie, kiel ofte ĝis nun okazis en la Esperanto-movado) kaj kunigi ĉiujn tiujn civitanojn, kiuj ekkonis el diversaj kialoj kaj spertoj la neceson de internacia kunlaboro. Implicitaj devus esti ankaŭ tiuj personoj, kiuj pretas apogi la instruadon de la Lingvo Internacia, eble poste ankaŭ iam mem lerni ĝin, do ne nur tiuj, kiuj jam parolas Esperanton, en politike unuiĝinta movado.

EDE ne batalas por la „fina venko“ de Esperanto. Tio ja neniam kuŝis

en la origina senco de Esperanto, tio estas nur en la senco de la pensmaniero de la iama idealisma kaj ideologia tempo. La vera novaĵo, troviĝinta jam en la origino kaj restinta ĝis nun, estas, ke Esperanto volas doni rimedon por demokratia interkompreniĝo. Pro tio EDE uzas Esperanton ne por ĝi mem, sed pro ties propra, implicita dialogikeco.

Simile al AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj en San-Marino), kie Esperanto estas uzata kiel internacie neŭtrala, interkompreniĝa lingvo apud la aliaj, oficiale akceptitaj lingvoj en la komunikado inter sciencistoj kaj akademianoj – ne identiĝante kun la Esperanto-movado mem, sed montrante la altan funkcikapablon de Esperanto ankaŭ en diversaj fakoj de la scienco.

Tute novo estas en la nuntempa politiko postuli internacian demokratiion. Kvankam tia provo efektive ne estas nova, nur la metodo estas nova. Jam antaŭe en la historio, precipe la maldekstraj socialistaj-komunistaj movadoj preferis internaciecon. Tamen nur per dialektika metodo. Kiel ni jam povis sperti en la historio, tiel ne eblis atingi efektive ian solvon, bedaŭrinde nur la malon. Tiel la nuntempaj provoj havas jam la spertojn de la malsukcesa internaciismo. Post lerno el ili, pruvigis taŭga la dialogike necesa metodo en la politiko de la internaciaj rilatoj.

Nuntempe, jam kelkaj politikaj movadoj komencis pensi en la dimensio de la internacia demokratio. Tio montras, ke la problemoj estas tute aktuala, kaj EDE ne moviĝas en iu tute mondfremda sfero. Sed la solvopropoj de aliaj partioj ne estas sufiĉe profundaj. La plejmulto restas ĉe la jam plej ofte internacie uzata angla lingvo, sen pripensi la fakton, ke tiu solvo de la lingva problemoj estas profunde nedemokratia. Pro tio ilia tuta klopodo por la internacia demokratio kontraŭdiras al si mem.

Internacia demokratio devus etendiĝi ĝis la bazo de la socio, ĝis la simplaj, unuopaj civitanoj, por kiuj estas necesa iu facile lernebla, neŭtrala internacia lingvo, kiu apartenas al neniu membro de la komunumo. Ke tiu lingvo jam ekzistas, tion scias la esperantistoj, ili jes jam uzas ĝin ĉiutage. La problemoj estas, kiel diskonigi ĉi tiun fakton en la mondo.

Kaj nun, kiel tion pli efektive fari ol politike, per la plej ĝenerala movado en la socio?

Pro tio agas EDE politike, proponante Esperanton kiel fundan solvon de la problemoj de la lingva kaj internacia demokratio, nun konkrete en la Eŭropa Unio.

34. Kion necesus ŝanĝi ĉe EDE?

Ĉu necesas ia ŝanĝo ĉe EDE?

Principaj diskutoj pri EDE komenciĝis en la kunvenoj dum la UK en Bjalistoko. Jes, nun post la elektoj ni povas permesi al ni debati ankaŭ bazajn elementojn. Ĉu ŝanĝi iujn el ili? Kaj se ne, ĉu per tio povus pli-fortiĝi nia profilo? Plivigligis la diskuton en la reto la propono de Ulrich Matthias kaj lia edzino Nan pri la „tutmondigo de EDE“.

Ĉe la serĉado de pli efektivaj fundamentoj estis submetitaj tre diversaj, eĉ kontraŭdiraj proponoj. Ĉiuj de la tri ĝisnunaj bazaj kolonoj de la movado: Eŭropo, demokratio kaj Esperanto estis pridubitaj de diversaj plibonigantoj.

Ni aŭdis la jam antaŭe konatan argumenton de Michael Cwick, ke en la nomo de la partio ne estu Esperanto. Eĉ pri la vorto demokratio kelkaj ne estis kontentaj, ĉar ni ne povas difini la nocion, pro tio ĝi devus esti forlasita, aŭ ni devus alie nomi ĝin, ekz. demokrateco – laŭ Johan Derks. Kaj nun la propono de Ulrich Matthias forlasi Eŭropon kaj tutmondiĝi.

Dum kaj post tiuj viglaj diskutoj eble estas necese atentigi pri kelkaj faktoj, kiujn gravas ne perdi el la vido ĉe la demokratia decido de la estonta ĝenerala linio.

En la nocia formulo de EDE Eŭropo ne havas geografian sed politikan signifon. Pro tio ne ĝenas la EDE-movadon, se ankaŭ ekz. politike al Francio apartenantaj oceaniaj insuloj partoprenas la elektojn (Bert Schumann vidis tion kontraŭdire en EDE), sed ekz. la geografie al Eŭropo apartenantaj Serbio aŭ Albanio (ankoraŭ) ne povas partopreni. La Eŭropa Unio ne estas geografia ento (Eŭropo estas nur duoninsulo de Azio, ne estas difinebla per geografiaj limoj), sed konvencia laŭ demokratia traktato, kiun ĉiuj aliĝintaj ŝtatoj akceptis. Sed tiu demokra-

tio, per kiu staras kaj falas EU, estas plibonigenda kaj plibonigebla, kaj por tio necesas politika laboro.

Ĝenerale politike ni povas nin apogi ankaŭ tutmonde, sed konkreta institucia kunlaboro eblas nur por EU-membroj en EDE, ĉar nur tiuj rajtas partopreni la elektojn de la Eŭropa Parlamento. Pro tio moviĝas EDE politike ene de la Eŭropa Unio, por ne perdiĝi en la multflanka tutmondeco, sed resti pli konkreta kaj travebla. Tial ĝi akceptas la demokratajn regulojn, laŭ kiuj aliĝis la membroj de EU, sed konsideras sia politika tasko subteni, defendi kaj (tre grave!) pluevoluigi la jam ekzistantan demokration al iu tute nova en la historio: al internacia demokratio. (Se iu kredas, ke la vorto Eŭropo ne estas politika, mi proponas diskuton kun naciistoj kaj atendi la reagojn.)

Se prijuĝi la rolon de EDE, temas ne nur ĝenerale pri demokratio sed pri pluevoluigo de la internacia demokratio.

Valoras legi la libreton „Kio estas demokratio?“, eldonitan en 2000 de UEA. Tie eblas ricevi bazan orientiĝon, sed ne atendi difinon aŭ ekzaktan respondon, ĉar tio simple ne eblas. Fakte tion, kio estas demokratio, eblas pli bone kompreni en la konkreta politika laboro.

La pluevoluigo de la demokratio estas politika tasko kaj daŭra farendo. Ĉar kiel ja ĉiam en la historio, la establitaj tavoloj kontraŭstaras ŝanĝojn, aliflanke la plimulto, en kies intereso estus la evoluo, ne havas konscion pri tio. Pro tio politika laboro troviĝas inter la kontraŭstaro de la establita reĝimo kaj la klopodo klerigi la plimulton de la civitanoj pri la propraj interesoj kaj rajtoj, gajnante ilin por kreo de komuna povo, kapabla decidi ilian propran intereson.

Por tio en EU ni havas nuntempe eksterordinare favoran historian ŝancon. Aŭ ĉu iu imagas, ke nur antaŭ dudek jaroj iu politike civitana movado povus ankaŭ nur revii pri simila laboro, evoluigi la internacian demokration de sube. Tion en EU ni nuntempe povas kaj ankaŭ rajtas fari.

Se ni eŭropanoj sukcesos ellabori demokratie aktualajn internaciajn regulojn, laŭ kiuj EU estonte povus funkcii, nur tiam restos ankaŭ ŝanco por EU por la pluekzistado. Pro tio nuntempe nenie alie en la mondo estas tiel urĝe necese kiel en Eŭropo, konkrete evoluigi la interna-

cian demokration. Ĉar nenie alie ekestis tia nova situacio internacia, kiel en la inter si sendependaj naciaj ŝtatoj, kiuj memvole aliĝis al komunumo, kiel en Eŭropo.

Ke EDE tuŝas gravan politikan taskon de la estanteco, obeserveblas jam en la nuntempa politika pejzaĝo. Jam ankaŭ aliaj novaj kaj eĉ establitaĵoj komencas okupiĝi pri la temo. Sed neniuj aliaj havas tiel fundamente demokratian proponon, kia estas esprimita per la tria nocio de EDE, Esperanto. Ĝis nun povis funkcii demokratio en naciaj ŝtatoj, kun iu por la plejmulto komprenebla nacia lingvo, sed vere internacia demokratio lastkonsekvence povas funkcii nur kun iu neŭtrala lingvo. Pro tio ni devus uzi ĝin kaj atentigi pri la solvo per Esperanto.

La tri nocioj Eŭropo, demokratio, Esperanto interrilatas, sekvante kaj subtenante unu la aliajn. Ĉu *demokrat-io* aŭ *demokrat-eco*, en la politika praktiko ne multe gravas (por mi persone pli plaĉas demokrateco). Tio estas lingvistika aŭ filozofia demando. Anstataŭ la nobla teorio de Johan Derks estus pli granda servo por Esperanto revigligi la jam de li iniciatitan fondon de EDE en Nederlando, por estonte havi pli da publiko, kiu interesiĝas pri prudentaj pensoj en Esperantujo.

Eŭropo en si mem estas internacia

Senpere kompreni ĉi tiun evidentajon ĝenas nia ĝisnuna klasika pensmaniero, kiu en la eŭropa historio deformis nian homan senperecon. Eĉ en esperantaj rondoj ni ne sukcesis subpremi tiun kutimon, kvankam ĝuste tie temas pri tio. En UK-oj mi ofte spertis, ke meze de interparolo mia dialogpartnero subite demandas min; „de kiu lando vi venas?“ Sekve de tio, Eŭropon ni volas ankoraŭ kompreni kiel iun novan nacian ŝtaton kun fiksjaj limoj kontraŭ la resto de la mondo, kiel la historiaj nacioj de Eŭropo rilatis antaŭe unu al la aliaj. EU kaj la nova politika situacio en Eŭropo ĉesigis fakte ĝuste tiun malnovan situacion, sed ĉi tiun ŝanĝon niaj pensoj evidente ankoraŭ ne kapablas sekvi. Ĝuste la pli bonan komprenon pri ĉi tiu nova konstelacio ni povas trejni en la UK-oj kaj atentigi la reston de la mondo, pri tiu jam ekzistanta ebleco. Tion fari estas politika tasko de EDE.

Kial EDE en Eŭropo?

EDE estis fondita en EU ne por tio, ke ekzistu ankoraŭ unu plia mal-

granda partio inter la jam ekzistantaj kelkdek en preskaŭ ĉiu lando, kun la ambicio pli bone plenumi iujn aferojn ol la establitaj grandaj partioj, jam okupiĝantaj pri la respektivaj temoj. **Sed por fari ion, kion la aliaj ĝis nun ne faris.** Nek pro tio, ke en iliaj membroj ĝis nun ne sufiĉe maturiĝis la konscio pri la homaj rajtoj kaj sekve pri ĉi tiuj problemoj, nek pro la influo de fortaj interesgrupoj, kiuj kontraŭas tian solvon.

La tempon oni ne povas kontraŭagi, tio jam kelkfoje montriĝis en la historio (lastafoje ĉe la medioprotektado). Tiel **aktualiĝis nuntempe la kultur- kaj lingvoprotektado.** Kaj tiu ĉi temo estas la plej grava por EDE. Montriĝis tre akuta problemo en la internaciigo de la eŭropaj civitanoj sekve de la nekompreneco de la internacia demokratio, kiu postulas solvon por vicoj da edukadaj problemoj en lernejoj, socipsikaj kaj lingvistikaj kontaktoj de diversnacilingvaj kaj diverskulturaj civitanoj. Pro tio la edukada politiko kaj disvolvo de la internacia konscio per edukado estas unuaranga tasko por EDE.

Tio ne signifas, ke EDE ne esprimas opinion kaj ne alprenas starpunkton pri aliaj gravaj ekz. sociaj, ekonomiaj, politikaj ktp temoj. Sed ĝi volas emfaze fari tion, pri kio ĝi plej bone kompetentas. Tiusence ĝi estas plene en la ĝenerala tendenco de la alte specialigita mondo, laŭ kiu en demokratiaj sistemoj ĉie plimultiĝas malgrandaj politikaj partioj. Pro tio por la efektiva kunlaboro inter la ĉiam pli specialiĝantaj politikaj fortoj necesas estonte pluevoluigi ankaŭ la demokration kaj en la procezo de tutmondiĝo, specife la internacian demokration.

EDE ne volas ekskluzivigi Eŭropon en la mondo

Male, ĝi volas montri, ke Eŭropo mem bezonas helpon subpremi sian multflanke deformitan homaranecon, por denove reveni al la simpla, senpera humaneco, ĝi ja mem dependas de la aliaj mondopartoj kaj kulturoj. Ni en Eŭropo devas konsciiĝi, ke la eŭropa kulturo plej multe minacas la mondon, kaj la minaco kreskos, se ankaŭ la aliaj mondopartoj sen konscia distanco alprenas ĉi tiun kulturon kaj lasas la propran flankenmeti, ofte eĉ perdiĝi aŭ ekstermiĝi.

Pro tio bonvolu ne miskompreni la eŭropecon en EDE, kaj lasu fari por eŭropanoj la propran hejman taskon, por denove povi humane par-

topreni en la monda komunumo, ĉar nenie alie en la mondo estis iam ajn organizita malhumaneco kun tia „scienca metodo“ kiel en la olda Eŭropo. EDE havas en la fundamento de sia statuto kaj en ĉiu pluevoluigita programo la principojn de la Homaj Rajtoj, tiel ĝi devigas sin mem agi laŭ tiuj normoj.

Eŭropo grandparte suferas je helpsindromo por aliaj mondopartoj kaj ofte ne rimarkas, ke plej ofte ĝi mem pli bezonas helpon ol aliaj. Ĝi bezonas helpon por subigi sian socipsikan deficiton, kiu estiĝis en la historio per la idealisma kredo pri ia ekskluziveco, sed kiu neniam konformis al la realo. Tiuj misinterpretoj enŝoviĝis en la subkonscion de popoloj kaj individuoj kiel psikaj ĝenoj kaj ankoraŭ nun baras la senpere normalan sintenon inter la eŭropaj popoloj mem kaj ankaŭ al la cetera mondo. Konsciigi unue tiujn ĉi ĝenojn kaj barojn kaj poste helpi al la popoloj kaj individuoj subigi ilin apartenas same al la taskoj de EDE.

Resti en la realo

Jes, politiko ĉiam bezonas havi viziojn, tamen pli gravas resti ĉiufoje en la realo. Ĉi tie kaj nun. Politiko estas kaj restas ĉiam tagpolitiko, kiu volas kaj devas solvi la plej aktualajn problemojn en la ĉiutaga vivo. Hieraŭ estas jam historio kaj morgaŭ estas ankoraŭ necerta futuro. Ĉi tie kaj nun okazas ĉiu konkreta ago kaj helpo. La viktimon ne interesas, ĉu vi volis helpi aŭ ĉu vi helpos, sed nun kaj ĉi tie helpu kaj lasu flanke ĉiujn intencojn, ideojn, deklarojn, volojn ktp kaj **agu**.

Tiu konkreta bonfaro troviĝas en la bazo de ĉiu politika movado. Estas alia demando, ĉu mi lastkonsekvence povas ion vere bone fari, kiam mi ion faras. Sed politike, se mi estas aŭtenta politikisto, mi devas esti konvinkita pri tio, kion mi faras. La estonteco t.e. la historio poste montros per la sperto, ĉu tio, kio okazis, estis farita ĝuste. Se ne, la antaŭa faro devas esti korektita.

Jen ĉi tie aperas la tasko de la demokratio (dialogike, anstataŭ per dialektikaj revolucioj). Anoncas sin demokratie novaj politikaj fortoj, kiuj kredante fari la aferon pli bone ol la antaŭaj, alprenas por iu periodo la respondecon. Samtempe reduktiĝas ĉiu persona respondeco pri “vivo kaj morto” en la demokratio, tial do ne devas ĉiuj antaŭaj regantoj fini sian vivon sur eŝafodo, kiel post multaj revolucioj.

Mondomovaj ideoj ne utilas, se ili ne estas realigeblaj, plej malmulte en la politiko. Por ke ne plu lanĉiĝu nerealigeblaj ideoj, elŝprucintaj el iu malsana kapo, kiel en multaj diktaturoj, devigantaj la popolojn fari ion neeblan, kaj la planoj restu en realigeblaj kadroj, por tio deĵoras nuntempe la demokratio, kiun defendi apartenas ankaŭ al la fundamentaj taskoj de EDE.

35. Ĉu EDE povus, se jes, kiel ĝi povus kunlabori kun UM?

Bert Schumann skribis: >EDE-anoj bv. legi la programon de UM en <http://www.unu-mondo.org/> kaj diri, ĉu EDE povus havi programon, kiu inkludas la ideojn de UM.<

Mia respondo: *Mi legis la la paĝojn de UM, kaj ŝajnas al mi, ke la problemo de Unu Mondo estas la granda ideo kaj la nesufiĉa ligiteco kun la realo.*

EDE volas elgkonduki ĝuste el tia enmemiĝinteco de la idealismo kaj konkretigi la eblojn en la nuna mondo, uzi la bazan pensmanieron de Esperanto, kiu kondukis ĝin ĝis nia estanteco, kiam ĝi eksterordinare aktualiĝis en EU.

Ke tiu pensmaniero altiras ankaŭ homojn el ekster la Esperanto-movado, pruvos plastike, ke eĉ la prezidanto de EDE-GE Manuel Cebulla aliĝis al nia movado kaj tutkore kunlaboris, sen esti esperantisto kaj sen paroli ankoraŭ la lingvon.

Aliflanke ĉe esperantistoj mem latentas la danĝero refali en la oldan idealismon (ofte eĉ pli ol nun en la ekstera mondo), emfazante la „grandan ideon“. Tiu inversigita „realeco“ ene de Esperantujo ofte kaŭzas kabeon de valoraj kunlaborantoj.

UM ŝatus kunlabori kun tre diversaj organizaĵoj, de KELI ĝis SAT kaj kun ŝtatoj kiel Kongo (kun Malanda Lutete) kaj Usono (kun prof. Glossop). Tio estas tre laŭdinda, kaj mi kredas, ke neniuj en EDE kontraŭus tiujn emojn. Sed alia demando estas, ĉu ekzistas tie realaj ŝancoj por la politika agado?

Vidi la tri fondintojn de UM el tri kontinentoj estas tre alloga kaj vere vaste internacie, sed (bedaŭrinde ĉi-okaze aŭ eble dank' al Dio) ĉiuj tri nun vivas en EU kaj ne povas senpere agi en la mondopartoj, kiujn ili reprezentas.

En EU jam ekzistas, ankoraŭ en tre ĝerma stadio, tamen ja reale, internacia demokratio. Konkreta tasko estas nun kunlabori ĉe la plukonstruo kaj evoluigo, plibonigo de ĉi tiu demokratio ĝenerale. En la kazo de EDE kun specifa emfazo de la lingva demokratio.

Por plenumi konkretan politikan laboron, laŭ la demokratia klopodo de EDE, necesas medio, kie leĝe estas permesata tia disvolviĝo. Niakaze ankaŭ la internacia demokratio. Ni ne forgesu, antaŭ 1989 io tia ankoraŭ ne eblis ankaŭ en Eŭropo. Sed nun eblas, kaj nun ni uzu ĉi tiun eblecon!

Politiko estas ĉiam konkreta ago, io ĉi tie kaj nun. UM ŝajnas (al mi) tempe refali, koncerne la nunajn eblojn, en la idealismon pri iu granda estonteco. EDE ne kontraŭas (laŭ mia komparo) eĉ unu frazon de UM rilate al la estonta celo. Sed EDE volas konkretigi la aktualecon de Es-

peranto en celetoj, reale atingeblaj per malgrandaj paŝoj.

Laŭ mia opinio nenio kontraŭas la kunlaboron de EDE kun politikaj movadoj samsencaj mondvaste, sed la iniciato mem devus veni de ekster EU sed ne de iamaj EDE-anoj.

36. Proksimiĝas la EU-parlamentaj elektoj de 2014

Jen mia alvoko al la esperantistoj en Hungario, Pollando, Bulgario antaŭ la EU-elektoj:

Estimataj Esperantistoj,

en la sekvaj monatoj ni havos sensivajn tempojn. En majo de 2014 estos elektoj por la Eŭropa Parlamento, sekve de kio la EU-civitanoj estos pli akceptemaj por lingvaj problemoj. Tion, ni EDE-anoj jam spertis ankaŭ antaŭ 2009.

Antaŭ ol diskuti denove pri tio, ĉu Esperanto estas politika temo aŭ ne, ni prefere faru ion konkretan. En 2009 ni jam povis sperti, ke rezulte de la aktivado de EDE kreskis la interesiĝo pri Esperanto en EU kaj (ni estu iom troigaj) ankaŭ mondvaste.

EDE faras en Francio kaj Germanio denove febran preparan laboron. En Germanio ni ankoraŭ bezonas 4000 subskribojn, por povi eniri la balotliston. La sukceso dependas pliparte de la esperantistoj, do ĉu ili pretos helpi. En 2009 ni atingis eĉ 6,5 mil subskribojn. Ĉu ankaŭ ĉi-foje ni sukcesos?

Kaj en Hungario, Pollando kaj Bulgario ni dirus dankon al la EDE-anoj, se ili almenaŭ morale subtenus nin, nu, kaj se ili elstarigus en siaj landoj la lingvopolitikan signifon de Esperanto.

Mia alvoko al la esperantistoj en Germanio antaŭ la EU-elektoj:

Estimataj Esperantistoj,

EDE petas Vin kunhelpi, por povi partopreni en Germanio la EU-parlamentajn elektojn en 2014.

Historie montriĝis, ke Esperanto estas ne nur lingva movado, sed ĉiam estis ankaŭ lukto por pli da justeco, klareco kaj paca komprenemo inter la popoloj, kiu samtempe estas ankaŭ politika ago.

Nuntempe politiko estas strikte ligita al demokratio. La Eŭropa Unio estiĝis demokratie kaj ricevis la strukturon por ebla pliboniĝo al internacia demokratio. Por tio volas EDE kunlabori.

La tempo denove urĝas. Ĝis la 28a de februaro ni devas atingi minimume 4.000 subskribojn, por povi partopreni la EU-elektojn en 2014. Lastafoje en 2009 ni same nur en la lastaj tagoj atingis sufiĉajn, eĉ pli ol 6,5 mil subskribojn kaj ni povis partopreni.

La vorto „Esperanto“, lige kun demokratio kaj Eŭropo aperis sur pli ol 80 milionoj da balotlistoj en Germanio. EDE ricevis senpagan varbadtempon en 2 grandaj ŝtataj TV-kanaloj.

Rezulte, poste pliiĝis la intereso pri Esperanto kaj lernokursoj. En la historio de Esperanto, tiam estis la plej granda varbadefiko en relative mallonga tempo.

Ĉu ni povas tion ripeti? Dependas de Vi, Esperantisto, ĉu Vi helpas kaj kunlaboros.

Ni en la estraro laboras por tio jam de kelkaj jaroj. Bonvolu helpi al ni, ke nia laboro ne okazu vane!

Se Vi ankaŭ volas antaŭenigi la evoluon de Esperanto en la nuna tempo de necesa internacia demokratio, por paca kunvivado de la popoloj en Eŭropo kaj la mondo.

Pluaj informoj en la reto²⁵.

Mia alvoko al elektorajtaj civitanoj en Germanio:

*Demokratoj en Germanio,
helpu pluevoluigi la demokration!*

EDE-GE volas partopreni la EU-elektojn en 2014 kaj pluevoluigi la demokration en EU al internacia demokratio.

Eŭropo bezonas novajn, junajn demokratojn kun internacia konscio!

Pro tio petas EDE subtenon. Ĉar ne ekzistas EU-demokratio sen lingva demokratio.

²⁵ <http://de.e-d-e.eu>

Por kio utilas Esperanto?

Por subigi naciismon en sintenoj, en lingvoj kaj en la pensado.

La lingvoj plenas de idiomaĵoj kaj idiotaĵoj, kiuj limigas la pensadon, kiujn Esperanto konsciigas.

Esperanto akcelas la inter-econ ĉe individuoj, popoloj kaj sciencoj.

Inter-fakeco en scienco kaj inter-nacieco en la politiko fariĝis nefor-penseblaj.

En la demokratio oni povas diri, ke oni ĉion tion ne bezonas. Tio estas onia rajto.

Sed en la nuna mondo oni havos alie kelkajn problemojn trovi sian ĝustan lokon.

37. Miaj diskutoj kun hungaraj esperantistoj pri ortografio, vortigo, politiko

En la elektokampanjo en Germanio ni varbis per la sekva teksto:

Por kio utilas Esperanto?

Por subigi naciismon en sintenoj, en lingvoj kaj en la pensado.

La lingvoj plenas de idiomaĵoj kaj idiotaĵoj, kiuj limigas la pensadon, kiujn Esperanto konsciigas.

Esperanto akcelas la inter-econ ĉe individuoj, popoloj kaj sciencoj.

Inter-fakeco en scienco kaj inter-nacieco en la politiko fariĝis nefor-penseblaj.

En la demokratio oni povas diri, ke oni ĉion tion ne bezonas. Tio estas onia rajto.

Sed en la nuna mondo oni havos alie kelkajn problemojn trovi sian ĝustan lokon.

Sube mi klarigos la nocion intereco.

El parto de la vorto internacieco mi konkludis laŭsence pri la nocio intereco, opiniante, ke ĝi ne estos tute fremda en la lingvo. Sed la nocion mem ne mi elpensis. Fone de ĝi troviĝas tuta filozofio, la t.n. dialogika

pensado.

En la germana oni diras zwischen aŭ dazwischen, do en la lingvo, en kiu ĉi tiu pensado ekĝermis. Cetere la fakto estas interesa ankaŭ historie, ĉar ĝia estiĝo samtempis kun la kreo de Esperanto. Nun jam antaŭ pli ol 25 jaroj mi fariĝis esperantisto pro tio, ke mi rimarkis la spiritan similecon inter Esperanto kaj la dialogika pensado.

La germana vorto zwischen, pri kies nocio oni jam verkis bibliotekon da libroj, respondas al la latina inter. Plej ofta ĝia uzo en niaj tagoj dokumenteblas en la vorto international, do internacia. Sed ĝi estas ne nur ĉiutaga nocio, ja ankaŭ la kultivo de la nuntempa scienco okazas interfake.

Ĉi-rilate estas aparta en Esperanto tio, ke ankaŭ ĝia genezo kaj ekzistado okazas en ĉi tiu intersfero. T.e. ni diras pri Esperanto, ke ĝi estas internacia lingvo. Eble oni povus diri ankaŭ jene: intereca lingvo. Kompreneble tio ĝenas nian lingvan idiotecon. Sed tio ne estas io nova, ĉar iu filozofo, nomata Heidegger, esplordemandis pri la senco de la vortoj, ja al li ne sufiĉis la nura lingva rutino.

Nu, ĉi tiu tuta problemo estas jam sufiĉe malnova, ĉu? Aparte la religioj volis fiksi la sencon de la vortoj. Ili kaŝis la necertaĵojn de la tradukoj, kaj ĉiu konsideris sian propran lingvon dia. Ekz. Jesuo preĝis propre ne al la Patro, sed plie al iu universala estulo, almenaŭ tiel eblus traduki, sed tio tute malaperis en la greka-latina subjektiva idiomaĵemo.

La plej gravaj rezultoj de la scienco fontas nuntempe el la menciita intereco. Nobel-premioj estas disdonataj plej ofte por interfakaj atingoj, ofte al pluraj personoj por unu invento. Esperanto jam dekomence funkcias en ĉi tiu spirito interece.

Miaj hungaraj sampatrujanoj ne estas kontentaj pri mia esprimmaniero en la hungara kaj kritikas min. Sed plej malbone estas, ke verŝajne ili ankaŭ ne komprenas, kion mi diras.

Dankon por la ampleksa okupiĝo pri miaj vortigoj. Mi sentas min en lernejo, kie la s-ro instruisto de la hungara korektas mian skriban laboron. Nu, tiutempe mi ankoraŭ pli bone posedis la hungaran. Eĉ, mi partoprenis t.n. literaturan memklerigan rondon en Subotica. Sed

verkisto mi neniam volis fariĝi.

Mi prefere pensadis kaj konvinkiĝis, kiom malfacile estas esprimi la pensojn per vortoj kaj literoj. Ĉiu esprimo estas nur kurta parto de la realo. Kiun verkistoj ofte falsas en kulturitaj (rutine kutimitaj) klasikaj lingvoj, en romanoj per longaj tekstoj, dormigante la publikon.

Nun mi posedas kvin lingvojn, en tri lingvoj mi esprimas miajn pensojn paralele en parolo kaj skribo, ja ne perfekte, sed mi ankaŭ ne ambicias tion, ĉar mi scias, ke tio ne eblas. T.e. per multa lernado tra longaj jaroj mi konvinkiĝis, kiel malmulte mi scias, kiom ne perfekta mi estas kaj ankaŭ ne povas esti.

Nu, antaŭ nelonge mi devis foriri kaj interrompi mian pensovicon...

...dum mi nun relegas, kion mi estis skribinta, konsciiĝas en mi la idiotaĵo de mia reago. Sed tio estas necesa kognita procezo en nia klasika eŭropa kulturo. Ni devas foriĝi de ni mem (de la mio), por rekoni, kiom egoisme idiotaj ni estas.

Tio rilatas bedaŭrinde ne nur al personoj sed ankaŭ al popoloj, nacioj kaj kulturoj. Tion oni devas malkaŝi, videbligi. Kaj tion faras Esperanto ĉe la lingvoj, eĉ, se iu sukcesas atingi pensi dialogike en Esperanto, ĉi tiu spirito de Esperanto povos regi lian tutan vivon.

Sed mi reiru al la teksto. Kio aparte interesa estas en ĉi tiu alparolo, ke mi legas ankaŭ ion tian, eĉ kritikon, kion resp. kiun mi ne skribis, t.e. ne intencis vortigi. Mi nenie diris, ke mi volas publikigi ĉi tiun tekston. Tio estas nur provizora traduko el la germana, ĉar tie ni volas konkrete partopreni kun EDE la EU-elektojn. En Hungario mi volis nur informi, eventuale submeti enhavojn por la politikaj diskutoj.

Sed vi pravas, ellaboritan oni povas ĝin ankaŭ publikigi, ekz. en ĵurnaloj, libroj k.s.

Vi skribas, ke „sub naciismo oni kutime komprenas nuntempe multajn aĵojn”.

Laŭ mi la nocio -ismo estas „nuntempe” sufiĉe klarigita. T.e. naciismo havas nenion farendan en la Esperanto-movado. Tion do oni bezonas klare esprimi, vortigi. Per tia demando ni ne fiŝu en malklara akvo.

<Ne ekzistas vorto en la hungara kiel *idióma*. La vorto idiotaĵo neniel uzeblas en hungaraj propagandaj tekstoj.>

Nu bone, tamen mi kredas, ke la plimulto, kiun interesas la lingvo, komprenas tion (idióma=dialekto, parolmaniero, lingva specifaĵo – mi legas en la vortaro). Ĉiuokaze ankaŭ esperante estas kompreneble, se mi diras idealismo, mi ne bezonas diri ideemecon aŭ ideokredon. Kaj idioton mi povus nomi ankaŭ kreteno, sed al kio mi celas, estas, ke ĉi tiuj vortigoj strikte interrilatas, do: ideo, idealismo, ideologio, idiotaĵo, do ĉiuj la samaj – eksplicite – stultaĵoj, kies tempo, kune kun la klasiko, forpasis.

Pri la nocio intereco mi jam respondis en mia pli frua afiŝo. Fone de la nocio troviĝas tuta filozofia tendenco. Ne mi eltrovis ĝin.

<etere: kion konsciigas Esperanto? Ĉu la pensadon?>

Jes. Ni povus ankaŭ tiel diri, ke Esperanto estas la lingvo de la pensado. Neniu alia lingvo mem instigas tiom al pensado, kiom Esperanto. La plej multaj, aparte la klasikaj lingvoj estas tiel multe mekanikaj, ke iliaj uzantoj ne plu pensas, nur vortomuelas, ofte ili mem ne scias, kion, nur parolas, parolas ĉiuspecajn idiotaĵojn (nu bone, stultaĵojn). Kaj plej tragike estas, ke tia dormiga ventroparolanto ankaŭ trovas aŭskultantojn aŭ legantojn.

>En demokratio iu povas diri, ke li ne bezonas ĝin. Ĉu li rajtas diri, kion li ne bezonas?<

Nu ekz. la interecon. Sed Esperanto postulas ĉe la homoj, popoloj, sciencoj interecon. La interfakeco en la scienco kaj internacieco en la politiko fariĝis neforpenblaj.

>kiel oni opinias pri la interfakeco; kio estas etere modvorto nuntempe, sed en tia reklamteksto mi pli bone pripensus ĝian uzon. Ĝuste tial, ĉar ĝi estas moda, praktike nun jam nenion ĝi esprimas.<

Estas naive nomi interfakecon modo, aŭ prefere tio estas neinformiteco. Se iu „nuntempe” ne venis al la rekono, ke ekz. la plej multaj Nobel-premioj estas disdonataj en ĉi tiu sfero.

>Se iu bone ellernas la anglan, li neniel havos malfacilaĵojn, tio nun jam videblas ankaŭ sen armitaj okuloj.<

Ha, sed tio estas alĵetita sen ajna rilato. Kion mi povas unuapense diri pri tio, estas, ke mi certe ne estas kontraŭ la angla, laŭ mi ja tie komenciĝas la solvo de la problemo de intereco. Ĉar ĝi estas ne nur lingva problemo, kiel, bedaŭrinde, multaj esperantistoj opinias.

Sed kio „videblas ankaŭ sen armitaj okuloj”, estas, ke homo, ellerninta la anglan, ja ne havas lingvajn malfacilaĵojn, sed veras ankaŭ, ke li neniam en la vivo parolos la anglan perfekte, sekve de kio li eterne restos malavantaĝata. Sed tio estas jam sufiĉe temigita en esperantistaj rondoj.

>Superflua komo, manko de litero n. Ne gramatike sed enhave ankaŭ ĉi tie mankas iuspeca keĵlovorto, solvanta la sekan, hakan ritmon: ekz. „en niaj tagoj”, „por hodiaŭ”, „en nia nuna mondo” kaj simile.<

Mi volis verki ĉi-okaze ne literaturan majstraĵon. Mi volis komuniki ion, inspiri al pensado, eĉ, politike provoki, tial mi karikaturas kelkfoje troige.

Sed la politiko estas tamen ne milito, buĉado, tion barbaroj faras, da kiuj estas ĉiam pli malmulte, tamen ankoraŭ kelkaj troviĝas.

Repliko al Por kio utilas Esperanto?

Ĝenerala problemo de la nunaj tempoj estas, ke en ĉi tiu informada torrento oni legas la tekstojn ne atente, sekve de kio estiĝas multaj miskomprenoj. Pasintec la enhavo de ne bone komprenita teksto restis plej ofte ĉe la leganto, li devis vivi kun eraraj opinioj, kondutformoj, kio jam ankaŭ tiam povis kaŭzi malfacilaĵojn en lia ĉirkaŭaĵo. Sed nuntempe, kun la ebloj de la aktiva disvastiĝo de informoj en la reto tiaj eraroj povas rapide multobliĝi kaj kaŭzi ankaŭ sociajn damaĝojn.

La vorton idotaĵo mi uzis en ĝia psikologia senco, mi volis skribi ne idiomaĵon en lingvistika senco. Do ĝi ne estas tajperaro! Kompreneble, miskomprenblo ne distis, ĉar ni okupiĝis pri lingva temo.

Ĉi tiun vortigon mi uzas, kiam mi volas ion karikaturi, provoke troigi. Ĉar nuntempe, bedaŭrinde, aparte en la politiko nur tiel oni povas direkti al io la atenton. Sed la nocio havas ankaŭ en ĉi tiu konekso sian sencon. Ideo, idealismo, ideologio kaj poste idotaĵo strikte interrilatas en la eŭropa kulturo, se ni aldonas la tempon, t.e. la historian evoluon,

ĉar ili difinas la pensmanieron.

La mi-idealismo havas ĝis niaj tagoj tiel fortan efikon al kelkaj profesoroj de filozofio, ke ili ne kaptas per sia menso, ke ekzistas ankaŭ iu alia. Maksimume ili atingis nur ĝis tie tra Hegel (kion Marx ja misuzis), ke kun la alia oni devas kvereli.

Ĉi tiun orientiĝon nomas la (relative nova scienco) psikologio malsano idiotaĵo, kaj la (pli nova scienco) socipsikologio diras, sekvante ĉi tiun linion, ke ankaŭ naciismo estas psika amasmalsano, kion multaj klasikaj pensuloj tute ne komprenas.

Ke oni povas lerni ankaŭ de aliuloj, kaj ne nur mi, mia familio, mia popolo, mia raso, mia ktp estas gravaj, konsciiĝas iom post iom en ni, ne nur pro tio, ke ni fariĝis pli saĝaj, sed ĉar la aliajn ni ne plu povas konvinki, altrudi aŭ mortigi, kiel pli frue ni faris, ĉar ankaŭ tiuj povus mortigi nin.

Rekoni tion trudis nin plej ofte la internacia politiko. Tie ni aŭdas daŭre, kiel multe la politikistoj volas „dialogi“. Bedaŭrinde malmultaj scias, kiel tio funkcias. Nu jes, la esperantistoj tion praktikas jam de pli ol 125 jaroj, ni havas jam iom da spertoj ĉi-rilate. Sed bedaŭrinde multaj kompatinduloj inter ni, anstataŭ rekoni la dialogikajn ecojn, implicajn en Esperanto, volas ĉiam plu klasike konvinki, do venki. Ili deziras finan venkon.

Kaj la alia problemoj kaŝiĝas persone en mi. Mi komprenas, ke miajn komplikaĵajn hungarajn tekstojn estas malfacile deĉifri, krome ankaŭ la temo ne estas ĉiutaga. Pri la dua havas problemojn ne nur mi malgranda, sed havis ankaŭ tiu, sur kies spuroj mi provas pensi pri la lingvo. Oni diris pri Heidegger, ke li perfortas la germanan lingvon. Sed kion li faris, estis nur provo kompreni la originan sencon de la vortoj, en kio la lingvoidotoj kompreneble ne scipovis sekvi lin.

Nu, kaj mi estas duobla idioto, ĉar unuflanke (laŭ kelkaj) mi ne parolas kompreneble la hungaran, kaj aliflanke mi lanĉas temojn, por kompreni kiujn oni bezonas iom pensi. Ĉi-kampe mi provas ŝovi min sub la ombrelon de Esperanto, tie mi trovas similajn problemojn kaj azilon, kiam ekz. mi legas tekstojn de rusaj, anglaj aŭ hispanaj ktp esperantistoj.

Ĉe ĉiuj mi trovas diversajn vortkombinojn, sed estas interese (almenaŭ por mi), per iom da pensado mi komprenas, kion ili celas. Kompreneble estas tamen ankaŭ tiaj esperantistoj, kiuj atingis la Esperanto-idiotaĵon, kaj do parolas tiel, ke alia Esperanto-idioto senpere, ankaŭ sen pensado komprenas ilin, t.e. en tiaj okazoj montriĝas, ke Esperanto neniom diferencas de la ceteraj lingvoj, ĉar ankaŭ plu restas ĝia socie justa-demokratia karaktero.

Kelkaj el miaj komentoj, alparoloj, vortigoj en diversaj blogoj, pliparte hazarde elektitaj

38. Pri la difinoj de mia maldekstremo

Hodiaŭ (25.02.2013) estas la 70a datreveno de la ekzekuto de la gefratoj Scholl, anoj de la munkena studenta organizo Blanka Rozo (*Weißerose*) dum la hitlera reĝimo nazia.

Ĉi tiu movado havis gravan influon al la pli malfrua spirito de la munkena Universitato Ludoviko Maksimiliano, kaj ĝi forte daŭras ĝis niaj tagoj. Eĉ, bedaŭrinde, ankaŭ nun ni bezonas ĝin, por, rememorante, ni lernu el ĝi, por anticipi malhelpi la ripetiĝon de tiuspeca barbarismo.

Ankaŭ min grave influis ĉi tiu universitato, en kiu mi pasigis ĉ. dek jarojn. Mia unua doktoriĝa patrono (*Doktorvater*) estis disĉiplo, poste amiko de Heidegger, prof. Max Müller, iama ano de la katolika branĉo de Blanka Rozo. Poste mi venis al prof. Fritz Leist, kiu same apartenis al ĉi tiu flanko de la movado.

En ĉi tiu spirito trovis al si vojon la t.n. nova pensado (*neues Denken*), nedialektika estofilozofio de Heidegger kaj la dialogika pensado de Rosenzweig. Koncerne ties influon mi kuraĝas ankaŭ supozi ties spiritan influon al la unika demokratia rezigno, pri la potenco, de papo Benedikto la 14a.

Ankaŭ duafoje determinis ĉi tiuj spiritaj radikoj mian mondpercepton. D-ro Meros, multvojaĝinta kuracisto, prezidanto de la mondcivitana

Vereinigung der Weltmenschen (Societo de Mondohomoj), kiu same aktivadis tiutempe en Blanka Rozo, diris foje al mi, nun jam antaŭ ĉ. 30 jaroj: *Junge, wenn du so international bist, lerne Esperanto*²⁶. Kaj mi ellernis Esperanton.

Kun li ni ĉiujare rememoris la gefratojn Scholl, kiuj eĉ en tiu malhumana reĝimo ne timis pledi por la libereco. Ankaŭ ni faru nun tion eŭropovaste, por ke diktatoraj reĝimoj havu neniajn ŝancojn veni al regado.

Spertoj de 70-jarulo

La 70-jara datreveno de la ekzekuto de la gefratoj Scholl la 22an de februaro kaj la abdiko de papo Benetikto la 16a rememorigis al mi miajn studentajn jarojn en la munkena Universitato Ludoviko Maksimiliano (ULM).

Dum promeno en la budapeŝta strato Nádor preter CEU (*Central European University*) venis al mi subite en la menson, ke dek jarojn mi engaĝis min kaj – por tiel diri – luktis en ULM en Munkeno por la t.n. nova pensado, ĝis mi rezignis.

En universitato kun tiel klasiknacie limigita pensado mi ne povis trovi novan doktoriĝan patronon. Mi ne havis tiajn profesorojn, kiel pli frue en la persono de prof. Max Müller kaj prof. Fritz Leist, ambaŭ iamaj membroj de la rezista movado Blanka Rozo (*Weißer Rose*).

Mi renkontis en AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino) unuafoje profesorojn, kiuj superis ĉi tiun nacie limigitan akademian pensadon, kaj homojn, kiuj komprenis la novan pensmanieron, pri kiu mi estis tiutempe okupiĝanta jam de 15 jaroj.

Nur nun, kiam mi proksimiĝas al la 70a datreveno de mia naskiĝo, mi sentas la liberecon kaj kredas havi la sperton scipovi prilabori objektivajn ĉi tiun periodon de mia vivo. Antaŭe mi ĉiam sentis min senscia (por ne diri stulta), por kompreni ĝuste ĉi tiun periodon. Nur nun, retrorigarde, mi rekonas la grandecon kaj malgrandecon de tiuj multaj profesoroj, kun kiuj mi havis farendon.

²⁶ Junulo, se vi estas tiom internaciema, lernu Esperanton!

Al kiu mi lastafoje turnis min, nomis min vera filozofo, tamen li ne volis akcepti kelkajn konstatojn de mia Hegel-kritiko. Tiam mi finfine tediĝis de la profesoroj de ĉi tiu universitato. Lastafoje ni adiaŭis nin dirante, ke en du monatoj mi revenos kun la de li dezirataj tekstomodifoj. Neniam plu mi revenis al li. Post kelkaj jaroj lastafoje ni renkontis nin en la munkena operejo, sed ni nur interŝanĝis rigardojn de fore.

Nun mi aĝas 70 jarojn, eĉ fariĝis kelkajn monatojn pli maljuna. Ankaŭ plu mi ne sentas min sufiĉe saĝa, tamen mi jam povas kompreni, kiel multe mi trotaksis kelkajn homojn, kun kiuj mi havis kontaktojn. Aliflanke de aliaj mi lernis multe kaj estis esence influita en mia vivo.

Mian orientiĝon influis decide, kompreneble, miaj filozofiaj studoj, por la tempo de kiuj mi sukcesis certigi mian financan memstarecon. Mi ne estis devigita ĉesigi mian studadon pro pangajnado kaj subordiĝi min kaj mian konvinkiĝon al la volo de profesoroj, sed povis sekvi libere mian propran vojon de evoluo, kiun finfine povis nur malmultaj kompreni.

Jam pli frue mi estis fininta pangajnnigan studadon, kaj post kiam mi laboris kiel inĝeniero, mi decidis tamen rezigni ĉi tiun profesion kaj komenci, konforme al miaj originaj inklinoj, studi filozofion. En ĉi tiu tempo mi datas mian unuan personan liberiĝon, kiam mi fundamentis mian negocon, kiun mi praktikis, por tiel diri, ĉiufoje nur kiel kromprofesion. Mia dua spirita liberiĝo alvenis kun la spertoj pri Esperanto.

Hodiaŭ, 70 jarojn pli frue estis ekzekutitaj en Munkeno la gefratoj Scholl, anoj de la rezista movado Blanka Roza (*Weißer Rose*) en la hitlera reĝimo naci-socialista.

Ĉi tiu movado havis poste gravan influon al la spirito de la Universitato Ludoviko Maksimiliano en Munkeno. Hodiaŭ ni bezonas rememori ilin ankaŭ pro tio, ke ni antaŭdeturnu la reviviĝon kaj ripetiĝon de tiaj barbaraĵoj.

Kaj aliflanke ĉi tiu universitato, en kiu mi pasigis dek jarojn, havis al mi persone tre grandan influon. Mia unua doktoriĝa patrono, prof. Max Müller, disĉiplo kaj amiko de Heidegger estis membro de la katolika branĉo de Blanka Rozo, kaj prof. Fritz Leist, al kiu mi poste venis, apartenis same al ĉi tiu branĉo de la movado.

Ĉe tia spirito de la Munkena Universitato trovis spacon la t.n. nova pensado, la nedialektika filozofio de Heidegger kaj la dialogika pensado de Rosenzweig. Koncerne ĉi tiun influon mi kuraĝus eĉ supozi, ke ĉi tiu spirito decide kuninfluis la en la Katolika Eklezio unike demokratian decidon de la nuna papo retiri sin de la potenco.

Ankaŭ duafoje decidis ĉi tiuj spiritaj radikoj mian mondpercepton. D-ro Meros, multvojaĝinta kuracisto, prezidanto de la kosmopolita Societo de Mondohomoj, same iama membro de Blanka Rozo, diris foje al mi (antaŭ ĉ. 30 jaroj): „Junulo, se vi estas tiom internaciema, lernu Esperanton”. Kaj mi ellernis Esperanton.

Ĉiujare mi kun li rememoris la murdon de la gefratoj Scholl, kiuj en ĉi tiu malhumana reĝimo ne timis kontraŭstari por la libereco. Ankaŭ ni pledu nun tuteŭrope, por ke malhumane diktaturaj reĝimoj havu nenian ŝancon reveni al la potenco!

39. La idealismo estas “mizero” ne nur de la esperantistoj

Komento en Libera Folio 03.02.2013

Por ke iu ŝanĝu la pensmanieron de iu ajn, devas mem esti kapabla ŝanĝi la propran. Jes, esperantistoj plej ofte uzas la pensmanieron de la pasinteco, sed en Esperanto mem estas trovebla jam deorigine la t.n. nova pensado, kiu fariĝis en nia estanteco reale necesa (ne nur ideo).

Idealismo estas ne nur mizero de la esperantistoj, sed de nia kelk-mil-jara eŭropa pensmaniero. Tio ne estas simple ŝanĝebla per kontraŭaĵoj. Ni jam havis en la historio sufiĉe da kontraŭaĵajn revoluciojn, kiuj esence nenion ŝanĝis, turniĝis nur la flankoj.

La nova pensado elkondukas el tiu ĉi malfeliĉa kontraŭaĵa dialektiko. Tiu procezo jam longe komenciĝis en la historio, ankaŭ se multe da idealistoj ĝis nun ne kaptas tion; ili ofte ne komprenas eĉ tion, kio okazas nuntempe antaŭ iliaj okuloj.

Ekz. ĉi tie en Munkeno kunvenis en lastaj tagoj gravaj politikistoj, ŝtatestroj, defendministroj, por paroli pri „sekureco“. Sed ili komprenis fakte nur tion, kion ili volis kaj devis kompreni. La plimulto de ili ne kapablas pripensi la nuntempe okazantajn gravajn procezojn. Tamen pro ekzistad-pravigaj kaŭzoj ili ĉiam devas fari ion nur parte ne-

cesan. Ĉar malantaŭ la kulisoj la monddetruaj kapacitoj devigas ŝanĝi parte la pensmanieron. Ili komencas dialogi, sed tio ankoraŭ bedaŭrinde fore ne estas dialogika.

Se ni komparas la *inter-nacie-econ* de Esperanto kun tiuj precipe nacie limigitaj politikistoj, povas aperi la kvalito, kiun la esperantistoj jam deorigine kunportas en sia esperantisteco, per siaj *inter-ecoj*, kie ili troviĝas *inter-nacie*. Sed ni ne atendu de ili miraklojn. Tiu maniero bezonas sian tempon, ne estas altrudebla. Pioniro de la nova pensado diris: „Serioze preni la tempon”. Senperforte, pace, lasi evoluiĝi, disvolviĝi la realon el la estanteco. Kaj en Esperanto troviĝas kaj ekzistas tiu disvolvenda estanteco.

Komento de 13.02.2004 en Libera Folio

Jes, mi kritikas la idealismon, ne nur de esperantistoj, sed mi aliĝas al la filozofia ekkono de la nova tempo kaj al la kritiko de nia eŭropa idealismo kun la aristotela logiko, kiu estis sufiĉa dum la sklavotena sociordo, sed jam tiam komenciĝis la nova pensado, kiu montriĝis en nia estanteco reale necesa.

Ne sufiĉas nur dialektike kritiki la „ideologian balaston de paco, humanismo, neperforto, interfratiĝo, internacia amikeco” ktp. Kio venos poste, se ĉio tio estos negita? Ni jam scias, ĉar ni spertis en la historio – la totalismo. Kaj kio poste? – ni jam ankaŭ tion spertis, ni ne solvis la problemojn, faris nur pli komplika nian pensmanieron.

Ĉiuj ĉi nocioj apartenas al la karaktero de Esperanto jam deorigine, sed ili ne estis ekkoneblaj en la bruo de la dialektika persvadarto en sia estrealeco. Ili ĉiufoje jam efikis en ĉiuj internaciaj Esperanto-renkontiĝoj kaj ĉe la okupiĝoj de esperantiste pensantoj, sed estis ĉiam superkovritaj de iu ideologio. Ili neniam (kiel ekz. ĝis nun en EU) havis la liberecon plenpensi la okazadojn laŭsence laŭ ĉi tiu pensmaniero.

Esperanto trasavis en si tiujn nociojn en la temp-esto de la historio, kaj nun ni havas la ŝancon dialogike elvolvi ĝian necesan realecon en la libera demokratio de la nuntempo.

40. Miaj respondoj al enketdandoj pri Esperanto

Al enketdandoj de Andreas Kuenzli

Nu bone, mi komencu kun la alparolo „samideano“, kiun mi ne ŝatas. Mi ne konsideras min samideano, ĉar mi ne estas idealisto. Esperanto neniam estis nur ideo. Se ĝi estus tio, ĝi jam longe antaŭe estus malaperinta, kiel la grandaj mondotremaj ideoj, idealoj kaj ideologioj. Ĝi ekiris el la juda ekzistado de Zamenhof, en tiu tempo kiel reago al lia reale ekzistanta ĉirkaŭaĵo. Ke liaj posteuloj kaj eble ankaŭ li mem komprenis tion kiel ideon, tio kuŝis en la memkompreno de la tempo. (Esperanto neniam estis nur „bona ideo“, kiun la esperantistoj ofte eĉ uzas por slogano, sed ĉiam pli.)

Sed tiu tempo estas jam for. Ĉe ni en Eŭropo, komenciĝis la superado de la idealismo per la nova pensado, preskaŭ samtempe kun Zamenhof, kun la same juda Franz Rosenzweig kaj liaj influoj al Martin Heidegger, Martin Buber kaj aliaj postsekvantoj. La nuna internacia mondpolitiko ne povus funkcii sen ĉi tiu reale *inter-eca* pensmaniero.

Ne mia subjektiv-idiota idealo gravas, sed en la nuna mondo mi estas devigata esti en akordo kun aliaj, ĉar neniuj plu havas la absolutan potencon dialektike konvinki la alian pri sia vero. T.e. estas bezonata la dialogiko de la nova pensado, kiu enestas ja esence ankaŭ en Esperanto. Pro tio estas ĝi tre aktuala.

Kial la esperantistoj ne ekkonas tion, estas la sama demando, kial ĝenerale en la nuna mondo nur malfacile kaj de malmultaj estas rekonata la neceseco de la nova pensado. Kelkaj gravaj personoj (kiel Gorbacov) kaj ankaŭ simplaj homoj (kiel mi) jam ekkonis tiun neceson. Sed por la disvastigo multaj devas komune ankaŭ politike kunlabori.

Tre interese estas, ke esperantistoj, kiuj serioze prenas Esperanton, havas en sia karaktero la inklinon al ĉi tiu reale *inter-eca* pensmaniero. Ĝi devus esti vekata kaj movata al pludono al la ekstera mondo. Pro tio necesas la eliro de la esperantistoj el Esperantujo en la eksteran mondon.

A.K.: Estus bone, se vi povus konkrete respondi el via vidpunkto al mia konkreta demando pri ERAROJ de la Esperanto-movado.

Mi ne povas kaj ne volas „konkrete respondi pri eraroj de la Esperanto movado“. Unue, ĉar mi ne trovas min sufiĉe kompetenta, due mi ne ŝatas unusignife kritiki, ĉar tio vekas nur dialektikan kontraŭecon, sed

ne akcelas iun solvon.

Mia metodo estas nur analize elmontri nesufiĉecon, kaj tiel instigi plupensadon kaj eble pozitivan kompletigon. Mi povas nur supozi ion, sed por konkreta kritiko, kiu postulus ankaŭ konkretan solvon, mi ne sentas min sufiĉe suverena en Esperanto.

Aliflanke, „difini” erarojn helpas nur al kontraŭuloj. Mi ne volas esti sur tiu flanko. Pri la eraroj de Esperanto jam estis multe skribita, precipe de kritikistoj, kiuj volis sin mem supermeti kaj eĉ konstrui iun novan lingvon (plejnove ekz. Klaus H. Dieckman). Ĉi tiuj kompatinduloj pensas ankoraŭ pri la maniero de la klasika lingvistiko. Ili eĉ Noam Chomsky ankoraŭ ne komprenis. Ekz. Dieckman volis konstrui „perfektan novan lingvon“.

Sed la realo okazas malgraŭ tiuj subjektivaj geniuloj, simple en la ĉiutageco. La angla akiris sian mondvastecon ne pro tio, ĉar ĝi estas perfekta, sed ĉar ĝi estas malferma kaj fleksebla (t.e malpli perfekta). Propraĵoj, kiujn Esperanto pli multe havas ol iu ajn alia lingvo, sed tio ne estas sufiĉe konsciata.

Inverse, kelkaj esperantistoj volas atingi klasikajn valorojn, anstataŭ superi ilin. Pli bone estus, se ili lernus de la angla, anstataŭ kritiki ĝin. Ĉar Esperanto havas krome (ne kontraŭe) kelkajn trajtojn eĉ pli bonajn (ekz. demokrateco, malfermeco, fleksebleco).

Esperanto estiĝis en fleksata diverseco, kaj ĉi tiun propraĵon ĝi devus pluevoluigi per konstruo de novaj *inter-ecaj* formoj, esprimoj, vortoj, restante tamen racie komprenebla. Ĝi devus gardi sin ne fari la saman eraron, kiun la naciaj lingvoj faris pere de siaj literaturo kaj poezio. Tiuj retenigis en iuj propraĵoj (idiomaĵoj kaj idiotaĵoj), ĝenerale ne kompreneblaj kaj ne tradukeblaj en aliajn lingvojn.

Bone, ni lasu tion al la naciaj lingvoj. Sed Esperanto devus defendi la propran karakteron, kiu estas la racie pensebla *inter-eco* kaj tiu ekestinta novo, kiu devas esti mondvaste komprenebla. Esperanto purigas sin mem de idiomaĵoj per sia intereco, ĉar se iuj ne komprenas ion laŭlogike, tuj venas la protesto de alilingvanoj.

Esperanto ne devas postkuri la klasikecon de la naciaj lingvoj. La plejmulto de ili mem atingis la klasikecon ne multe pli frue ol ducent

kvindek jaroj, entrudinte sin en la regulojn de la latina. Esperanto mem jam evoluas de cent dudek kvin jaroj kaj ne kaŝas sian kompilitecon kaj devenon el diversaj aliaj, eĉ klasikaj lingvoj. Dume la naciajn lingvojn karakterizas skismo. Unuflanke ili volas resti „puraj“, aliflanke ili mem devas alpreni esprimojn kaj nociojn el diversaj aliaj lingvoj, se ili volas kapabli la scienccon.

Esperanto tute malhavas ĉi tiun problemon. En relative mallonga tempo ĝi evoluis al plenuzebla lingvo en ĉiuj vivterenoj. Danke al siaj racieco kaj logika klareco ĝi estas aparte kaj prefere uzebla en la scienco kaj ĉie tie, kie pensado estas bezonata.

Kara A.K. nun, kiel mi nomu ĉi tie la „eraron“?

Mi diru: se oni ne perceptas la realan valoron de Esperanto, sed volas atingi ion laŭ la klasika idealismo, tio tute ne kongruas kun ĝia karaktero. Ekz.: fina venko, anstataŭigi aliajn lingvojn, regi la popolon, apartigi sin mem ktp.

Ps. Venontfoje mi skribos ion pri la arto kaj ĝia ligiteco al Esperanto

.....

Nun, la arto jam multe pli frue, spontanee superis la klasikecon, ol ĝia neceso en la realo estis rekonita, kaj la pensado atingis la limon de la klasike idealisma filozofio. La pensado bezonis realajn pruvojn, kiuj venis kun la novaj sciencoj, psikologio, sociologio, fiziko, biologio, ktp, kie montriĝis, ke ne ekzistas iu ideala, ununura absoluta substanco, sed ĉio ekzistas en interligiteco kaj moviĝo.

Nuntempe lanĉiĝis la problemo, ke la fino de la idealismo estas pense kaj ankaŭ science rekonita, sed la mondo ankoraŭ ne tute konscias tion, kaj pro tio ĝi troviĝas en skismo. Kio tuŝas ankaŭ la esperantistojn kaj ilian movadon. Unuflanke ili ankoraŭ ĉiam plu parolas pri grandaj „idealoj“, ili volas esti „klasikaj“, ofte eĉ „heroaj“, sed aliflanke ili ne ekkonas ĝuste tion, kio Esperanton faras valora kaj favora.

La grandaj klasikaj idealoj disfalis kaj la herooj, kiuj batalis por *konvinki*, do venki fariĝis, unue en la arto, ridindaj, ĝis ankaŭ en la realo montriĝis la tragikomiko de la klasika mondkoncepto. Don Kihotoj klarigis la realon. (Oni ofte nomas moke la esperantistojn donkihotoj,

sed vere tio tute ne estas insulto, plie honorigo, sed tion ili mem devus kompreni.) Charles Chaplin en la „Granda diktatoro“ jam antaŭvidis kaj avertis pri la realo kun ĝia komika seriozeco.

Nu, „eraro“ estas, se oni volas perfortigi la verkadon en Esperanto kun klasikaj reguloj kaj plenumi la ne plu tempadekvatajn atendojn de la publiko. Esperanta literaturo ne devas konkuri kun naciaj literaturoj, ĝi ne bezonas tion, ĝi kapablas ion alian kaj havas en sia inter-nacieco pli da ebloj krei kaj uzi novajn formojn ol ĉiu alia nacia literaturo.

Kompreneble, la verkistoj devas ĝuste elekti siajn temojn, do elekti tiajn, kiuj estas tutmonde klarigendaj, ne nur loke interesaj kaj kompreneblaj. Ili devas esti liberaj de naciaj idiomaĵoj kaj idiotaĵoj, por esti tutmonde kompreneblaj, sed por tio ankaŭ la spirita memmehanismo de Esperanto zorgas.

Esperanta „poezio“ ne rajtas perforti la lingvon, por atingi ajnajn rimojn. Ĝuste tie montriĝas la demokratia kaj pensa karaktero de ĉi tiu lingvo. Ĉar ĝi ne akceptas individuan aŭtoritaton, kiel estis praktikata en naciaj lingvoj (ekz. Lutero, Goeto, Ŝekspiro ktp). Tiel montriĝas la superklasika valoro de ĉi tiu lingvo.

Kaj jen estas la romanoj. Kiu ankoraŭ havas hodiaŭ tempon legi longajn romanegojn, en kiuj la kerne direnda enhavo ofte estus resumebla en unu paĝo. La bezono de romanliteraturo en la nuna tempo ĝenerale ŝrumpis al minimumo. Sekve la Esperanto-literaturo devus koncentriĝi al sufiĉe mallongaj artikoloj, analize prilaborante la aktualajn *inter-ecajn* mondproblemojn, anstataŭ dormluli la legantojn per longaj, tedaj tekstoj, kiel faras la klasikaj naciaj romanoj.

Kaj jen la muziko, eble la plej avangarda arto. De la t.n. serioza ĝis la t.n. leĝera muziko, ambaŭ jam transpasis la klasikon. Esperanto-muzikistoj, -komponistoj devus tion akcepti, por ne tedi la aŭskultantojn, sed veki intereson kaj donaci ĝojon pere de esperantaj tekstoj aŭ nur per esperantecaj temoj. Ĉiukaze kompreni aparte novan muzikon ne estas simpla afero, oni jam devas esti transpasinta la klasikon, por ne resti tie kaptita, sed uzi la liberecon elpaŝi.

Ekz. en la nuntempa muziko kun esperanta temo estas prilaborata la aktuala politika problemo de la Eŭropa Unio, la demokrateca lingva

problemo fare de la artistoj, komponistoj kaj kunpensantoj de „UMS `n JIP“, grupo el Svisio.

Fakte mi opinias, ke la eraro de esperantistoj tute ĝenerale kuŝas en tio, ke ili ne komprenas ĝuste la nuntempon kaj sekve la aktualecon de Esperanto. Sed tio ankaŭ ne estas nur esperantista manko, oni ja trovas multajn homojn en la nuna socio, kiuj ankoraŭ pensas laŭ pasintaj kategorioj. Multaj volas remeti la historion en iun por si mem konvenan antaŭan tempo, anstataŭ akcepti la realecon en la evoluo de la historio kaj lerni de ĝi, aŭ alie dirite: serioze preni la tempon.

La tempo, kiu estas jam pasinta, ne plu revenigeblas, ĉar por tio mankas spaco. Tempo kaj spaco ĉiam kondiĉas unu la alian. Se samtempe pluaj estintaj spacoj estus remetitaj, detruigus de la esto en la estanteco. Neniu alia alternativo restas, ol akcepti la realon de la estanteco, la “ĉi tie kaj nun”, ĉar nur tiel povas efektiviĝi evoluo en la pluekzisto. Nu, esperantistoj, pli bone estas, se ni lasas niajn grandajn idealojn kaj restas realemaj.

Ĉi tiun nunan realon ni tute ne scipovas kompreni per nia antaŭa idealisma pensmaniero. En la antaŭaj, historiaj tempoj ni ĉiam solvis tiun problemon heroece. Sed nun tio ne plu eblas. Pro tio restis neniu alia alternativo en la nuna mondo, ol akcepti la realecon de la faktoj. Kompreneble, ĉiufoje kun la kondiĉo, ke ni volas plue lasi ĉeesti la estantan, sed ne detruiri nin mem kaj la ĉirkaŭaĵon.

41. EDE kaj Esperanto inspiras komponistojn

Komento pri la elektropopa ĉambroopero THREE

Jen nova ekzemplo de arta avangardeco por la politika pensado. Ĝis la plejmulto de la klasike pensantaj kritikistoj kaj ĵurnalistoj ankoraŭ moviĝas en la rubaĵoj de la pasinteco, la arto jam antaŭeniras, plejofte ankoraŭ ne konscie sed emocie, komprenate precipe de la juna publiko. La elektropopa ĉambroopero THREE²⁷ estas prava ekzemplo por tio. La artistoj, komponistoj, pensuloj de la bando UMS `n JIP prenis unu el la plej aktualaj politikaj problemoj en la Eŭropa Unio kaj prilaboris

²⁷ <http://www.youtube.com/user/umsnjip#p/u/12/ga5m0NEBooM>

ĝin arte. La spektaklo estis prezentita en la fama teatra festivalo de Avignon, Francio, de la 8a ĝis la 31a de julio 2011²⁸.

La racia kompren-deficito de la publiko montriĝas en la komentoj kaj kritikoj de la t.n. fakuloj. Kiel bone, ke la artistoj ne (ĉiam) laboras por „fakuloj”, sed ekverkas ankaŭ spontanee el la senpera estanteco. En ĉi tiu verko la esprimmaniero de la artistoj estas plene tempoadekvata, kio ĝenerale ne estas memkomprenebla en nia ankoraŭ ĉiam plejparte idealisme distordita mondo. Ĝi montriĝas en sia subkonscia efiko, kion ni ĉiuj portas en ni mem kiel reagon al la ĉiutaga aktualeco.

Mi ne scias kial, sed ekz. aŭdante tiun ĉi verkon, ĝi donas al mi ian kompletiĝon, minimume emocie. Mi kunkantas kaj dume mi senstreĉigas mian sent-eston. Sed aktuala, bona verko povas doni ankaŭ ion, kion ni ĝis nun ne havis, ne sciis, eble pro iu deficito. Tiu ĉi manko povas esti minimume superita, dum la muziko daŭras, kaj tio kaŭzas ĝojon. Provu, kiel Robert proponis, kunkanti (vi ne bezonas esti tenoro). Vi povas ankaŭ krie, sed nepre sindone, malstreĉite, eble vi ricevos ion, kion vi bezonas, ian senton de kompletiĝo por via estanteco.

Ion, kies mankon ni sentas en la estanteco, por esti kompleta, tuta en la mondo. La artistoj havas pri tiuj deficitoj pli da afino kaj ankaŭ kuragon nomi kaj elmeti ilin publike. Kio en la socipolitika sfero povas esti eĉ danĝera, la artistoj kapablas produkti minimume sentojn, kiuj plenigas la mankon, se ankaŭ nur por certa tempo, sed tio jam estas sufiĉa por la konsciiĝo de la problemoj kaj por la posta reala plilaboro.

Tio okazas ofte konkrete ĉe politikaj, financaj, ekonomiaj problemoj, kiujn fonas plej ofte influaj kaj fortaj potencoj, kontraŭ kiuj unuopuloj aŭ malgrandaj grupetoj havas nenian ŝancon en la efektivigo de siaj postuloj. Iomete alie staras la aferoj en reale funkciaj demokratioj. Kiun ni kredas havi, minimume nuntempe en EU. Tie havas ŝancon ankaŭ la opinio de la plimulto, se ĝi politike konvene organiziĝas.

En EU ni havas demokratiajn rajton kaj liberecon esprimi opiniojn, fondi partiojn eĉ kontraŭ la regantaj potencoj. Ni uzu tiun eblecon ĉe evidente ŝanĝnecaj aferoj. Sed bedaŭrinde la konscio pri la ebleco

²⁸ <http://three.umsnjip.ch/three.html>

de plibonigo staras sur tre malalta nivelo ĉe la EU-civitanoj. Ĉi-kampe la arto povas ĝenerale multe helpi, tamen la kernan laboron devas fari la politiko. Memkompreneble, kiu havas la potencon, volas ĝin reteni por si. Sed la ĝeneralan evoluon neniu potenco povas kontraŭstari. Nuntempe staras la demando, „kiel” dividi la potencon. En la historio ni jam havis kelkajn spertojn pri perfortaj provoj. Sed bedaŭrinde tiuj ne donis kvalitan ŝanĝon, nur la regado venis en la manojn de aliuloj. La demokratio estas nuntempe la unusola politika solvo de tiuj problemoj, kaj por tio estas necesa ĝia evoluigo kaj plifortigo.

La bazo de la demokratio estas interkompreno. Por kompreniĝi estas bezonata lingvo. Kaj se ni volas plifortigi kaj evoluigi la demokration, estas bezonate ankaŭ, ke la komprenigilo mem estu demokrateca. Pro tio la temo de tiu ĉi artaĵo per Esperanto estas politike kaj tempodekvate trafe elektita.

La arto jam ankaŭ pli frue helpis solvi politikajn problemojn, ĉar ĝia unua intereso estas, dum ĝi restas pura arto por si mem (ne por la mono) resti sur la flanko de la libereco, malfermeco kaj vero. Samtempe ĝi mem scias, ke ĝi ne posedas la veron. Ĝuste pro tio ĝi restas ĉiam survoje, serĉante en la granda monda mistero. Sed unu afero estas certa, la arto neniam restas en la kadroj de fiksitaj, rutinecaj, senmovaj formoj kaj enhavoj.

Artistoj superis la klasikismon jam pli frue, ol la filozofoj ekkonis la unuajn intencojn kaj limon de la klasika logiko kaj poste de la dialektiko kaj lanĉis dialogikan novan pensadon, kiu ĝuste en la politiko montriĝis en la plej nova historio (meze de la 20a jc.) jam ankaŭ reale necesa.

La temo de la verko THREE estas fakte reagi al la socia deficiito en EU. Je kiu ni ĉiuj suferas, kelkaj pli, aliaj malpli, kelkaj konscie, aliaj subkonscie, sed la problemoj estas ĉiutaga, konkreta kaj ĉiam pli akriĝas. La socia solvo de tiuj ĉi problemoj, kompreneble, ne plu apartenas al la arto. Sed la arto povas permesi al si, paroli pri ĝi kaj provoki solvojn. Ĝi faras tion precipe, se io estas aktuala. Ankaŭ en ĉi tiu konkreta komponaĵo la verkistoj ne celas solvi, sed nur montri (kaj nuntempe tio jam sufiĉas), kiu problemoj urĝas en EU.

Sed la provoko de la arto ne estas ĉiam komprenata kaj ofte interpretata en la senco de diversaj interesoj, plej multe sub influo de la mono, al kio precipe la ĵurnalistoj kaj profesiaj artkritikistoj inklinas. Tiel aperas plej ofte en la komentoj de kritikistoj la socia dimensio, kun la jam ĝenerale konataj klasikaj antaŭjuĝoj, de kiuj plej bone profitas la artisto; kaj se ne, tiam sufiĉas ankaŭ la nura populareco. Ĉar ripeti antaŭjuĝojn, sen pli profunda pripenso, estas de multaj konata kaj psikologie tre efika metodo por trovi apogantojn; nu, ĉiu ŝatas ricevi (idiote) konfirmon pri la propra saĝo kaj klereco. Tiujn trarompi kaj serĉi la veron malantaŭ la trivialo estas pena laboro kaj ne estas monpoŝe efika.

En la germanlingva festivala enkonduko²⁹ de la komponaĵo THREE troveblas kelkaj el tiuj. Komence, kaj oni eĉ povas diri precipe, estas legebla tute reala priskribo: „La nocio Esperanto estas ligita kun efikeco, demokrateco, egalrajteco kaj konstruo de interkulturaj pontoj.” Sed poste ŝanĝiĝas la tono. La tre interesa alegorio, kiam la telestirita miniautomobilo forflugas kiel helikoptero, anstataŭ doni pozitivan sencon (ekz. malligiĝi de landaj limoj, traflugante per komuna kompreno), estas kiel „utopio” deklasita. Ĉu vere la artistoj volis tion diri?

La artistoj lasas ankaŭ tian interpreton, se iu estas tiel inklinata. Sed tio ne signifas, ke ili volis tion diri. Nur povas esti, ke iu malsaĝulo ne vidas kaj ne sentas la pozitivan efikon, kiu ankaŭ por li povus helpi, se li estus kapabla malligi sin el la kaptiteco de la klasika pasinteco kaj malfermi sin por la aktualaĵoj en la estanteco.

Ekz. mi komprenas la alegorion (kompreneble per iu alia pensmaniero) tute alie. Por mi jes ja, tio estas alia dimensio, sed ne „utopia” kaj ankaŭ ne „ambivalenta” (kiel nomas tion la enkondukisto). Ĉar la dimensio de *inter-eco*, kiu tute reale okazas ja ĉiam en la historio, atingis nuntempe sian altan aktualecon konkrete en EU.

Jes, el tiu dialogika aktualeco naskiĝis ankaŭ tiu arta muzika verko, kiun ŝajne nia enkondukisto ĝis nun ne komprenis plene, kaj supozas iun ambivalenton. Jam estas iomete pli bone, se li (aŭ ŝi), ne serĉas iun dialektikan kontraŭecon kaj akceptas minimume la duvalorecon. Tiel

²⁹ <http://three.umsnjip.ch/oeuvres.html>

ni ne povas avanci, nur resti, kie ni ĵus estas, kaj resti en la nacieca pensmaniero de EU. Sed ĝuste tion ni volas eviti per la intereco, kaj protekti unuflanke la diversecon, sed aliflanke kompreni ankaŭ la alilulon.

Fine li ĝojas, ke ankoraŭ ne fariĝis realaĵo, „Ke Eŭropo interkomprenu sin” (slogano de EDE-GE ĉe la lastaj EU-elektoj en 2009). Ĉu eble li havas intereson, ke okazu la kontraŭo? Bone, demokrate mi komprenas kaj toleras tion. Sed jes, ĝuste pro tio, tiuj kiuj havas intereson, ke tio okazu, devas kunigi sin kaj politike agi. Ĉar mi estas konvinkita, ke internacia kompreniĝo estas intereso de la plimulto en Eŭropo kaj demokratece estas la intereso de la plimulto pli forta ol la interesoj de iu nur komerca, eble ankaŭ mon-elita malplimulto. Nur la plimulto devus konsciiĝi pri tio. Arta verko, kiel ĉi tiu, grave kontribuas al tio.

THREE tute ne estas „ambivalenta dimensio” (ja eĉ ne du sed tri, ha...ha...ha) en sia „ironio kaj amara seriozeco”, ja ĝuste per tiu ĉi dueco manifestiĝas la ĝis nun ne sufiĉe disvastigita (sed en la historio jam delonge konata) dimensio de la intereco, kiun nia enkondukisto ŝajne ne komprenas.

Ironia ĝi estas, ĉar la realo estas, bedaŭrinde, nur de malmultaj komprenata, tamen la intereso de la plimulto kaŝiĝas funde, subkonscie. Tiu ironio provokas, por pripensi ankaŭ la propran stultecon kaj ne rigidiĝi en la kredo posedi la veron. Nun, tiu sinteno apartenas ĝenerale al la karaktero de la arto kaj ne estas io nova.

Amara seriozeco estas la pinto de la dialektiko, kiu ĉi tie ludante aperas. Ne la absoluta kredo pri ĝi, reginta bedaŭrinde sufiĉe longe nian, eĉ ne tro longe forpasintan estintecon, estas, kiu fine provokis la tragikan katastrofon. La arto jam survojas rekoni la ridindecon de la seriozo kaj jam atentigas pri la malkapablo de la idealisme absoluta kredo pri la mondosavo.

Sed ĉi tiu erara kredo ne estas specialaĵo de Esperanto aŭ de la esperantistoj (kiun eble nia komentisto sugestas), sed de nia eŭropa idealismo (kun la ĉiuklopoda mondosavo), kiun eble la esperantistoj kelkfoje iomete eĉ pli forte kredis ol aliaj civitanoj, kaj pro tio la esperantismo neglektis (ne kapablis ekkoni) la dialogikan bazon (la novan

pensadon) de Esperanto, kiun ĝi posedas jam ekde sia origino.

Kiel ankaŭ la superema kritiko pri ironio ne trafas nur Esperanton sed la tutan klasikan pensmanieron, kune kun ĉiuj klasikaj lingvoj. Esperanto estas en tiu rilato la liberigo el tiuj klasikaj kadroj, fiksaĵoj kaj antaŭjuĝoj. Bedaŭrinde, plej ofte la „klasikaj” esperantistoj ne komprenis tion kaj volis postkuri la klasikismon. Ĉar nur ironie estas elteneblaj la ĝis nun mortserioze komprenitaj stultajoj de la klasikismo. Kaj pruvu nun, kiu eltenas la ironion kun pli da humoro, ĉu Esperanto aŭ la klasikaj naciaj lingvoj? (Sed atentu! Tio povas esti danĝera!)

La esprimmaniero de la artistoj estas plene tempoadekvata, sed bedaŭrinde la kritikistoj ĝis nun ne scias, kiel rilati al la adekvateco, sed ree kaj denove resaltas en la klasikajn kategoriojn. Ili vidas ambivalenton, anstataŭ malfermi la okulojn kaj ĉirkaŭrigardi; tiam ili povus mem rekoni, ke ĉiuj lastatempaj, eksterordinare signifaj homaj kontaktoj okazis jam precipe interece, t.e. dialogike.

Signifa estas por tiu ĉi verko la subigo de la klasikismo kaj la arta ligo al la politiko. En la arto la subigo de la klasikismo jam longe ne estas io nova, eĉ en la politiko ĝi jam necese okazas de kelkaj jardekoj, sed la ligo inter ili kaj la ebla efiko al la konscio de la EU-civitanoj estas io aparta. THREE alviciĝas al tiuj artaĵoj, kiuj eltiris sin el la hierarĥia klasikismo kaj vastigas la vojon al nova nedialektika, dialogika pensmaniero, kiu en la demokratia politiko de EU nuntempe fariĝis nemalhavebla. Arto kaj politiko estis ja ĉiam esence ligitaj unu kun alia.

42. Ĉu ekzistas Esperanto-filozofio ?

Parto el letero de s-ro Skalinski el Pollando:

...Okazis dum la 94a Universala Kongreso en Bjalistoko, kie mi interparolis kun la konata astronomo Hans Michael Maitzen. Ni iom interparolis pri la temo Esperanto-filozofio. Ĉe la fino de nia interparolo li proponis, ke mi turnu min al Vi, sinjoro kun tiu temo interesa... Mi ŝatus do demandi Vin, ĉu Vi persone opinias, ke ekzistas (aŭ ne?) ia Esperanto-filozofio aŭ filozofio de esperantismo? Mi ŝatus demandi Vin, ĉu (laŭ Vi) ekzistas kaj funkcias Esperanto-filozofio, kaj

se jes, kia ĝi estas, kio ĝi estas, kio konsistigas ĝin? Kia estas Via persona imago pri tio?...

Kara sinjoro Skalinski, dankon por Via letero kaj por via intereso pri tiu ĉi demando. Unue mi volas pardonpeti, ĉar mi ne skribas mane, sed mi ne havas tiel belan manskribon kiel Vi, kaj estus tro streĉe legi ĝin.

Via demando estas: „Ĉu vi persone opinias, ke ekzistas (aŭ ne) ia Esperanto-filozofio aŭ filozofio de esperantismo?“

La respondo ene de la kadro de la klasika eŭropa filozofio, laŭ mia opinio, estas simpla kaj mallonga: ne. Sed Vi demandas min ankaŭ persone, kaj se mi pripensas la aferon, la respondo fariĝas iom pli diferenca kaj komplika.

Ĝus al la unua respondo aldoneblas, ke la granda plimulto de la klasik-science pensanta mondo restus kontenta pri tia respondo. Sed filozofio estas pli ol nur scienco, kaj eĉ kiel nur klasiko ĝi subtenas liberan plupensadon ĝis la limoj de komprenebleco kaj ne volas esti devigata resti nur ĉe la kapteblaĵoj, sed emas etendiĝi ĝis la por la klasika scienco reale sperteblaj, sed jam ne (ofte nur ankoraŭ ne) kapteblaj kaj kompreneblaj fenomenoj.

Sed la limoj de la klasika filozofio montriĝis, kiel spertite, jam komence de la lasta jarcento al kelkaj filozofiaj pensuloj, sed estis apenaŭ atentataj de la cetera mondo. En nia kazo estas interesa la samtempeco de tiu ĉi sperto kun diversaj provoj iniciati ian internacian lingvon kaj ankaŭ la ekkono, ke al tiu turno ne sufiĉas nur la metodoj de la scienca pensmaniero, sed necesas ankaŭ konkreta sperto pri alieco.

Ĉar alieco estas reale ĉiam pli vasta ol la kaptebleco per la propra scienca sistemo. Alion mi neniam povas plene kompreni kaj kapti per la propra sistemo, sed en mia rilato al ĝi mi ĉian lernas ankoraŭ ion novan kaj pro tio mi devas ĉiam denove ŝanĝi ankaŭ mian sistemon, por povi enmeti, ordigi kaj konservi la nove allernitan. Simile okazis ĉe kelkaj provoj konstrui novan, pli ampleksan interkomprenilon, kiu estas ekster la tiamaj kadroj de interkompreno.

Tiu nova mondkompreno montriĝis unue al tiuj personoj, kiuj vivis en la medioj mem de diverseco kaj estis sentemaj ricevi impulsojn el tia ĉirkaŭaĵo. Zamenhof estis unu el tiuj, sekve de sia juda deveno kaj sia divershoma vivmedio.

En la filozofio ĉi tiu nova sperto nomiĝis „dialogika”, kaj per ĝi ekestis nova pensmaniero de la „dialogika filozofio“. (La relative plej konataj dialogikaj verkistoj estis Franz Rosenzweig, Martin Buber, Ferdinand Ebner kaj Gabriel Marcel.) Fakte ankaŭ kion Zamenhof samtempe faris, apartenas al ĉi tiuj dialogikaj spertoj. Li praktike konstruis laŭ sia sperto, dialogike novkompilitan lingvon el lingvaj elementoj, kiuj siatempe spirite disponeblis por li.

Sed por konscie sperti aliecon, kiu estis decida ĉe tia konstruado, la tempo devis historie maturiĝi. Niaj antaŭuloj ne kapablis fari tion, ili ja kredis la ekskluzivecon de la propra kaj la subecon de la aliaj (ĝis antaŭ nelonge en Eŭropo kaj ofte ankoraŭ nun en diktaturoj). Por la grekoj estis siatempe memkomprenebla ilia heleneco kaj kaj la barbareco de la aliaj, malgraŭ tio ili jam konis la demokration. De la sklaveca sistemo la socio bezonis longan evoluon ĝis la deklaro de la Homaj Rajtoj kaj ankoraŭ nun bezonas tempon ĝis la praktika realigo de ĉi tiuj rajtoj. (Restas ankoraŭ multe da laboro.)

Por povi kompreni la samvalorecon de la alia kun la propra, ni devis havi intertempe profundan sperton pri alieco. Nia nuna historia tempo de tutmondiĝo estas plenumata, por ebligi tion, ĝenerale por ĉiu civitano en la mondo. Pro tio nun ekestis iu tute nova, ĝis nun neniam antaŭe konata situacio. La sperto pri alieco en la pluevoluinta kvalito disvolviĝis al ekkono de la unu-de-alia-dependeco en la mondo, kiu ne plu estas nur „bona ideo“ sed necesa ekkono pri la pluivado de la homaro.

Zamenhof ankoraŭ revis pri „homaranismo“, kiu nuntempe fariĝis ne nur ideo sed ekzistada neceso. En ĉi tiu kunteksto estas lia postlasita verko plej aktuala. Se ni devas (aŭ se tiel plaĉas: ni estas kondamnitaj) kune vivi en ĉi tiu mondo sur nia kosmoŝipo terglobo, la homoj devus minimume kompreni, kion la aliaj diras, ĉu ili samopinias aŭ ne. Sed laŭ la ĝisnunaj historiaj spertoj malfacilas trovi komunan demokratian interkomprenilon por tio.

Evoluinte ĝis nun en la historio, la naciaj lingvoj kunhavas en si la dialektikan memdifinon kontraŭ la resto de la mondo. Pro tio, jam sekve de sia esenco neniŭ nacia lingvo favoras esti internacia interkomprenilo. Komune internacia, demokratia interkomprenilo bezonas jam per si mem respekti kaj akcepti aliecon. Esperanto havas en si ĉi tiun kvaliton jam ekde sia ekesto. Kaj ne nur, sed unike, jam historie, la dialogikan sperton (anstataŭ la dialektikan de la naciaj lingvoj) en la internacia Esperanto-komunumo, kiu povas servi kiel bazo por pluevoluigo.

Kiel mallongan konkretan respondon al Via ĉefa demando oni eble povas diri: la filozofio de Esperanto estas la dialogika filozofio de la nova pensado.

Tiu ĉi dialogika pensmaniero fariĝis nemalhavebla ekde la mezo de la pasinta jarcento en la internacia politiko (pro la detrupotencialoj) kaj fine de la jarcento ankaŭ profunde ŝanĝis la internacian politikan situacion, ebligante eĉ la ekeston de la Eŭropa Unio, kaj ĝi fariĝas ĉiam pli ĉeesta en la diversaj partoj de la homa scio: en la religiaj sciencoj (sen dialogika pensado ne estas imagebla la nuna stato de la juda-kristana dialogo), en la psikologio, sociologio, socipsikologio ktp, kaj aparte en la diversaj branĉoj de la arto, kie multe pli longe antaŭ la ekesto de la dialogika filozofio jam manifestiĝis la subigo de la klasikismo kaj la serioza taksado de la artoj de diversaj popoloj, ebligante ekesti en fekundaj sintezoj multe da novaj gravaj verkoj.

Ĉiam pli fariĝas rekoneble, ke la novo ekestas reale el la sintezo de diversaj spertoj kaj malpli el la propra profundeco, kion volis longtempe pruvi la klasika filozofio kaj poste la scienco. Se ni fosas en la profundo per mikroskopoj, aŭ en la spaco per teleskopoj, ni trovas ĉiam iun novan parton. Se ni volas fiksi, difini ion kiel la laste plej malgrandan aŭ inverse la laste plej vastan en la kosmo, baldaŭ ree kaj denove ni devas sperti novajn limojn. La realo neniam estas nia difino sed ĉiufoje nova sintezo el diversaj aliecoj. Tio estas la ekkono de la dialogika filozofio kaj la principo de la dialogika pensado: ĉiam denove preni serioze la alion kaj la tempon.

Realaj (ne nur klasike idealismaj) spertoj pri la alieco eblas nun en nia tutmondiĝanta estanteco ekster la kadroj de la eŭropa pensmaniero

(ekster la formala logiko de Aristotelo kaj la dialektikaj kontraŭaĵoj) en la sfero de la dialogika pensado per la konkreta spertado de alieco en la ekstereŭropaj kulturoj, ekz. la hindaj, ĉinaj, afrikaj ktp. En la sintezo de ĉi tiuj spertoj ekestas ĉiam pliaj novaĵoj en la mondo kaj disvolviĝas al nia tuteco.

Pro tio ankoraŭ necesus povi fari pli facila la unuan paŝon al la interkompreniĝo. Por posta profundigo estas ĉiam decidaj ankaŭ specialaj impresoj de la individuo. Nuntempe jam ĝenerale apartenas al la homaj rajtoj la rajto malfermi por ĉiu individuo la eblon aparteni al la internacia komunikado per plej facilaj, demokratiaj rimedoj.

Mi mem alvenis al Esperanto post longa studado de la dialogika pensado, trovante en tiu, por tiel diri, la konkretan uzon de dialogiko en *inter-ecaj* rilatoj de la parolado kun homoj el diversaj landoj laŭ la intenco, portata de UEA, de la Esperanto-movado. Pli frue mi nenie trovis tiel senpere la aplikon de la dialogika principo en la realo kiel en Esperantujo.

Post kelkjara sperto mi devis bedaŭrinde konstati la por mi unue nekredeblan, tamen efektivan skatolan enfermitecon, ofte ankaŭ ĉe esperantistoj, en la principoj kaj pensmanieroj de la naciaj manieroj de interkompreniĝo. Estas mirinde konstati, kiel fortan reagan influon havas la kutima pensmaniero ankaŭ al la plej aktuala, eĉ necese dialogika plibonigo de la interkomunikado en la mondo. Ankaŭ nevole ni daŭre estas katenitaj de niaj ŝajnaj privilegioj malfavore al la tutmonda komunumo kaj restas tro ofte, ĝis niaj fortoj sufiĉas, en la dialektika persvadarto ĉe niaj kontaktoj kun aliuloj.

Subigi ĉi tiun restaĵon de la malnova pensmaniero (minimume unue en nia esperantista medio, ĉar nur tiam ni povas efiki ankaŭ eksteren, se ni jam en la propra domo reale kaj sukcese uzas la novan manieron de interrilatiĝo, per kiu ni volas ĝenerale plibonigi la komunikadon en la mondo) per la konsciigo de la dialogika profundeco imanenta en la origino de Esperanto, estas grava tasko de la Esperanto-movado, kiun eble oni povus eĉ nomi parto de la Esperanto-filozofio.

La dialogika maniero de la interhomaj rilatoj fakte jam multe ŝanĝis la internacian politikon kaj eĉ la antaŭajn sistemojn en la mondo, tamen

tio estis ĝis nun ĝenerale ne sufiĉe perceptata. Esperanto havas ĉi tiun manieron en si jam ekde sia ekesto, pro tio ĝi taŭgas konsciigi pere de ĝi ĉi tiun fakton en la socio.

La dialogika rilatmetodo nuntempe jam komencis efiki preskaŭ ĉie en la mondo, sed ĝis nun estas ankoraŭ sufiĉe fortaj la kontraŭstaroj, kiuj volas daŭrigi la klasike kutiman, hierarĥian batalmanieron, por povi plu profiti en la naciaj socioj. Sekve necesas multa aktiva laboro, por daŭrigi interece la dialogikan vojon, precipe necesan por la paco en internaciaj rilatoj. Esperanto kiel lingvo kaj movado povas multe kontribui en tiu ĉi procezo, direktita al pli da demokratio, humaneco kaj justeco en la mondo.

Se tio sufiĉas por ia Esperanto-filozofio, eble ni povus paroli pri neklasika filozofio de Esperanto.

43. Respondo al kritikanto de la peticio, prezentita al la Unuiĝintaj Nacioj por Esperanto

Ĉu iu kredas, ke post ĉi tiu peticio UN enkondukos Esperanton kiel internacian lingvon?

Se antaŭ ol fari ion, ni jam kalkulas la rezulton, tio sekvigos nur pasivecon.

Konstrua kritiko stimulas la evoluon, sed detrua ĝenas la manifestiĝon de ĉiu vero.

Esperanto estas bedaŭrinde en situacio, kie ĝi bezonas multan energion, por korekti negativajn antaŭjuĝojn, sperteblajn ofte ankaŭ en la propra, t.n. Esperanta medio.

Estas ja bone, ke „pluraj spertaj komputilistoj esprimis siajn dubojn”, sed pli bone estus, se ili subskribus la peticion. Ĉar nedeziratajn reklammesaĝojn ĉiu ja povas spamigi, sed la aktiveco mem jam kromefikas en la vekado de la konscio pri la lingva problemoj kaj ĝia ebla solvo.

Honoro al la iniciatinto kaj bedaŭro al UEA, ke ĝi mem ne uzas tiun ĉi eblon de diskonigo. Sed en demokratio (kie ni nun vivas kaj devas ĝin

uzi) gravas ne la aŭtoritato de la iniciatinto, sed la nombro de la apogantoj, eĉ se ili ne sukcesas venki. Jam atentigi, ke ili ekzistas, kaj la mondo ne estas uniforma, estas ja sukceso.

Iu Esperanto-gravulo diris: „La plej granda obstaklo por Esperanto estas la esperantistoj mem”. Bedaŭrinde ni devas ĉiam denove sperti la veron de tiu ironiaĵo. Al detrua kritiko oni povas reagi aŭ ignori ĝin. Ĉu oni reagas, aŭ ne, ĉiufoje eniras negativaj influoj en la subkonscion de la legantoj (aŭdantoj).

Kelkaj energioj bezonas ĉiam denove racie forpeli la neadekvatan kritikon, kiu povas helpi ĉe la scienca evoluo. Sed nia problemo nuntempe estas ne la sciencaj argumentoj (tiujn ni jam havas), sed la pli vasta demokratia akcepto (ke ni estu aŭdataj). Kaj tie minimume la t.n. esperantistoj devus sin moderigi kaj ŝpari la detruan kritikon.

Nia kritikisto skribas: „Krome, en mallonga teksto enestas elementaj troigoj”, kaj citas la frazon *Imagine a world where people from different parts of the world can understand in each other with a common second language*³⁰ kaj komentas: „Bele, sed tio ne klarigas, kial la angla ne povas esti tia”.

Jes vere bele, sed estimata kritikisto, mi supozas, ke vi jam mem ion legis pri tiuj aferoj, pro tio mi ne volas vin ĉi tie tro enuigi. Sed se vi vere ne scias, „kial ne”, mi povas doni al vi literaturon, kie vi povus informiĝi. Ne pro tio, ke Esperanto estas kontraŭ la angla, sed (nur mallonge) ĉar la angla, ankaŭ se ĝi estas la plej internacia nacia lingvo, ĝi restas tamen nacia, kaj la naciaj lingvoj portas en si mem la dialektikan memdifinon. Esperanto estas ĝis nun la unua lingvo kun spertoj en internaciaj dialogoj (ne estas la sama kiel la dialektika persvadarto!), kaj jam en sia ekesto havis dialogikon, kiun ĝi portas en la propra esenco.

Cetere la angla frazo estas perfekte formulita por tiu celo. Ĝi alparolas simple kaj senpere, eĉ emocie la legantojn. Tie ne necesas informi, kial ne la angla. Tio necesas nur ĉe diskuto kun kontraŭuloj. Jes, vi povas ekzerci vin en kontraŭbatalo, sed la paĝoj, kie necesus varbi por

³⁰ Imagu mondon, kie la diversaj popoloj de la mondo scipovas interkompreniĝi per komuna lingvo.

subskribantoj, ne estas tute oportuna loko, ĉi tie minimume la Esperanto-parolantoj devus esti solidaraj kun la afero.

*This was Zamenhof's dream. L.L. Zamenhof was a polish linguist who in 1887 wrote the Unua Libro, a book detailing the rules of the international language esperanto.*³¹

„Zamenhof ne estis *'linguist'*, almenaŭ ne profesia. La Unua Lingvo ne enhavas la regulojn de Esperanto, nur ties kernon.”

Se Zamenhof ne estis lingvisto, kio do li estis? Ĉu estas por vi lingvisto profesoro de nacia universitato, kiu eble lernis kaj scipovas la propran denaskan nacian lingvon kaj kies celo estas pruvi por la cetera mondo la superecon de la propra? Tiaj lingvistoj ofte forgesas, ke lingvistiko komenciĝas per inter-lingvistiko, ĉar ĉiu reflekso pri la propra bezonas iun alian.

Zamenhof estis ne nur lingvisto sed ankaŭ inter-lingvisto, pri kio la plej multaj t.n. lingvistoj, kritikantaj Esperanton, povus nur sonĝi. Zamenhof ne nur sonĝis (por milde esprimi), sed ankaŭ faris la unuajn paŝojn. Jes li sonĝis pri pli bona mondo, pri kia ankaŭ ni, esperantistoj sonĝas. Mi tute konsentas, ke por la unua signifo en kazo de Zamenhof multe pli bone taŭgas la vorto lingvisto ol okulkuracisto.

Al la dua frazo: ĉu vere en tiu mallonga informo, kie la inter-ec-emuloj devus esti instigataj al la subskribo de tiu ĉi peticio, necesas diferenci inter „reguloj“ kaj „kerno“, se konsideri, ke reguloj apartenas al la kerno?

*Esperanto is the easiest language to learn.*³² „Ĉu oni komparis ĝin kun ĉiuj 6000 lingvoj de la mondo? Ĉiuokaze pli gravas, kion oni povas fari per ĝi.“

Por kio utilas tiu polemiko, kaj paroli pri pseŭdosciencismo – kompari Esperanton kun 6000 lingvoj –, kaj en la sekva frazo jam relativigi tion? Jes, gravas kion oni povas fari per ĝi. Fakte estas, ke ĝi estas pli facila, pli riĉa, pli fleksebla kaj pli internacia ol ĉiu alia lingvo, kiu

³¹ Tio estis la revo de Zamenhof. L.L. Zamenhof estis pola kuracisto, kiu verkis en 1887 la Unuan Libron, en kiu li detalas la regulojn de la internacia lingvo Esperanto.

³² Esperanto estas la plej facile ellernebla lingvo.

havas la ambicion esti internacia lingvo. Kaj por tio jam ekzistas eĉ sciencaj pruvoj, se ni volas esti tiom „sciencaj“.

*An estimated 2 million people around the world speak it.*³³ „Ĉio super kelkcent mil estas senbaza troigo, kiun ne pravigas tio, ke jam aliaj antaŭ ni troigis.“

Vere ne estas facile difini precize, kiom nombra estas la loĝantaro de Brazilo aŭ eĉ nur de Francio aŭ Germanio, pli malfacile estas kalkuli kiom da homoj parolas la anglan, hispanan ktp, kaj multe pli malfacile estas konstati, kiom da homoj parolas Esperanton, ĉar la faktoroj, difinantaj la kriteriojn por decidi la parolpovon en kazo de lingvoj, estas ĝenerale ne ekzaktaj.

Estimated 2 million, mi kredas, ni povas bonakonsciencie akcepti. Mi jam aŭdis pri 10 milionoj antaŭ kelkaj jardekoj, kaj tiam povis esti eĉ tiuj asertoj versimilaj, se la kriterioj de la parolpovo de ĉi tiu vere facila lingvo ne estus metitaj tro alte. Ni ne forgesu, en ĉi tiu sfero de la scienco oni kalkulas alie ol en la tekniko kaj natursciencoj. La plej grandan eraron faras la socisciencoj, se ili volas esti tute ekzaktaj, tiam ili perfortigas la vivon, kiu fine ne estas kalkulebla. La plej proksima vero de la sociaj sciencoj estas la dialogika libereco.

*In today's world, many languages are becoming extinct and Esperanto will help to preserve those languages.*³⁴ „Kiel? La minoritatajn lingvojn mortigas la oficialaj naciaj lingvoj de ĉiu lando. Ĉu ni do proponas Esperanton por enlanda uzo? Zamenhof pensis pri tio, sed malmultaj post li.“

La situacio en la mondo, kaj precipe en Eŭropo, tute ŝanĝiĝis. Ĉiam ekzistis partoj, kie la uzo de neŭtrala lingvo kontribuis al la malakriĝo de kontraŭaĵoj, sed la kutimaj naciŝtataj sistemoj ne ebligis tiun solvon. En EU doniĝis pro ĝia demokratia strukturo la ununura eblo uzi politike ĉi tiun solvon. Jes, Eŭropo estas enlando (aŭ ĉu kelkaj cerboj ankoraŭ ne povas akcepti ĉi tiun fakton?), kaj en ĉi tiu enlando Esperanto solvus kelkajn problemojn.

³³ Laŭtakse du milionoj da homoj parolas ĝin en la mondo.

³⁴ Nuntempe pluraj lingvoj fariĝas formortontaj, kaj Esperanto povas preventi la formorton de ĉi tiuj lingvoj.

Eĉ tiujn, kiuj jam de jarcentoj kuntreniĝas tra la historio, ekz. en Transilvanio inter tri popolgrupoj: rumanoj, saksoj kaj hungaroj. Sed en Eŭropo abundas similaj problemoj ene de landoj, t.e. Esperanto estus aplikebla por enlanda uzo. Kompreneble kun la celo, ke la respektiva lingvo ne estu subpremita de iu ajn nacia lingvo, sed protektata en la tuto.

*An international language will be a major step to world peace.*³⁵ „Kiel? En multaj militoj oni havis la saman lingvon ambaŭflanke de la batalfronto. Estas inverse: pli paca mondo povos konsideri eĉ Esperanton.“

Esperanto ne sanktiĝas (por tio necesus ankaŭ aliaj faroj), sed estus granda paŝo al la paco, kiel ĝuste staras en la peticio. La plej akraj kontraŭaĵoj ekestas per la nekompreneo de aliaj. Tio ne signifas ke per la sama lingvo ni tute komprenas unu la alian. Kiu povus aserti, ke li tute komprenas eĉ sian proksimulojn?

Ni troviĝas ĉe tiu ĉi demando ne nur en socia sed ankaŭ en psika sfero, kiu ankoraŭ pli komplikas la respondon. Sed kun sufiĉe granda verŝajneco ni povas fari tian aserton, kaj pravigi ĝin per kelkaj spertoj el la realo, eĉ se vi volas fari tion science, per tiu scienco, kiu estas en tiaj aferoj kompetenta, do per socipsikologio. Ke Esperanto subtenas la pacon inter la homoj kaj popoloj kaj ĝi havas eĉ grandan socipsikoterapian efikon en la socio per sia neŭtraleco, demokrateco kaj dialogika intereco.

„Se Esperanto iam venkos, estos malgraŭ la esperantistoj.“

Kial „malgraŭ“? Kial ne povus esperantistoj ankaŭ minimume kunhelpi, sed ne kiel bedaŭrinde ofte okazas, bremsi?

Tre verŝajnas, ke nur esperantistoj ne sufiĉas por la disvastigo. Estus jam laŭdinde, se la t.n. esperantistoj ĉesigus sian detruan kritikon, almenaŭ antaŭpublike. Tio estas simple nepermesebla.

Ĉi tiu lingvo eltenas ajnan kritikon kaj toleras la kritikistojn, kion ni ne povus aserti pri la naciaj lingvoj. Ankaŭ pro tio Esperanto estas pli taŭga kiel internacia lingvo ol ĉiu alia nacia lingvo.

³⁵ Internacia lingvo estus granda paŝo al la mondpaco.

44. Klasika aŭ nova, realeca Esperanto-movado?

Afiŝita de la redakcio de Libera Folio 16.01.2005

Ne estas tasko de la Esperanto-movado batali kontraŭ la naciismo, tio povas esti cedita al politikaj partioj. Sed ekkoni, montri kaj klarigi erojn de naciismaj enhavoj en niaj pensoj, sentoj, sintenoj kaj en la edukado, estas necesa okupiĝo de ĉiu esperantisto. Pro tio estas konvena la diskuto, kiu jam kelktempe daŭras en, por kaj kontraŭ la kunlaboro kun “lingvodefendaj” organizoj, ĉe kiuj post la malkovro de kamufladoj ofte montriĝas naciemaj intencoj, kiuj havas nenion komunan kun la Esperanto-movado, ĉu „nova”, ĉu „klasika”.

Ĉe tiaj diskutoj estas por nia movado eventuale pli grava la kromefiko, kiu tuŝas nian cerbon ĉe la klarigado de la antikvaj pensstrukturoj ol la solvo de la naciisma problemo, kiun la tempo ja nepre solvos. Ekz. la konfuzo pro la disklasado de la Esperanto-movado en la nociojn „klasika esperantismo” kaj „novesperantismo” (de Gary Mickle) provokas diskuton, kaj tio helpas al la klarigado.

Ĉu iam ekzistis klasika esperantismo? Kiel statas nuntempe pri la klasikismo ĝenerale? Klasikismo en la senco de antaŭ cent jaroj ne plu ekzistas. Ne ekzistas klasika muziko, nek literaturo, nek iu klasika kulturo ktp, kaj nek iu klasika lingvo. Per nuna juĝo ili eĉ neniam ekzistis absolute, nur relative en la limigita perceptokapablo de niaj prauloj. Nur en la muzeoj estas ankoraŭ akcepteble distingi la klasikan arton disde la natura popolarto. Sed laŭ la moderna dialogika artkompreno ni lernis esti atentemaj ĉe ĉiu tia klasifikado. Eĉ nia t.n. klasika scienco ne plu estas tiel „klasika”. La klasika logiko ne plu valoras absolute. Tiel en la plej granda naturkatastrofo ekde hommemoro saviĝis naturpopolo elde malgranda insulo en la oceano, sed cent miloj da homoj mortis, ĉar nia klasika scienco ne scipovis antaŭvidi tertremon. Kiel povus do iam ekzisti klasika esperantismo, kiun hodiaŭ ni devus postplori? „Neniu mondeparto estas same grava” (Renato Corsetti), nek ĉiu kulturo, tio ne plu estas klasikaĵo sed realaĵo.

Tro krude estas ankaŭ priskribi (de G. Mickle) la “transiron de la movado el la gvidmotivo de la paco al la kultura diverseco”. Fakte tiu transiro neniam okazis, certe ne en tiu senco, ke la unua ekskludu la

alian. La novo estas, ke pri la kultura diverseco de la mondo en la nova homa historio ni ricevis tute novajn spertojn kaj ekkonojn, novan konsciiĝon pri la neceseco de la protektado kaj savo de ĉiuj kultursferoj, kiuj povas enhavi grandan trezoron ankaŭ por la scienca ekkono de la origino de la homaro. En tiu procezo la paco neniam staras sur la alia flanko, sed ĉiam estas envolvita, ĉar nur pace eblas serĉi vojojn por ekkono kaj dialogika renkontiĝo inter diversaj kulturoj. Anstataŭ la pli fruaj grandiozaj ideoj el la pasinta historio necesas nun unuigi la homaron en „unu granda familio” per konkretaj paŝoj, sed ankoraŭ mankas la interkompreniĝo, kaj ne nur pro la lingvo. Gravas ankaŭ, *kiel* ni komunikas, la maniero de nia rilatiĝo unu al la aliaj.

Historio neniam plenumas ideojn kaj idealojn. Tio ne estas ĝia tasko. Sed ĝi ekzamenas kaj montras ilian valoron en la estanta realo. Se ili havas ion daŭre valoran, ĝi devas esti ĉiam kaj denove perata en la komprenformo de la estanteco, aliokaze ĝi malaperas en la tempo. Esperanto okulfrappe havas ion por diri, tion pruvas ĝia vivanta ekzisto. Ne pro tio, ke ĝi restis fidela al siaj propraj ideoj, sed pro tio, ke la realo ĉi tie kaj nun pruvas ĝian aktualecon.

Novesperanto (sen -ismo) montriĝas per nova pensado, fakte ekkoneble en la rilato al la kultura diverseco, tiel ke ĝi ne estas alternativo al la paco sed kondiĉas ĝin. Kulturbatalo okazas laŭ la malnova dialektika rilatmetodo, kie ĉiu grupo, eĉ ĉiu individuo devas persvade batali la propran manieron. Kion rezultigis tiu pensmaniero, ni konas el la historio, sed ni jam spertis ankaŭ la limon de tiu maniero. Bedaŭrinde tio ĝis nun ne povis sufiĉe konsciiĝi en niaj cerboj. En la realeco ni ofte rekonas la urĝe necesan novan vojon, sed sekvapaŝe ni ree kaj denove pensas per la malnovaj strukturoj, ĝis la realo ree devigas nin al dialogika reago al la naturo, al niaj kunhomoj ktp..., eĉ al Dio.

Tiu kulturbatala dialektika pensmaniero estas ekzemple bone ekkonebla en la nuna rilato de multaj naciaj lingvoj al la (uson)angla. Facile observeblas, kiel amasiĝas la kontraŭaĵoj, kiuj kaŝas la realon kaj malbligas ĉiun objektivan juĝon tiusence. Kvankam ĝis nun, laŭ reala juĝo, la (uson)angla lingvo multe pli kontribuis al la tutmondiĝo, internaciĝo, sennaciĝo, universaligo, aŭ ajne ni nomu ĉi tiun fenomenon,

kiu elpuŝas nin el nia enmemiĝinta idioteco, ol iu ajn alia lingvo en la mondo. Ĉar ĉi tiu lingvo plej multe sukcesis realigi la samajn valorojn, kiuj kuŝas ankaŭ en la bazo de Esperanto; kaj tio meritas respekton. Ĉiu envio estas falsa reago. Inverse, la tutmondiĝo de la angla faras nin sensivaj por valoroj, por kiuj Esperanto proponas finfine pli profundan solvon. Ni povas kaj devas multe lerni de la angla, kaj ni ankaŭ uzu tion por la disvastigo de la valoroj de Esperanto, ankaŭ por anglalingvanoj aŭ tiuj, kiuj parolas la anglan kiel internacian lingvon. Tiel ni povas montri, ke por internaciaj aferoj Esperanto pli bone taŭgas.

Sinceraj esperantistoj ne povas esti kontraŭ la angla pro la simpla kialo, ĉar unue Esperanto kiel internacia lingvo kontraŭas neniam aliajn lingvojn, sed estas kun ili en dialogika rilato kaj volas helpi al ĉiuj alilingvanoj en la internaciigo; due, Esperanto estas plej malmulte kontraŭ la angla, ĉar tiu lingvo estas nun la plej internacia nacia lingvo, tamen Esperanto estas laŭ sia esenco nure kaj pure internacia.

La endanĝerigo kaj minaco de la propra kulturo (vere konservinda), kiun vizias kelkaj kontraŭuloj de la tutmondiĝo kaj la angla lingvo, efektive neniam ekzistis, nek okazas en tiu formo, kiun ili kontraŭbatalas. Ekz. McDonalds ĝis nun nenie forŝovis la kutiman kuirmanieron ĉe tiuj, kiuj havas la eblon ĝui ĝin. Sed multaj aliaj ricevis eblecon manĝi ion malmultekoste kaj rapide, kaj tiel ŝpari tempon, por fari ion alian, eble iam kaj tiam pli longe ĝui konscie la specialaĵojn de la propraj kuirarto kaj kulturo.

Ke multe da specifajoj estas endanĝerigataj en la mondo, tio estas fakto, sed pri tio certe ne kulpas la angle parolantoj, prefere ni kulpigu nian agreseman eŭropan kulturon, se tio ion helpas. Sed pli bone estas ekkoni kaj provi savi tion, kio ankoraŭ restis savebla. Cetere la plimulto de la naturpopoloj aŭ malnovaj altaj kulturoj ricevis la konscion pri la propraj valoroj danke al la angla, aŭ alia fremda lingvo. Ĉi-rilate montriĝas kaj helpas por memekkono la fenomeno *inter*, kiu konsciigas la propran staton en la mondo kaj helpas trovi la ĝustajn rilatiĝojn kaj poziciojn.

Mi ne povas konsenti pri la timo de Renato Corsetti, ke la itala kulturo estas minacata pro tio, ke en Romo pli multaj kelneroj parolas la an-

glan ol en la provinco. Nek pri tio, ke la germana kulturo estas endanĝerigata pro tio, ke Berlino estas la dua plej granda turka urbo post Ist-anbulo. Same ne, ke la hungara lingvo baldaŭ malaperos, ĉar en Budapeŝto eblas angle studi komercon, germane medicinon kaj france ĵurnalismen. Sed mi vidas, ke reale helpas al ĉiuj tiuj landoj, ke nun iliaj civitanoj pli konscie vivas kaj trovas sian lokon en la mondo, ne nur enmemigite en la propra kulturo, kredante, ke tie estas la umbiliko de la mondo.

En la nova Esperanto-movado ne temas pri la forgeso de la historio, sed pri ĝia novkompreneo per nova pensado. Bedaŭrinde tiun evoluon kelkaj esperantistoj maltrafis. Ili ankoraŭ ĉiam plu batalas kontraŭ imperiismo, naciismo, kapitalismo ktp per sennaciismo, universalismo, komunismo ktp... Kiom ajn nobla ankoraŭ estis en la pasinta historio tiu batalkampo, la estanteco havas tute aliajn strukturon kaj problemojn, kiujn kompreni ne plu eblas per tiu idealisme dialektika klasbatala pensmaniero. Feliĉe, la Esperanto-movado neniam estis tiel potenca, ke ĝi iam ajn povis perforte venkigi sian “grandiozan ideon”. Mondomovaj ideoj malaperis en la dialektika strukturo de la propra potenco. Esperanto restis kun sia esence dialogika pensmaniero kaj ankoraŭ plu havas kion diri kaj proponi por urĝaj solvoj de la internaciaj mondproblemoj.

45. Kiu estas kvalifikita diri opinion pri Esperanto?

Aldono al la diskuto de 2005 en la Libera Folio

Estas pli bone, se ĵurnalistoj mem ne skribas sian opinion pri Esperanto, sufiĉas se ili nur raportas. De ili ne atendeblas sufiĉa scio en ĉi tiu sfero. Sufiĉas ja la nescio de aŭtoritataj personoj, kiuj ofte ripetas publike nur la ĝenerale konatajn antaŭjuĝojn, sen detale kaj profunde informiĝi pri la afero.

Por esti kvalifikita kritiki kaj juĝi pri Esperanto, oni devas plenumi kelkajn ne ĉiutagajn kriteriojn. Oni bezonas paroli minimume tri naciajn lingvojn (pli bone, se pli) kaj havi ankaŭ vivosperton en minimume tri diversaj kulturoj. Sur tia bazo povas komenciĝi ebla evoluo al konscia kompreno de la *inter-eco*.

Ne sufiĉas eĉ la kvalifiko de klasika lingvisto aŭ konata specialisto de nur unu nacia lingvo. Inverse, la specialiĝo eĉ povas ĝeni la super-rigardan komprenon. En la scienca mondo jam longe ne sufiĉas esti doktoro de unu faktereno, necesas havi pli (ekz. la Nobel-premiitoj estas ĉiam pli ofte opo da personoj, kiuj kunlaboras en diversaj sciencaj branĉoj).

Kaj la esperantistoj? Ankaŭ se multaj el ni ne plenumas tiujn ĉi kriteriojn, ni almenaŭ troviĝas en la medio de internacieco, kiu helpas lerni, atingi pli ĝeneralan interecon, en kiu fakte nuntempe moviĝas la reala mondo. Tiel eblas pli bone alkutimiĝi, kompreni kaj konscie aparteni al la vivmedio de la nuntempo.

Oni ofte kritikas la esperantistan diletantismon. Sed fakte ĉiu interscio komenciĝas kun diletantismo. Kiam specialisto forlasas sian fakon, ĉar en la profundo plu troveblas jam nenio nova, li komencas diletanti en aliaj sciencoj, kie li trovas ofte fekundajn koneksojn, el kiuj ekestas io efektive nova, el la mistero de la nekonataĵo (ne el la nenio), el la unu-kun-ali-ligit-eco, kiel ja funkcias kaj kreiĝas la reala (ne ideala) mondo.

Mi mem jam kelkfoje rifuzis kritikajn rimarkojn de klasikaj lingvistoj, profesoroj en Germanio kaj Hungario post ilia nekvalfikeble meznivela, ĝenerala, science ne fundamentita opinio pri Esperanto en ĵurnaloj kaj radioelsendoj.

Tamen la profesoroj de la klasike naciaj universitatoj ja ne estas ĉiuj tiel stultaj, kiel ili ofte ŝajnas. Post iom da dialogo kun kelkaj (ĉiuokaze tiuj, kiuj jam havis iom da internacia sperto) mi sukcesis veki intereson pri intereco kaj internacia lingva demokratio.

Kiel Kniivilä skribis, ĉu ĵurnalistoj volas aperigi artikolon, dependas grandparte de tio, *kiu* skribas aŭ diras la enhavon. Sed por Esperanto mem pli gravas, *kio* estas skribita kaj dirita. Se iu ripetas konatajn antaŭjuĝojn, pli malutilas ol utilas.

Ju pli iu persono estas konata aŭ havas aŭtoritaton pro sia posteno, des pli estas pozitiva aŭ negativa lia publike farita kritiko. Sed alta pozicio aŭ titolo per si mem ne signifas, ke tiu persono kapablas havi adekvatan scion, aŭ ankaŭ nur opinion pri la afero, pri kiu li parolas.

La hodiaŭa mondo malsanas je avido al populareco, kaj nun, en la tempo de Interreto, al mondkonateco. La intelektuloj tutmonde jam aŭdis ion kaj tion pri Esperanto, ĉar ankaŭ tio apartenas al la ĝenerala klereco. Sed pli da scio necesigas pli da klopodoj, por kiuj ilia plimulto ne havas sufiĉajn tempon kaj volon.

Tiu socipsika malsano povus esti por Esperanto eĉ stimula, se la reagoj estas ĝustaj. Ankaŭ la plimulto de la intelektuloj restas ĉe superemaj ĝeneralaj opinioj, tiel ili demonstras sian hejmecon en tutmondaj aferoj. Al konkretaj esprimiĝoj en la publikeco devas veni konkretaj reagoj t.e. ĝustigoj en la publikeco.

En la nuna tempo de sociaj medioj suferas ankaŭ la seriozeco de la scienco. Profesoroj kaj sciencistoj, pelataj de la deziro fariĝi pli konataj kaj popularaj, esprimas sin kelkfoje pri aferoj, pri kiuj ili ne estas kompetentaj. Sed ĉiuj ne povas fariĝi Nobel-premiitoj. Prof. Selten iam diris: antaŭ lia Nobel-premiigo neniuj volis havi ion ajn de li, neniuj ĵurnalisto volis lin intervjui. Post la Nobel-premio li apenaŭ povis ŝirmi sin de la sturmo de ĵurnalistoj.

46. Interfaka nova pensado

Mia ŝatata scienco post la filozofio fariĝis la socipsikologio, aparte de kiam mi okupiĝas pri politiko. Mia interesiĝo pri ĝi ne estas nova, ĉar ĝian aktualecon (jam antaŭ pli ol kvardek jaroj) mi rekonis kiel eksterlandano en Germanio. Por miaj filozofiaj studoj mi elektis ĝin en la munkena Universitato Ludoviko Maksimiliano (LMU) kiel kromfakon.

Senpere mi observadis la socion ĉirkaŭ mi kaj devis konstati konfuzan konduton, aparte en rilato al mi kiel eksterlandano. Dum la observado baldaŭ mi ekatentis, ke la kaŭzoj de ĉi tiu kondutmaniero estas ne konkretaj personaj psikaj perturboj. Ĉar mia tiama edzino Helga studis psikologion en la sama universitato, mi certgrade estis inicita en la individuan psikologion.

Baldaŭ mi komprenis la diferencon inter la individua kaj socia psikologio. Ĝi plej videble manifestiĝas, kiam psike tute ekvilibrataj individuoj, kolektiĝintaj en grupo, povas tute ŝanĝiĝi, tiel ke ili fariĝas socie

detruaj. Kaj kio estas eĉ pli interesa: multaj psike malsanaj personoj, arigitaj en unu grupo, povas esti tute normalaj.

Tiutempe apenaŭ pasis 20 jaroj post la fino de la milito, tiel do ĉirkaŭ mi la plimulton prezentis tiu generacio, al kiu la perdita milito havis senperan influon. Danke al la usona sennaziigo (*Entantifizierung*) troveblis ĉiam pli malofte malnovaj nazioj rasistoj. Sed mi kelkfoje havis la „feliĉon“ renkonti ilin kaj senpere konatiĝi kun ili. Ĉi tiuj estis persone tiuj socipsikologiaj ekzempleroj, kiuj individue estis malsanaj kaj bezonis diktaturon, por esti normalaj.

Ĉirkaŭ kvardek jarojn poste, kiam mi restadis jam pli longajn tempojn en Budapeŝto post la reĝimŝanĝo, kvazaŭ estus ripetiĝintaj kelkaj el miaj pli fruaj spertoj. Dum ĉi tiu tempo en Germanio estis malkaŝitaj kaj prilaboritaj la restoj de la naciismo kaj naziismo, kies rezulto fariĝis bone funkcia demokratio. Dum la milito ankaŭ Hungario staris sur la sama perdonta flanko, sed ĉi tie la problemoj ne estis prilaboritaj, plie balaitaj sub la tapiŝon. Dum la socialista diktaturo ili estis nur subpremitaj, konvertitaj en dialektikajn kontraŭaĵojn kaj prisilentitaj. Tiel do konscie ili tute ne povis aperi, multe malpli esti prilaboritaj.

Ĉi tiu prisilento efikis rebate en la demokratio de la libera socio. La eblo de la torda interpreto de la historio gajnis spacon, kio manifestiĝis ĉe kelkaj homoj per venĝavido, ĉefe kontraŭ tiuj, kiuj entute ne kulpis pri tio, kio okazis. Tiel la dialektiko reproduktas la kontraŭaĵojn, anstataŭ adapti sin al la evoluo, atentante la tempon.

Ĉi tie fariĝis urĝe necesa la nova dialogika pensado anstataŭ la ĝistima klasika dialektiko. Sed tiaj novaj pensuloj estis ankoraŭ multe for en Hungario post la reĝimŝanĝo. Kiu komprenis la metodon de Gorbaĉov, kiu tiam jam ŝanĝis la manieron de la tutmonda politikado? Nur tre malmultaj eĉ inter tiuj, kiuj ŝuldis ĝuste al li sian liberiĝon el la diktatura subpremo, interalie ankaŭ la hungaroj.

Antaŭ kelkaj tagoj hazarde venis al mi en la manojn dika volumo, kin mi volis legi jam verŝajne antaŭ kelkaj jaroj, sed ĉiufoje ŝajnis io alia pli grava. La titolo de la libro estas: „Historia kaj politika psikologio“, publikigita de la eldonejo Osiris en la jaro 1998 en Budapeŝto. Ĝi entenas ĉ. tridek, origine anglalingvajn studojn de diversaj

aŭtoroj pri novspeca scienca aliro al sociaj problemoj, en la hungara traduko de teamo de la Filologia Fakultato de la budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd.

Nun, posttempe ĝi kaptis mian atenton ĉefe pro tio, ke – por tiel diri – retroire ĉi tie mi trovis tian subtenon por miaj verkoj kaj prelegoj, pri kiuj ĝis nun en Hungario mi ankoraŭ ne trovis komprenon. György Hunyady nomas en la antaŭparolo la politikan psikologion tia import-aĵo, kiun „tiuj scias, kaj ni ne“. Poste li prezentas kun la rekomendo elde Ervin Staub „la aperon de fundamente novaj esplorterenoj“.

Eble ne estas superflue mencii, ke pluraj scienculoj de hungara origino, elmigrintaj el la Aŭstra-Hungara Monarĥio en Usonon apartenas kune kun Freud al la fondintoj de la psikologio, el kies pluevoluigo kreiĝis la socia psikologio, poste plej nove ankaŭ la politika kaj historia psikologio. Kaj kiel mi ĵus legas, ankaŭ prof. Ervin Staub devenas el Hungario.

Mi ŝuldas dankon al prof. Gottfried Karl Kindermann, lekciisto de la eksterpolitika katedro de la Munkena Universitato, kiu, reveninte el Usono, jam de kvardek jaroj instruis gvidata de ĉi tiuj efikoj. La metodikan signifon de ĉi tiu novspeca scienco ni, tiamaj studentoj (aŭ almenaŭ mi) ankoraŭ tute ne komprenis.

Ekz. mi partoprenis politikan seminarion, kie analizante psikologie la gvidantojn de la Germana Demokratia Respubliko (GDR), ni volis ekoni la influon de iliaj psikaj bildoj al iliaj decidoj. La partoprenantoj devis analize prilabori la personecon de po unu GDR-politikisto, poste referi pri ĝi. Ĉi tie la politiko kaj psikologio estis aplikataj interfake. Aŭ oni povus diri ankaŭ, ke ni transpasis la klasikan pensmanieron, uzante iun novan.

Kant ankoraŭ pensis tiel, ke oni devas ekzakte difini la limojn de la sciencoj. Pli malfrue evidentiĝis, ke tio malhelpas ilian pluevoluon. En nia nuntempo jam sperteblas, ke ĉiuj novaj eltrovoj okazas en intersfero.

Por tio estas eble la plej konkreta ekzemplo la kreo de la internacia lingvo nomata Esperanto, ĉe kiu, uzante la diversajn naciajn lingvojn, la aŭtoro kombinis logike ties elementojn. Ankoraŭ en la tempo, kiam komenciĝis la transpaso de la klasiko, inspirita de la artoj, tio rezultis

en la scienco signifajn novajn eltrovojn.

Tie, kie ĉi tiu evoluo ne estis rekonita kaj ĝustatempe akceptita, t.e. en la historio kaj politiko, la okazaĵoj kondukis al militaj tragedioj. Tia miskompreno aŭ nekompreneo de la tempo okazis ankaŭ en la historia politiko de la Habsburga Monarkio, kio sekvigis konsekvence ties disfalon. Ĉi tiun historian-politikan procezon mi celis prezenti interfake en kvin dulingvaj (esperantaj kaj germanaj) prelegoj. La ĉeftitolo de mia prelegserio estas: Kion povus lerni la Eŭropa Unio el la historio de la multpopola ŝtato de la Habsburga Monarkio? *Interfaka pritrakto de la problemo, el interpopola sfero, inter filozofio, historio, politiko, sociologio kaj socia psikologio.*

Ĉi tiujn prelegojn mi eldonis presitaj en formo de broŝuroj, kaj ili legeblas ankaŭ rete en Ipernitio en miaj blogoj.

En ĉi tiuj prelegoj senpere rekoneblas mia pensmaniero, kiu originas el la nova dialogika filozofio, kie la individuismo de la idealismo estas solvita kaj transpasita per dialogiko. Ĉi tiun novan pensmanieron, transprenitan el la filozofio, mi aplikis al la historio kaj politiko, implicante interfake ankaŭ la socian psikologion.

En ĉi tiu libro, tradukita el la usonangla, mi trovis poste hazarde la subtenon, fare de ĉi tiuj usonaj esploristoj, de la konkreta apliko de ĉi tiu interfaka metodo.

Mi legas en la antaŭparolo: „Kion ili scias, la okcidentaj, plejparte usonaj reprezentantoj de la „ekzistanta politika psikologio”? Kion ili akumulis dum la plurjardeka, ĉiam pli sistemeca studado de ĉi tiu interfaka scienco? Kiom ili implicis en sia horizonto la fenomenaron de la historiaj ŝanĝoj, do kiom historia estas ilia politika psikologio? Por eviti miskomprenon: tio ne estas bazo kaj celo de iuspeca konfrontiĝo. Kontraŭe, la spirito de kunlaboro trafenetras nian tutan entreprenon. Unuflanke la deziro de aliĝo, por renkontiĝi kun la rezultoj de ĉi tiu faktereno, promesanta esti interesa kaj eble publikutila, kaj aliflanke fari alirebla ankaŭ ĉe ni la konaron de la politika psikologio.“

Kio por mi estas aparte interesa: ĉi tie, en ĉi tiu intenco mi trovis tiun dialogikan momenton, kiu bezonatas por interfaka kunlaboro, por sinteno, kiu povas konduki al atingo de uzeblaj rezultoj en nia tempo.

Ĉi tiu nova maniero de rilatiĝo kune kun la nova, dialogika metodo estas necesa aktuale por la pluevoluo de la Eŭropa Unio.

Ervin Staub atentigas pri tre interesa kaj stranga reteno de la kunlaboro inter politiko, sociologio kaj psikologio, kiu grave bremsas la aktualan kaj necesan politikan pluevoluon en ĉi tiu kampo. En lia speciala esplortereno, ekzameno de genocidoj kaj kolektiva malamo, frapis al li la okulojn, ke iu ĝis nun ankoraŭ ne observata socipsikologia interligo ludas gravan rolon. Kiu ne klarigeblas per la politika kategorio de la ŝtatoj, nek per la psika stato de ties gvidantoj.

Al la esplortereno de E. Staub apartenas krome kondutformoj de tutaj kolektivoj. Ke ĉi tiu tereno ne estis plu esplorata volonte en kelkaj ŝtatoj, tio fariĝas komprenebla el la historiaj pasinteco kaj cirkonstancoj. Ekz. ne estis hazarde, ke antaŭ kvardek jaroj ankoraŭ ne ekzistis katedro pri socia psikologio en la Munkena Universitato en la moderna, usonamerika formo (kvankam historiaj radikoj tamen troveblis, ekz. en la kulturpsikologio³⁶ de Wundt). Kaj ne estas hazarde ankaŭ, ke eĉ kvardek jarojn poste ne estis scienca interesiĝo pri tio en Hungario. Nun ĉiam pli sperteblas la manko de la neglektita prilaboro de la socipsikologiaj problemoj de ĉi tiuj tempoj.

Estis multe pli simple transŝovi ĉiujn kulpojn al unu gvida persono, ekz. en Germanio al Hitler aŭ en Hungario al Horthy. Sed socipsikologie tio ne estas kontentiga. Por ke ordonoj estu plenumataj, necesas ankaŭ subuloj, kiuj obeas ilin, t.e. popolo, kaj en tia aspekto la interrilatoj ŝajnas esti aliaj, pli kompleksaj.

Por la analizo kaj kompreno de ĉi tiuj interrilatoj, poste por ties terapio jam ne sufiĉas la individua psikologio. Krome necesas la historiscienco, en kiu ekz. orientiĝoj kaj opinioj de popolo formiĝas, poste la politiko, kiu dum la paso de la historio difinas kaj postulas certajn kondutformojn. Jen ĉi tie necesas la interfaka kunlaboro de diversaj sciencoj.

Eĉ kiam jam komenciĝis la interesiĝo pri la psikologio de gvidaj personoj, por kompreni la kaŭzojn de la konduto de unuopaj gvidantoj,

³⁶ Völkerpsychologie

armeestroj, ŝtatestroj, estis ankaŭ plu neglektataj la reagoformoj de kolektivoj, t.e. popoloj. Aparte en tiuj kazoj, kiam la kondutformo de tuta kolektivo, ekz. de nacio aperis internacie, do kompare kun pli granda komunumo, negative³⁷.

„La unuigo de la politologio kun la psikologio en politikan psikologio signifas revolucion ŝanĝon. La psikologoj hezitis ĝis nun pli serioze enprofundiĝi en la studadon de la funkciado de pli grandaj grupoj, ĉefe de tutaj socioj.

Ties kaŭzojn ni povas trovi en la politiko de la regantoj. Ni povas ankaŭ tiel esprimi, ke la mastroj de la klasikaj universitatoj estas la ŝtatoj, kiuj ne havas intereson malkovri dialektike kontraŭajn interrilatojn, per kiuj ili volas pruvi la neceson de sia ekzisto. Sed la internacie nove kreigitaj fortorilatoj ŝanĝis la povon kaj direkton de la klasika politiko.

Montriĝis la neceso de tiu turno, en kiu malkovriĝas tiuj interligoj, kiuj kaŭzis tiom da problemoj en la lastatempa historio. Ĉi tien apartenas tiuj kolektivaj psikomalsanoj, kiuj kaŭzis la tragediojn de la pasinta jarcento. Por malkovri ilin, necesas inter pluraj sciencoj ankaŭ la kono de la historio kun enigo de pluraj novaj sciencoj, por kontentigi la postulojn de interfakeco. T.e. al la historiscienco aldoniĝas la politologio, sociologio, psikologio, sociopsikologio, en kies racia kunteno helpas la nova, dialogika pensado de la filozofio.

La eksperimenta implicado de ĉi tiu direkto sperteblas en la menciita libro, krom la prezento de sciencaj eksperimentoj. Se pripensi, ĉi tiu metodo estas ankoraŭ tiom nova kaj ankoraŭ tiom nedezirinda, ke plurloke, en unuopaj landoj ĉiam plu ĝi trovas apertan kontraŭstaron flanke de la ŝtatoj. Tial necesas tiel multe ĉi-rilate la demokratia politiko, kiu – kvankam ankoraŭ kun riskoj – atentigas pri la malrapidigo, fare de la klasika potenco, de la validiĝo de ĉi tiuj novaj trajtoj.

Ne estas hazarde, ke ĉi-rilataj esploroj ne facile ricevas lokon en la universitatoj, funkciigataj kaj financataj de la ŝtatoj. La utiligo de ĉi tiuj rezultoj povas okazi nur en aranĝoj ekster ili. Almenaŭ kiom ili es-

³⁷ Ervin Staub: Historia kaj politika psikologio, p. 17, Rekomendo aŭ: fundamente novaj esplorteroj aperis.

tas aprobitaj de la posedantoj de la klasika povo, do en someraj universitatoj aŭ sciencaj konferencoj. Sed tie, kie ili konfliktas kun la klasikaj metodoj, ekz. en la kazo de CEU (Centr-Eŭropa Universitato) en Budapeŝto aŭ de la antaŭvidita sed ne permesita AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) en Komarno, Slovakio, ili estas laŭeble malhelpataj.

Sed la interfakajn rezultojn ni imagu ne kiel harmonie interadaptigeblajn sciencajn mozaikerojn, kiuj rezultigas novajn konojn. Uzeblajn rezultojn antaŭas diskutoj kaj ofte sinkontraŭaj opinioj, ĝis kreiĝas akcepteblaj sintezoj. Eĉ en la sama scienco povas esti disopinioj pri tio, kio utiligeblas, kaj kio ne en alia scienco.

Aparte en la psikologio tre diverĝas la opinioj. La origina psikoanalizo trairis dum sia pluevoluo tre multajn ŝanĝojn, ĝis ĝi atingis tiun staton, kiu jam aplikeblis al grupoj, kaj ricevis la nomon socia psikologio. Sur ĉi tiu evolulinio aperis la eblo de analizo, aplikebla por tutaj popoloj, al kio aliĝis laŭnecese ankaŭ la historiscienco kaj la politiko. Ĝis la esploro alvenis al la stato, kiu estas priskribita en la menciita libro.

Unue okazis provoj disvastigi la pensadon nur en la limoj de la klasika pensado, ĝis – kiel en la filozofio – montriĝis la klasikaj limoj (kiujn ankoraŭ Kant difinis), ene de kiuj jam ne eblis pluevoluo. Tiam aperis la nova metodo de la nova pensado en nova dimensio, la interfakeco.

En ĉi tiu historia-politika psikologio montriĝis unuflanke la limoj de la klasika pensado, do la ne plu kontentiga scienca rezulto, kaj aliflanke la neceso de transpaso, transiro en la novan pensmanieron. Per la klasika, hierarhie aplikata, individu-psikologia analizo de la konduto de unuopaj personoj nome ne eblas konkludi por tutaj socioj.

Tia metodo estis iom utiligebla nur tiam, kiam la potenco de reĝoj aŭ diktatoroj ankoraŭ funkciis, kiam la popolo ankoraŭ faris sen pliaj demandoj tion, kio estis al ĝi ordonita. Sed la historio jam almenaŭ antaŭ ducent jaroj transpasis, pli ĝuste trarompis ĉi tiun klasikon. Ĉi tie aperis ankaŭ la eraro de la malnova pensmaniero, kiu sekvigis la disfalon de imperioj, kiuj ne komprenis la novan potencon de la demokratio, kaj la regantoj perdis la regopovon super la popoloj.

La evoluo de la scienco okazas, kompreneble, ne de hodiaŭ al morgaŭ,

ĝi devas maturiĝi en la tempo. Unue okazis tiuj historiaj tragedioj, kiuj instigis la homaron al pensado. Ĉi tiuj okazintaĵoj pruveblas per historiaj faktoj. Post tiaj antecedentoj komenciĝis la evoluo de la psikologio kiel scienco en formo, kiu antaŭe en la klasiko estis tute nekonata.

„En la pasinta duonjarcento la interefiko de la politologio kaj psikologio estis tiel daŭra kaj vigla, kiel la interinfluo de ajnaj sociaj sciencoj. Tio estas surpriza, se ni konsideras, ke ĉi du sciencoj limas kun diversaj terenoj: la politologio kun la ekonomiko kaj historio, la psikologio kun la sociologio kaj antropologio... La kunlaboremo de la politologoj montriĝis en tri epokoj sur la kampo de la studado de la politika sinteno, sed la intereso de la psikologio montriĝis ĉiam sur novaj kampoj, unue en individu-, poste en la socia kaj fine en la kognativa psikologio.³⁸“

Kio antaŭ ĉ. tridek jaroj estis surpriza por la klasika pensado, en nia tempo por pensuloj, spertaj pri la sciencoj, estas tute ne aparta. Prefere tute komprenebla, se ni konsideras la plej novajn eltrovojn, aŭ pripensas, kiel, al kiuj kaj kial estas aljuĝataj nuntempe la Nobel-premioj.

Ni travivas la liberiĝon el la limigoj de la klasikaj normoj, la elpaŝon en la „liberan vaston“, la malfermiĝon al la nova pensado, por kiu povas manifestiĝi ankaŭ tio, kio ĝis nun ne estis perceptebla, kvankam ekzistis. Nia nuna mondo estas plena de tiaj malkovroj, kiujn la klasikaj normoj, kategorioj, hierarkioj, al kutimiĝoj ktp ne kapablis kapti.

La mondo de nia nuntempo jam funkcias praktike interfake, konstruante sur la tre gravaj originoj de la klasikaj bazosciencoj. Sed pluevolui ni scipovis nur tiam, kiam ne memvole, sed trudataj de la cirkonstancoj de la realo, ni deviĝis rezigni la perforton de la klasiko. Transpasinte ties formalecon, ni malfermiĝis al la laŭnecese aperinta nova pensado.

Lernante en nia nuntempo el la historio, ni tiel povas transpaŝi en la estontecon, ke eble ni faros malpli multajn erarojn, kunplektante la diversajn sciencobranĉojn en bukedon, kiu pro sia konsisto kapablas

³⁸ The Poly-Psy Relationship: Three Phases of a Long Affair . In Iyengar, S.- M. Guire, W. J. (eds) Explorations in Political Psychology, Durham-London, 1993, Duke University Press, 9-35.

laŭeble plej bone solvi la pezantajn problemojn de la homaro.

47. Dialogika transpaso de la klasiko per Esperanto

La dialogike nova pensado en la filozofio transpasis, nun jam antaŭ pli ol cent jaroj, la klasikan idealismon. Preskaŭ samtempe kun la apero de la arte-farite dialogika lingvo Esperanto, kiu siaparte simile transpasis la klasikan lingvistikon. Tio estis la tempo de secesio, kiam la arto ne plu volis obei la klasikajn regulojn de bildigo kaj serĉis novajn vojojn.

Al klasikaj pensuloj ŝajnis tiu nova movado kiel malserioza ĥaoso kaj ili volis ridindigi, diskreditigante ĝin, kie ili nur povis, kaj malhelpi ĝian prosperon. En ĉi tiu soci-psika, spirita medio ennaskiĝis Esperanto. Sed la arto estas la plej libera maniero de homa kreado, sekve la artistoj ne lasis sin impresi de la detrua kritiko. Tiel estiĝis la avangardo de la burĝonanta nova pens- kaj sintenmaniero.

La rifuzaj reagoj de klasikistoj estis ofte tiel kruelaj, ke por la novpensantoj ne plu restis alia ebleco, ol forlasi la klasik-naciajn landojn de la malnova Eŭropo, kie ilia agado estis tute handikapita. En la amerika kontinento ili (ankoraŭ) estis bonvenintaj. Artistoj, sciencistoj, multe da intelektuloj forlasis la ĉiam pli forte naciigitajn ŝtatojn. En demokratiaj landoj ili povis libere transpasi la klasikajn sciencojn kaj evoluigi la „novan pensadon“.

Tute novaj sociaj sciencoj komencis disvolviĝi, kiel ekzemple psikologio, socipsikologio, sociologio, politologio, pacesploro ktp. Ankaŭ la natur- kaj teknikaj sciencoj profitis de la liberiĝo disde la klasiko. La aristotela logiko, kiu ĝis tiam reguligis kaj reduktis la sciencon pensmanieron en la filozofio, estis transpasita.

Malfermiĝis por la pensado „libera vasto“, en kiu relativiĝis la klasiko. La relativecteorio de Einstein kaj la kvantummekaniko de Max Planck estis rezultoj de la transpaso de la klasika fiziko. La nuna teknika vivmaniero de la homo estas plene determinata de tiu evoluo. Tiel en la senfina makrospaco de la astronomio, kiel en la mikrospaco la nanoteknologio.

La novpensuloj antaŭvidis multajn sekvontajn problemojn, sed iliaj

avertoj nur de malmultaj estis komprenataj. La historio bezonis ankoraŭ du terurajn militojn, ĝis sperti la kritikan limsituation en la mondo. Nuntempe klare montriĝis la neceseco de la nova pensado.

En nia tempo klare montriĝas la problemoj kaj en la naturo kaj en la socio. Ne plu eblas tiel regi, kiel antaŭe la klasiko pensis. Nek en la socio, kie post la fiasko de la dialektikaj revolucioj montriĝis la neceso de la dialogika demokratio. Nek en la naturo, kie montriĝis la limoj de la ekspluatado de la riĉfontoj, kaj devas esti senteme t.e. dialogike observata ankaŭ, kio estas eltenebla en la naturo.

Kiel la arto transpasis la klasikan belecon en la pentroarto, muziko kaj aliaj artospecoj, tiel transpasis Esperanto la belecon de la klasikaj lingvoj. Restis nur la esence grava de la lingvo, la esprim- kaj komprenkapableco. La idealisme klasika beleco retiriĝis en la relativan fonon. Esprimi kaj kompreni unu la aliajn estas la baza tasko de ĉiuj lingvoj. Sur tiu grundo poste sedimentiĝas la kutimoj, kiuj produktas idiomajn kaj idiotismojn.

Reuzataj, la subjektivaj kutimoj ricevas en la literaturo tradicion kaj ekestas la klasikaj beletraĵoj. Bedaŭrinde esperantistoj plejofte postkuris tiujn klasikajn valorojn kaj samtempe forgesis sian propran gravan karakteron, kiu manifestiĝas en la dialogikeco. La arto mem jam antaŭ kelkcent jaroj ĝenerale transpasis la klasikecon, kiu ankaŭ nuntempe daŭras.

Esperanto kunportas en si la tradicion de la transpaso de l' klasiko. Ĝi ekestis en la spirita deturniĝo disde la idealismo al la reala neceso de aktuala kompreniĝo, en situacio, kiam pruviĝis la nesufiĉeco de la klasikaj lingvoj. Ne en kontraŭeco al tiuj, sed helpante, dialogike kunordigante ties elementojn al pli klara kaj senpere komprenebla nova sistemo.

Estas memkompreneble, ke la klasikaj lingvoj ne povas kaj volas akcepti ĉi tiun ĝeneralan evoluŝtupon de kompreno, prenitan el la propra dialektika karaktero. Ili staras ne nur unu kontraŭ la alia en konkurenco, volante ĉiu esti ekskluzive la plej bona, sed ankaŭ kontraŭ Esperanto, kiu portas ne nur iliajn proprajn elementojn, sed ankaŭ tiujn de iliaj kontraŭuloj.

La klasika lingvistiko estas ekskluzive dialektika. Eĉ la klasika lingvo-komparado ne liberiĝis de la klasika logiko, kiam ili ordigas kaj klasifikas la kelkmil ekzistantajn lingvojn de la mondo. Mankas ankoraŭ la kvalito de interlingvistiko, kiu observas ĉiun lingvon en ties unueca kvalito de universala kompreniĝo.

Granda misprezento de Esperanto fare de la klasiko estas la miskompreno, ke ĝi volas forigi aliajn lingvojn kaj resti unusola universala lingvo. Aliflanke por tiu antaŭjuĝo kulpas ne malmulte ankaŭ la esperantistoj mem, ĉar dum sia historio ili ne klarigis kaj rifuzis sufiĉe kompreneble tiun eraron. Eĉ ili nomas la mondan Esperanto-organizon Universala Esperanto-Asocio. Tio estas nur unu ekzemplo, kie la esperantistoj mem devas liberiĝi de la klasiko.

Esperanto estas ĉi-sence miskomparata kun la latina lingvo. La latina estis siatempe universala lingvo, interalie kun la postulo de la katolikismo esti tutmonde ampleksa religio. Sed la historio montris tute alian evoluon. La latino mem disfalis en diversaj latinidaj popollingvoj. Male, Esperanto estis kreita el la klasikaj popollingvoj, kaj volas solvi iliajn, en la historio ekestintajn kontraŭaĵojn.

Post la universaleco de la latina la simplaj popollingvoj transprenis la gramatikan strukturon de la latina kaj klasikigis la iamajn popollingvoj al klasikaj popollingvoj – kun la rezulto de klasik-dialektika kontraŭeco. Tio komencis okazi en la renesanco, t.e. antaŭ kvin- ĝis sescent jaroj.

La postan rezulton ni bone konas el la historio. En la 18-20a jarcentoj disvolviĝis tiu diferenciĝo ĝis nuntempe al ŝovinismoj kaj naciismoj. Ne estas troigo aserti, ke tio eksplodigis du kruelajn militojn en Eŭropo kun tutmonda efiko.

Se ĉi tiuj karaktertrajtoj de la klasiko estus konscie pripensitaj, tiam estus malfermita la eblo kompreni la proprajn ecojn de Esperanto kaj liberiĝi de la potencialaj subpremoj en la historio. Por atingi forton, Esperanto mem devas uzi la historion, kie jam sufiĉe longe komenciĝis tiu liberiĝo. Ankaŭ pro tio, ke ja Esperanto mem naskiĝis el la posta rezulto de tiu ĉi liberiĝo.

Tamen la reago flanke de la klasiko restis ĝis la nuntempo sufiĉe forta.

Por ĝuste kompreni la econ de Esperanto, ĝi devas esti eksplikata en rilato kun la evoluhistorio de la socio, kie manifestiĝas la ligiteco al ties kunecoj. Esperanto neniam estis nur iu izolita movado, sed ĉiam troviĝis en ligiteco kaj lukto por nova, pli bona mondo en la socio.

Nuntempe ĝenerale montriĝis necesa la turniĝo al la nova pensado. Tio, kio longtempe evoluis dum la historio, nun fariĝis neevitebla por la pluekzistado de la homaro sur la tero. Ne nur en la socio fariĝis necesa la nova dialogika rilato sed ankaŭ en la naturmedio.

La scienco kapablas nun antaŭvidi, ke la vivo endanĝeriĝos, se ankaŭ plu restas efikantaj la klasike dialektikaj principoj, kiel persvado, fiereco, heroeco, venkemo, regado, subpremo ktp, kiuj kondukas al klasika tragedio. Ili estas konataj jam ekde la antikvaj tempoj, sed ni nur antaŭ nelonge ekkonis, ke ni ne plu povas facile superregi ilin, kaj la afero fariĝis serioza, kiel elekto inter morto kaj vivo.

La filozofio de la nova dialogika pensado ekestis post la konscia fino de la klasikismo kaj precipe pro ĝia dialektika moralo, kiam ne povis esti kontentige difinita la bono kontraŭ la malbono, ĉar estas ja evidente, ke ĉiu kontraŭaĵo penetras en sian kontraŭflankon. La volo indidividue difini la unuan flankon kontraŭ la alia, kondukis al la nun konata historia katastrofo.

En la realeco la unuflanka idealisma konvinko pri la vero ne plu havis sian bazon por ekzistado. La realo montris tute alian rezulton, ol antaŭvidite de la klasikaj idealoj kaj ideologioj. Montriĝis la reala neceso de ambaŭflanka pritrakto, t.e. serĉi kaj trovi dialogike ambaŭflankan solvon por la pluekzistado, kiu estis endanĝerigita en la kulmino de la idealismo (post la kredo de unuflanka idiotismo, kiu nuntempe konkretiĝas en la terorismo).

Unu el la konkretaj sekvoj de ĉi tiu kontraŭaĵa diferencigo montriĝas en la klasika lingvistiko. Universitatnivele estas pritraktataj la t.n. naturaj lingvoj unuflanke kaj la konstruitaj planlingvoj aliflanke. La esploroj ne kapablas trapaŝi tiujn klasikajn barilojn.

Unuflanke la klasik-universitata esploro fosas en la profundo kaj volas pruvi la denaskan naturecon de ĉiuj lingvoj, kiuj devus esti ankaŭ hierarĥie ordigitaj laŭ la klasika logiko. Sed ĝuste al la lasta profunda

scienca demando ĝi ne havas respondon kaj perdiĝas denove en la mitologio.

Aliflanke por la klasika pensmaniero la konstruitaj lingvoj staras iomete flanke, nur pretere ĝi okupiĝas pri ili, kiel pri kuriozaĵo en la historio (kiuj estiĝis alimaniere el laŭtakse ĉ. du mil provoj). El ili elstariĝas kelkaj konstruitaj lingvoj, kiuj atingis eĉ malgrandan socian parolantaron. Ekz. volapuko kaj ido, kaj alte elstaras el tiu vico Esperanto, la arte-farita lingvo.

La klasika lingvistiko komencis nun iomete okupiĝi pri Esperanto post la evidentiĝo de la necesa lingva komparado. Dum ĝi aperis tute neatendita surprizo por la lingvistiko, kiun ĝi ne povis tute ordigi, digesti kaj kompreni en sia propra sistemo. Influata de la reala evoluo, la hierarĥia sistemo de la klasikaj lingvoj disfalis. Restis nur dialektika batalo sen sciencaj bazoj, sur mitologia fundamento, ĉe kiu diversaj naciaj lingvoj volis atingi internacian superinflun. Sed ankaŭ tiu dialektika persvadbatalo montriĝis senutila post la nuntempe mond-vasta venko de la angla, kiam ĉiu batalo en ĉi tiu sistemo fariĝis sen-senca.

En ĉi tiu situacio ricevis la arte-farita lingvo Esperanto tute alian signifon, ol estis al ĝi atribuita de la klasika lingvistiko. Unue, la naturo de la lingvoj estis ĝenerale profunde pridubita. Kio ekz. en la filozofio jam dekomence estis skeptike akceptita, ĉar filozofio ja ĉiam distingiĝis inter naturo kaj socio. La lingvo estis precipe kiel spirit-socia fenomeno komprenita.

Post la plej novaj natursciencaj ekkonoj, kiam la unusubstance atomisma ideo estis refutita per pruvoj, ekestis tute alia komprenebleco ankaŭ de la naturo. En la kulmino de la klasika pensado montriĝis en la filozofio la fino de tiu unusubstanca idealismo. Tiu ekkono komence estis aplikata unue al sociaj sciencoj. En tiuj novaj cirkonstancoj fariĝis ankaŭ la lingvoj tute alie kompreneblaj ol de la iama klasiko.

Fakte la klasiko estis subigita en la natursciencoj, en la filozofio kaj ankaŭ en la sociaj spertoj de la lastproksima historio. En tiu situacio aperis por Esperanto tute nova komprenebleco, liberigita de la klasika subpremo en la pasinta historio.

Sekve, Esperanto kiel arte-farita lingvo, ne plu estas malmultvalora, sed inverse, pli evoluinta ol la klasikaj naciaj lingvoj.

Se ni komencas kompreni la transpason ĉe la arto, ni povas diri, ke ĝi estis tiu, kiu faris la unuajn paŝojn al la subigo de la klasiko jam antaŭ kelkcent jaroj. Kiam por la pensado kaj la konscia kompreno ankoraŭ eĉ ne vidiĝis tiu alternativo, la arto kaj artefaritaĵo jam montrigis kiel pli alta spirita okupiĝo ol nur en klasikaj reguloj enfermite funkcia mondo de la pasinteco.

Tie estas Esperanto en tre bona socia kuneco. Kaj la t.n. nenatureco de Esperanto ŝajnas en tute alia lumo, ĉar ankaŭ la t.n. naturaj lingvoj ne estas pure naturaj, ja ili mem de la komenco de sia klasikeco, kiel simplaj popollingvoj estis konstruitaj el la latinaj sistemo kaj gramatiko. Tamen en ĉi tiu kazo Esperanto ne volas altigi sin super la naciajn lingvojn, ĉar ĝi konfesas sian devenon el tiuj, tamen ne ekskluzive sed dialogike, en kunmetita evoluo de ties elementoj al nova statuso, sen superflujaj, internacie nekompreneblaj idiomaĵoj kaj idiotajoj.

En la arto jam antaŭ kelkcent jaroj aperis multaj verkoj, kie estas ekzemplodone ekkonebla la transpaso de la klasiko. Tiel en la nuntempo neniu artisto plu farus klasikan verkon, escepte en la lernejo, por profunde trastudi la ecojn de la klasiko, ĉar kompreni la transpason de io eblas nur, se oni havas kaj postlasas tion, kio estas transpasebla.

Por tio ni bezonas la historion. Al ĝia kompreno apartenas la kompreno de postlasitaj eventoj kaj verkoj en ties tempo kaj evoluo. Post la provo transpasi la klasikan socion en Francio, komenciĝis en Parizo la daŭrigo de la evoluo en la arto. Ekestis diversaj decidaj provoj en la pentroarto. En la arĥitekturo ankoraŭ daŭris la klasiko sen evoluo, precipe ĉe reĝaj, ŝtataj palacoj, eĉ ĉe parlamentaj konstruaĵoj, kie devis esti esprimita la klasika potenco.

Esperanto apartenas al tiu spirita sfero de la transpaso de la klasiko, tre simile al tiu de la arto. Tiusence ĝia plej trafa signifo estas: artefariteco. El kunfando de ĉi du vortoj estas nomita la plej adekvata karaktero de tiu ĉi lingvo. Estas klare, ke ĝi ne estas planlingvo kaj ne

estas konstruita lingvo, sed io pli valora: libereco de la arto, ligita al vivanta realo. Zamenhof parolas en siaj prelegoj precipe pri arte-farita inter-nacia lingvo.

Esperanto ne estas iu al la klasika idealismo apartenanta ideo, idealo, ideologio, kiuj regis en tiu tempo, kiam ĝi ekestis kaj ankoraŭ ne estis ĝuste komprenata. La plejmulto de tiuj geniaĵoj jam forpasis, sed Esperanto vivas kaj evoluas plu, ankaŭ post 130 jaroj. Ĝiaj elementoj ekestis el vivantaj lingvoj, ĝia bazo devenas el tiu vivanta realeco, kun la reordigo de ties dialektikaj kontraŭaĵoj en dialogikan kunecon.

Esperanto estas la reala manifestiĝo de la nova dialogika pensado. Ne nur iu ajn lingvo, sed la adekvata esprimilo de la nuntempe necesa dialogika pensado. En la tempo, kiam la klasike dialektika pensado puŝis la homaron per kontraŭaĵoj al la rando de katastrofo.

Ne sufiĉas nur esti konvinkita pri la propraj vero kaj supereco kaj serĉi la plej bonan strategion por trabatali ĝin. Tiu ĉi maniero funkcias nur tiam, se la alia flanko estas pli malforta ol ni. Tiu ĉi metodo efikas precipe en la pasinteco, kiam perforte, ankoraŭ per dialektikaj rimedoj, oni sukcesis altrudi la klasikan hierarĥion.

En la nuntempo, post kelkaj sociaj revolucioj kaj evoluoj la hierarĥio laŭ la klasika logiko ne plu estas senkondiĉe akceptebla. Kaj post la apero de diversaj grandpotencoj, kiuj ne plu povas devigi unu la alian, ŝanĝiĝis ankaŭ ĝenerale la prestiĝo de la antaŭaj klasikaj rilatoj. Restis la dialogika klopodo kompreni la alian kaj serĉi por ambaŭ akcepteblajn solvojn de la problemoj.

Dialogika pensado kaj Esperanto kompletigas unu la alian. Esperanto estas la plej konkreta uzo de ĉi tiu pensmaniero. En la filozofio ĝenerale ofte okazas, ke ankaŭ saĝaj ideoj restas nur teorioj, pripensado de iu nova ebleco sen konkreta apliko.

Dialogika pensado okazas aplikeble kaj uzeble en Esperanto. Ne nur pro tio, ke Esperanto mem ekestis laŭ dialogikaj principoj. Ĝi estis kreita por la dialogika interkompreniĝo en internacia sfero, kie montriĝis manko de konkreta, senpera parol- kaj komprenkapablo.

Kaj tio sola same ne sufiĉas, ĉar decida estas ankaŭ la dialogikeco de la komprenkapablo. Tie estis la klasik-dialektika persvad-arto, transpasita per la dialogika reciproka komprenmaniero. Kaj kiel ne sufiĉas nur dialogike pensi, tiel same ne sufiĉas dialogi, sen dialogike pensi.

Tartalomjegyzék

Életrajzi részletek, melyek a klasszika átlépésével az eszperantóhoz vezettek	150
1. Gyermek- és kamaszkor	150
2. Kimentem a nagyvilágba, mérnökként dolgoztam, majd filozófiát tanultam.....	155
3. Egyetemista házaspárok voltunk, én filozófiát, feleségem pszichológiát tanult	157
4. Egy időre az élet polgáriasan normális szakaszába léptem	158
5. Hajlamomnak megfelelő világpolgárokra leltem.....	160
6. Elkezdtem az eszperantóval foglalkozni, ez tudatosította léteimet	161
7. Tudatosul bennem a filozófiával való foglalkozás szükségessége	162
8. Egyetemi tanulmányaim a Münchener Egyetemen	164
9. Aktív politikai tevékenységem az FDP-ben	170
10. Jógával kifelé nyíltam a klasszikus világ bezárkózottságából....	172
11. A meditáció és a gondolkodás különbségének a megtapasztalása	176
12. Veszprémvarsányi jogatánya, majd győri, budapesti és alsóörsi lakhelyek	178
13. Az eszperantó hatása az események tudatosításában	179
14. A San Marino-i AIS-ban találtam a dialogikát értő professzorokra	183
15. Lefordítottam németről eszperantóra doktori disszertációm	185
16. Az AIS átlépte a klasszikus egyetemek határait	188
17. Megmutatkozott az új gondolkodás szabadságának szükségessége	191
18. Gorbacsov az új gondolkodás legbefolyásosabb alkalmazója az újabb történelemben.....	192
19. Fordulat a klasszika átlépésével a dialogikus gondolkodás felé.	194
20. Ekkor jött az ötlet, hogy egy politikai jellegű eszperantó pártot alapítsunk	196
21. Együttműködésünk kezdete az EDE-vel 2004-ben.....	198
22. A német EDE részt vett a 2009. júniusi európai uniós parlamenti választásokon	201

23. Az EDE továbbfejlődésére jó hatással voltak az alsóörsi találkozók	203
24. A magyar EDE megalakulása.....	204
25. Az EDE-Föderáció jogilag bejegyzett politikai mozgalomként működik négy európai országban a nyelvi demokráciáért	209
26. Előadásokat tartottam Európa különböző országaiban az EDE-ről és az eszperantóról.....	210
27. Alsóörsi összejövetelen emlékeztünk meg az eszperantó politikai jelentőségéről szóló nemzetközi viták 10. évfordulójáról.....	214
28. Az eszperantó népszerűsítéséért végzett tevékenységemért megkaptam a Lengyel Lovagrend kitüntetését.....	216
29. Az EDE politikai mozgalmában a nyelvi demokráciáért vívott küzdelmem lett fő foglalatosságom célja és tartalma	219
30. Az EDE eredményei a 2009. évi európai uniós parlamenti választásokon és az azt követő vélemények és kritikák.....	222
31. Szemelvények azokból a vitákból, amelyek 2010-ben megelőzték az EDE destruktív bomlását	223
32. Néhány kiragadott példa internetes beszámolókból, amelyek rövid betekintést nyújtanak az EDE együttműködési problémáiba	227
33. Az EDE és az eszperantó mint politikai mozgalmak. De mi a különbség közöttük?	229
34. Min kellene változtatnia az EDE-nek?.....	232
35. Tudna-e az EDE, vagyis miként tudna együttműködni az UM-mel?	237
36. Közelednek a 2014-es európai uniós parlamenti választások.....	239
37. Vitáim magyar eszperantistákkal helyesírásról, fogalmazásról, politikáról	242
38. Balliberális beállítottságom meghatározásához.....	249
39. Az idealizmus nem csak az eszperantisták „nyomorúsága”	251
40. Válaszaim az eszperantóval kapcsolatos véleménykutató kérdésekre	253
41. Az EDE és az eszperantó zeneszerzőket inspirál.....	258
42. Létezik-e eszperantó filozófia.....	264
43. Válasz az Egyesült Nemzetekhez az eszperantó érdekében benyújtott kérvény egy bírálójának.....	269
44. Klasszikus vagy új, realista eszperantó mozgalom?	274

45. Ki elég kompetens ahhoz, hogy véleményt mondjon az eszperantóról?.....	278
46. Új, interdiszciplináris gondolkodás.....	280
47. A klasszika dialogikus átlépése az eszperantóval	288

*A címek előtti számok az eszperantó változat azonos fejezeteire
utalnak.*

Életrajzi részletek, melyek a klasszika átlépésével az eszperantóhoz vezettek

Életrajzom áttekintése életem hetvenötödik évében

Mindenekelőtt felvetődik a kérdés, milyen nyelven is írok? Hatvanadik évfordulómra eszperantóul és németül írtam egy összefoglalót. Jelenleg jórészt Magyarországon tartózkodom, ezért talán magyarul is írhatok.

Néhány mondatban, mindjárt az elején szeretném felemlíteni azt különbséget, amelyre csak ennyi idősen jöttem rá. Ugyanakkor köszönetet mondok a Mindenhatónak, amiért megengedte megélnem ezeket a tapasztalatokat. Körülbelül negyvenéves korban, amint mondani szokás, az ember eléri teljesítményének, képességeinek a tetőfokát. Én is azt gondoltam, hogy nagyon okos lettem a sok tanulás és tapasztalat után, és hogy már minden lényegeset tudok. Azonban most látom csak, hogy akkor bizony még milyen keveset tudtam, és milyen sokat kellett hozzátanulnom, és hogy még most is milyen keveset tudok; ha jól meggondoljuk, szinte semmit (Szókratész mindig aktuális marad).

1. Gyermek- és kamaszkor

Szabadkán születtem (most Subotica, Szerbia). Abban az időben rövid időre visszacsatolták Magyarországhoz. De az emberi természet törvényei szerint ezekre az időkre már nem nagyon emlékszem. Valamennyire rémlenek még az óvodai évek, meg utána az iskola első osztálya, amikor a tankönyvek még Sztálint éltették. Viszont már nekünk, gyerekeknek is feltűnt, hogy a második osztályban már nem az ő dicsőségét zengik, hanem Tito, a jugoszláv partizánvezér hőstetteit.

Emlékezetem kezdetekor anyámmal és nagymamámmal éltünk együtt. Otthon azt hallottam, hogy mi nem azonosulunk azzal, amit az akkor feltörekvő kommunisták művelnek. Mert apámat, ügyes üzletember

létére, éppen ők gátolták meg a kibontakozásban. Apám azonban már nem lakott velünk, nyomtalanul eltűnt, amikor az oroszok és a partizánok bevonultak.

Anyám mesélte, hogy amikor keresték, mi is életveszélyes helyzetbe kerültünk, ugyanis nem tudta megmondani, hogy hol van apám. Mi valóban nem tudtuk, hová tűnt el, úgyhogy kisgyerekkoromban azzal a tudattal éltem, hogy apám elveszett, ami abban az időben persze többekkel is megesett. Azután pár év múlva ismét előbukkant, és meglátogattott bennünket.

Az utána történtek nagy hatással voltak gyermekkoromra. Anyám nem fogadta vissza, egy korábbi házunkba kellett költöznie. Később tudtam meg csak az okát. Apám jómódú kereskedő, üzletember lévén, szeretett mulatozni (akkoriban még dívó szokás szerint). Például volt olyan eset, amikor Budapestről hívták fel anyámat, hogy apám könnyűvérű nők társaságában mulat, vendélgeti a kompániáját.

Anyám valószínűleg (keresztény hite ellenére) sem tudott megbocsátani neki, sőt engem is távol tartott tőle, „nehogy te is olyan legyél, mint apád”. Nem sokkal később, amikor hazatért egy alkalommal – erre különösen emlékszem, ugyanis félttem tőle –, megfogta a karomat, és azt mondta: „ne féljél”. Később próbáltam megfejtetni e szavak értelmét.

